

V-19034/1988

IL POPOLO CINIO

中國報道

1 1988





Ovovendistino en legado

Juna tajlorino



Por pluraj aferoj



VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ

Junulinoj el kamparo

Fotoj de LIŬ SIGONG

En la lastaj jaroj aperis en Pekino junulinoj el kamparo. Plejparto el ili venis de la provincoj Anhuj kaj Siĉŭan. En Pekino ili laboras kiel tajlorinoj, servistinoj, ŝuriparistinoj aŭ detalistinoj... Tio estas nova fenomeno sekvanta el la reformado de la ekonomia sistemo de la ŝtato.

La junulinoj venis en la urbon ne sole por perlabori monon, sed ankaŭ por sperti la urban vivon, lerni iajn kapablojn kaj larĝigi la vidkampon. Ili diris, ke ili intencas havigi al si kelkajn vestojn, akumuli monon kaj fari turisman vojaĝon. En la moderna civilizita vivo de la urbo ili senĉese altigas sian klerecon kaj riĉigas sian sperton por la socia vivo. Espereble inter ili aperos eminentaj administristoj kaj entreprenistoj.

Renkontiĝo de servistinoj





Fruktovendistino



Letero el la hejmloko

ENHAVO

SUR LA KOVRILO:

Draka danco

En Ĉinio cirkulas multaj mitoj pri drako, kaj la ĉina popolo tre ŝatas fari aktivadon kun drako kiel la temo. En festotagoj oni okazigas drak-boatan konkurson, elmontras drakajn lanternojn kaj prezentas drakan dancon por esprimi bondeziraĵojn. 1988 estas la draka jaro por Ĉinio.

Foto de **ŜEN ĈEN**

VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ:

Junulinoj el kamparo

Fotoj de **LIŬ SIGONG**

ĈINAJ ARTOJ:

Modernaj ĉinaj freskoj

Moso-oj apud Lugu-lago

Fotoj de **CAJ HAJFENG**

SUR LA DORSKOVRILO: [ĈINAJ POŝTMARKOJ]

Antikvaj ĉinaj mitoj

- 2 Ĉinio ĉe nova startpunkto al la estonteco
- 8 Parado de la ĉinaj artoj
- 5 Prezo-reformo iras stabile
- 15 Post arbara incendio
- 54 VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (13): Riĉa suda Siĉŭan
- 18 Esperanto — scienco — biblioteko
- 20 La faka asocio ELF/AREK
- 22 ESP-NOVAĴOJ
- 24 POR KOMENCANTOJ: Bonaj gejunuloj; "Dankon al vi, frateto!"
- 26 La Pekina Biblioteko marŝanta al moderneco
- 38 Espero de la glacia kaj neĝa sportoj
- 29 ĈINA MEDICINO: Pri fundamenta teorio de la tradicia ĉina medicino
- 43 NOVELO: Ĉi-vespere li ne havas partneron en balo
- 40 ĈINA LITERATURO:
Pejzaĝaj kaj idiliaj poetoj de la prospera Tang-dinastio kaj iliaj verkoj
Idilioj de Tang-dinastio en prospero
- 46 Kiam ili bezonas helpon...
- 48 ĈINAJ MOROJ: Laba-kaĉo
- 49 Ŝingĉeng — turisma pitoreskejo
- 51 Virinaj vestoj kaj galanterio en la historio de Ĉinio
- 61 Scienc-teknika kunlaboro en la tria mondo
- 64 ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Ĉina ŝako
- 66 KURANTAJ AFEROJ
- 63 INTER NI
- 21,28 KORESPONDI DEZIRAS
- 65 Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero


JARABONTARIFO	Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00		
Aŭstralio	\$A	15.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	1500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	14.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugaliao	Esc	1100			

Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 8.00 US\$ 10.00 Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50

Ĉinio ĉe nova startpunkto al la estonteco

En la pasintaj 9 jaroj, gvidante sian popolon, la Komunista Partio de Ĉinio persiste prenis la ekonomian konstruadon kiel la ĉefan laboron,

La reprezentantoj unuanime aprobas la rezolucion pri la raporto, kiun Ĝaŭ Zijang faris en la nomo de la 12-a CK de KPĈ.



laŭpaŝe faris la ĉiuf flankan reformadon, aplikis la politikon malfermi la pordon al la eksterlando kaj akiris rimarkindajn sukcesojn en ekonomio, politiko, kulturo kaj aliaj kampoj. Kaj de la 25-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro 1987 la partio solene okazigis en Pekino sian 13-an Tutlandan Kongreson. La kongreson partoprenis pli ol 1 900 reprezentantoj elektitaj el inter la 46 milionoj da partianoj kaj ĝin ĉeestis ankaŭ invititoj. La centra tasko de la kongreso estis rapidigi kaj profundigi la reformadon, pluapaŝe difini fundamentajn principojn por la estonta konstruado kaj reformado de la ekonomia kaj politika sistemoj. La kongreso estis plia kunveno kun grava signifo kaj profunda influo de post la historia turniĝo de la 3-a Plena Sesio de la 11-a Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, en kiu la partio decidis turni la graviton de sia laboro al la socialisma moderniga konstruado.

En la nomo de la 12-a Centra Komitato de KPĈ, Ĝaŭ Zijang (Zhao Ziyang), la aganta ĝenerala sekretario de CK de KPĈ, faris raporton sub la titolo “Antaŭenmarŝu laŭ la Socialisma Vojo kun Ĉinaj Karakterizaĵoj”. En la raporto li plenamplekse resumis la sukcesojn, sperton kaj problemojn en la 9 jaroj post la 3-a Plena Sesio de la 11-a CK de KPĈ kaj montris, ke en la pasintaj 9 jaroj, “sur la bazo de la grandaj sukcesoj en la socialisma konstruado post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, malfermiĝis la nova etapo de la historia evoluo de la partio kaj okazis profunda ŝanĝiĝo al la fizionomio de la lando”. En la lastaj 9 jaroj daŭre kaj stabile kreskis la nacia ekonomio de Ĉinio kaj ĝenerale duobliĝis la totala produktovaloru de la nacia ekonomio, la ŝtata financa enspezo kaj la averaĝa enspezo de urbanoj kaj



La membroj de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPĈ: Ĝaŭ Zijang (meze), Li Peng (la dua de dekstre), Ĉjaŭ Ŝi (la dua de maldekstre), Hu Ĉjili (dekstre) kaj Jaŭ Jilin (maldekstre)

kampanoj.

Li resumis la gravajn progresojn en la socia ekonomio: La plejparto de la miliardo da ĉinoj vivas kun sufiĉaj nutraĵoj kaj vestoj. Ĉinoj en iuj lokoj ekvivas bonhave. Iuj regionoj ankoraŭ ne povas provizi siajn loĝantojn per sufiĉaj nutraĵoj kaj vestoj, tamen la vivo estas bonigita. Pliaj 70 milionoj da urbanoj akiris profesion, dume rapide disvolviĝis industriaj entreprenoj de la kamparo, kaj 80 milionoj da kamparanoj turnis sian energion tute aŭ parte al neagrikulturaj laboroj. En la merkata provizado oni fundamente ŝanĝis la situacion, en kiu longtempe mankis konsumaĵoj. Oni bone ĝustigis la seriozajn misproporciojn de la nacia ekonomio, ke ĝi suriris la trakon de fundamente akorda disvolvo. Samtempe, gvidante la popolon, la partio plifirmigis kaj disvolvis la politikan situacion de stabileco kaj unuigo, paŝon post paŝo disvolvis la socialisman demokration kaj leĝan sistemon, starigis la socialisman spiritan civilizacion, reformis la armeon, proponis kaj klopodis praktiki "du reĝimojn en unu lando" por reunuigo de la patrolando, reguligis la diplomatian situacion kaj siajn rilatojn kun la eksterlando. La partio akiris rimarkindajn sukcesojn en tiuj flankoj.

Ĝaŭ Zijang diris, ke la praktiko en la lastaj 9 jaroj pruvis, ke la linio de la partio post la 3-a Plena Sesio de la 11-a CK de KPĈ estas ĝusta marksisma linio. Li emfazis, ke ĝuste koni la nunan historian etapon de Ĉinio estas la ĉefa bazo por ellabori kaj praktiki ĝustajn linion kaj politikojn. Li diris ankaŭ, ke Ĉinio nun estas en la primara stadio de socialismo. Ĉinio bezonas almenaŭ cent jarojn por transiri de la fundamenta plenumiĝo de la socialisma transformado de la privata posedanteco de produktaj rimedoj farita en la 50-aj jaroj al la fundamenta efektiviĝo de la socialisma modernigo, kaj tiu tuta procezo estas la menciita primara stadio. Ĝi estas specifa stadio definitive traŭrita de Ĉinio deveninta el duonkolonia kaj duonfeŭda socio, por konstrui socialismon surbaze de la postĝinta produkta forto kaj neevoluinta var-ekonomio.

La baza linio de la Komunista Partio de Ĉinio en tiu stadio estas gvidi kaj unuigi ĉiujn naciecojn de la lando, preni la ekonomian konstruadon kiel la centron, persisti en kvar fundamentaj principoj*.

*Ili estas la socialisma vojo, la popol-demokratia diktaturo, la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Marksismo-Leninismo kaj Maŭzedong-penso.



Reprezentantoj diskutas pri la raporto.

persisti en la reforma kaj pord-malferma politikoj, sin apogi sur propra forto kaj lukti en malfaciloj por konstrui Ĉinion en riĉan, potencon, demokratian kaj civilizitan modernan socialisman landon.

Kio estas la ĉefa tasko de Ĉinio nuntempe por la profundigo de la reformado de la ekonomia sistemo? En sia raporto Ĝaŭ Zijang eksplikis, ke tiu tasko estas laŭperiode fari kompletigan reformadon al planado, investado, materialo, financo, moncirkulado kaj ekstera komerco kun ŝanĝo de la administra sistemo de entreprenoj kiel la ĉefa ĉenero kaj paŝon post paŝo starigi skeleton de nova sistemo de planizita var-ekonomio. Ĝeneral-dire, nova funkcia sistemo de ekonomio devas esti ŝtata reguligo de la merkato kaj gvido de la merkato super la entreprenoj.

Rilate la reformadon de la politika sistemo, Ĝaŭ Zijang diris, ke Ĉinio estas socialisma lando de popol-demokratia diktaturo, ke ĝia fundamenta politika sistemo estas bona. Sed ekzistas seriozaj mankoj en la konkretaj gvida sistemo, organiza formo kaj labora metodo, kion atestis la troa koncentriĝo de povo, serioza burokratismo kaj forta influo de feŭdismo.

Reformi la politikan sistemon signifas disvolvi la avantaĝon, forigi la mankojn kaj starigi la socialisman demokratian politikon kun ĉinaj karakterizaĵoj. La celo de la reformado por longa periodo estas starigi la socialisman politikan sistemon kun alta demokratio, perfekta leĝa sistemo, alta efiko kaj plena vicleco; kaj tiu celo por proksima periodo estas starigi gvidan sistemon povantan altigi efikon, fortigi vivipovon kaj mobilizi la aktivecon de ĉiuj flankoj.

La paŝoj necesaj por la celo por proksima periodo inkluzivas: apartigi la funkcion de la partio disde tiu

de la registaro, pluapase transdoni la decidpovon al malaltaj instancoj, reformi la registarajn instituciojn kaj sistemojn de funkciuloj kaj personaro, starigi sistemon de socia interkonsiliĝo, perfektigi kelkajn regularojn de la socialisma demokratia politiko kaj fortigi la konstruadon de la socialisma leĝa sistemo.

La kongresanoj serioze diskutis kaj unuvoĉe aprobis la raporton de Ĝaŭ Zijang.

Post plena preparado, per sekreta balotado, la kongreso elektis la 13-an Centran Komitaton konsistantan el 175 membroj kaj 110 alternaj membroj. Okulfrapas, ke en la centran komitaton eniris multaj junaj membroj, dum multaj merito-plenaj kaj altprestigaĵaj proletaj revoluciistoj de la maljuna generacio forlasis la Centran Komitaton. Tio celas garantii la daŭran kaj stabilan praktikadon de la ĝusta linio de la partio. Deng Ŝjaŭping (Deng Xiaoping) kaj aliaj proletaj revoluciistoj de la maljuna generacio kategorie prezentis sian peton ne plu okupi lokon en la Centra Komitato, kio montris ilian malproksimvidon kaj grandanimecon. Ilia faro neniom malhelpos ilin daŭre ludi sian rolon por la gravaj politikoj de la partio kaj la ŝtato.

Samtempe kun la naskiĝo de la nova Centra Komitato la kongreso elektis ankaŭ la Centran Komisionon de Konsilantoj el 200 membroj kaj la Centran Disciplino-inspektan Komisionon el 69 membroj. La kongreso ekzamenis kaj aprobis la rezoluciojn, kia tiu pri "Revizio de Kelkaj Artikoloj de la Statuto de la Komunista Partio de Ĉinio". La kongreso plene sukcesis en la plenumo de la difinitaj taskoj.

Post la kongreso la 13-a Centra Komitato de KPC okazigis sian Unuan Plenan Sesion en la 2-a de novembro kaj starigis sian centran gvidorganon. Ĝaŭ Zijang funkcias kiel la ĝenerala sekretario de CK de KPC; Ĝaŭ Zijang, Li Peng, Ĉjaŭ Ŝi (Qiao Shi), Hu Ĉjili (Hu Qili) kaj Jaŭ Jilin (Yao Yilin) kiel membroj de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPC. Deng Ŝjaŭping funkcias kiel prezidanto de la Centra Milita Komisiono, Ĉen Jun (Chen Yun) kiel prezidanto de la Centra Komisiono de Konsilantoj kaj Ĉjaŭ Ŝi kiel sekretario de la Centra Disciplino-inspekta Komisiono.

La 13-a Kongreso de KPC kaj la Unua Plena Sesio de ĝia 13-a Centra Komitato estis kunvenoj kun granda sukceso. Ilia plej grava rezulto estas, ke la longtempa kaj stabila daŭrigo de la linio de la partio estos garantiata politike, organize kaj teorie. La nova Centra Komitato daŭre antaŭenpuŝos la reformadon, malferman politikon kaj modernigan konstruadon, kiujn Ĉinio praktikis en la lastaj 9 jaroj. ■

LJAŬ ŬANG:

Prezo-reformo iras stabile

Prezo-reformo estas unu el la gravaj enhavoj de la reformo de la ĉina ekonomia sistemo. Ĝi komenciĝis en 1979, kiam la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio decidis grandamplekse altigi la aĉetprezon de agrikulturaj produktaĵoj

kaj per tio komenciĝis la prezo-reformo.

MANKOJ DE LA MALNOVA PREZO-SISTEMO

Antaŭ la reformo, la ĉefa

manko de la prezo-sistemo estis troa koncentriĝo kaj rigidiĝo de la preza administra sistemo. La rajto difini prezojn estis koncentrita ĉe la centra kaj lokaj registaroj, tial la prezformo estis ununura. La planizitaj prezoj, nome varo-

En memservejo



prezoj kaj pagonormoj, difinitaj de diversnivelaĵoj registaroj super tiu de gubernio laŭ rajto donita de la ŝtato, okupis ĉefan pozicion. La merkataj prezoj, nome varo-prezoj kaj pagonormoj, difinitaj de produktantoj aŭ entreprenantoj, efikis ĉefe sur la urbaj kaj kamparaj foiroj. Tio rezultigis fundamente konstantan prezaron dum dekoj da jaroj kaj ne povis rapide speguli la ŝanĝiĝon de la socia produktado kaj intersanĝaj kondiĉoj.

Precipe en la periodo de "kultura revolucio" de 1966 ĝis 1976, la prezoj estis frostigitaj, kio kaŭzis seriozan tordiĝon al la valoroj kaj prezoj de la sociaj produktaĵoj. La prezoj, laŭ kiuj la ŝtato aĉetis de kamparanoj agrikulturajn produktaĵojn, kaj ankaŭ tiuj de energiaj fontoj kaj materialoj, estis kompare malaltaj, sed la prezoj por prilabori industriajn produktaĵojn estis kompare altaj. Tio rezultigis grandan diferencon inter profito-proporcio en malsamaj industriaj

entreprenoj. Por daŭrigi la socian produktadon la ŝtato devis elspezi grandan monsumon kiel prezo-kompenson por mildigi la kontraŭdirojn tiurilate.

Estis ankaŭ multaj mankoj en la tradiciaj prezo-formoj. Ekz., la prezo por unu tuno da cemento produktita de la entreprenoj administrataj de la centra registaro estis pli ol 50 jŭanoj, sed tiu samkvalite produktita de la lokaj entreprenoj estis tamen 70-80 jŭanoj. Kvankam la specoj de cemento estis samaj kaj vendataj laŭ planizitaj prezoj, tamen ili multe diferencis en prezoj pro malsamaj administrantoj. Tio serioze vundis la aktivecon de la entreprenoj administrataj de la centra registaro.

Se la prezoj ne povas speguli la valoron de varoj kaj la ŝanĝiĝon inter la proponado kaj postulado, la entreprenoj perdas vivforton kaj ankaŭ la merkato stagniĝas sub rigida administrado. Se oni ne faras reformon al la malnova prezo-sistemo, tio ne nur serioze

malhelpas la ekonomian disvolviĝon, sed ankaŭ la glatan iradon de aliaj ĉeneroj de la ekonomia reformo. Tial, la reformo de la neracia prezo-sistemo kaj la rigida prezo-administra sistemo kaj restarigo de la preza vivforto estas aferoj urĝaj por disvolvi varo-produktadon kaj akceli la prosperon de merkato kaj tute necesaj por la ekonomia reformo.

REFORMO DE VARO-PREZOJ PRAKTIKATA

La ok-jara reformo multe ŝanĝis varo-prezojn. La ŝanĝiĝo konsistas el du kategorioj: prezo-reguligo (t.e., la ŝtato faras unuecan reguligon al neraciaj varo-prezoj) kaj prezo-liberigo (t.e., la ŝtato ne difinas unuecajn varo-prezojn kaj lasas la merkaton libere difini ilin). De 1979 ĝis 1984 oni faris ĉefe prezo-reguligon kaj de 1985 ĝis 1986 ĉefe prezo-liberigon. La principo observata en prezo-reformo estas "kombino de reguligo kaj liberigo". La prezoj de industriaj produktaĵoj estis reguligitaj pli multe ol liberigitaj, tiuj de agrikulturaj produktaĵoj liberigitaj pli multe ol reguligitaj. La varo-prezoj monopoligitaj de la ŝtato estis nur reguligitaj sen liberigo kaj tiuj de malgrandaj varoj estis tute liberigitaj.

En la lastaj jaroj oni faris kvin paŝojn antaŭen en prezo-reguligo: Unue, la ŝtato altigis la aĉetprezojn de la ĉefaj agrikulturaj produktaĵoj. Ekz., la aĉetprezoj de diversaj grenoj meznombro estis duoble altigitaj. Tio certgrade ŝanĝis la stacion, ke la industriaj produktaĵoj estis altprezaj kaj la prezo-strukturo de industriaj kaj agrikulturaj produktaĵoj neracia. Due, la ŝtato multe altigis la prezojn de la ĉefaj minejekspluataj industriaĵoj kaj krudmaterialoj. Tio pli-malpli ŝanĝis la nekvilibran stacion de la interna prezo-strukturo de la industriaj produktaĵoj. Ekz., la prezo de karbo altigis je 30.5%, tiu de ŝtal-

Prez-administranto kontrolas pesilon en foiro.



produktaĵoj je 20%, tiu de minejekspluataj industriaĵoj je 50%, tiu de krudmaterialoj je 30%, sed tiu de prilaboritaj industriaj produktaĵoj nur je 11%. Trie, la prezoj de manĝaĵoj estis malsamgrade altigitaj, krom parto da manĝaĵoj liverataj al la urbaj loĝantoj laŭ la distribua porcio difinita de la ŝtato. Kvare, la ŝtato altigis la prezojn difinitajn de fabrikoj por konsumaj industriaj produktaĵoj, inkluzive de kotonaj ŝtofoj, aluminiuj potoj, bicikloj kaj aliaj, kaj malaltigis la prezojn de kemifibras ŝtofoj, brakhorloĝoj, radioaparatoj, elektronikaj produktaĵoj kaj aliaj. Krome, la transportaj prezoj per fervojo, akvovojo kaj aviadilo kaj pagonormoj por turisma servo estis altigitaj.

En la prezo-liberigo oni faris tri paŝojn antaŭen: Unue, por la malpez-industriaj kaj tekstilaj produktaĵoj, la ŝtato difinis nur la prezojn de la ĉefaj varo-specoj kaj liberigis la prezojn de la ordinaraj varoj kaj pli ol 1 000 malgrandaj varoj. Due, por la pez-industriaj produktaĵoj, la ŝtato difinis la prezojn de enplanaj varoj kaj liberigis tiujn de eksterplanaj. Trie, por la agrikulturaj produktaĵoj, la prezoj de greno kaj oleo menditaj de la ŝtato ĉe kamparanoj estis difinitaj laŭ la ekonomia kontrakto kaj tiuj de la alia nemendita parto estis libere difinitaj de merkatoj en limigo de la prezaro difinita de la ŝtato.

En la pasintaj ok jaroj, la nombro de la varoj, kies prezoj estis difinitaj de la ŝtato, reduktiĝis de 113 al 25 specoj. Laŭ vendo-prezoj, la parto kun prezoj difinitaj de la ŝtato konsistigis ĉ. tri dekonojn, la aliaj sep dekonoj vendiĝis laŭ prezoj direktataj de la ŝtato aŭ laŭ prezoj reguligitaj de merkatoj. La prezoj direktataj de la ŝtato estis varo-prezoj kaj pagonormoj difinitaj de entreprenoj sub la direktado de la prezo-administraj departementoj de diversnivela registaroj super tiu

de gubernio laŭ la difinitaj bazaj prezoj, plej altaj limitaj prezoj kaj plej malaltaj protektaj prezoj. Tiamaniere, la prezoj difinitaj nur de la ŝtato havas tri formojn kunekzistantajn, nome, la ŝtatajn planizitajn prezojn, prezojn direktatajn de la ŝtato kaj prezojn reguligatajn de merkatoj. Tia plurobla prezo-formo konformas al la postuloj de la nuna planizita varo-ekonomio.

EFIKO DE LA PREZO-REFORMO

Laŭ la nun videbla stato la ok-jara prezo-reformo solvis jenajn problemojn:

Certgrade malgrandiĝis la troa diferenco multjare formita en la interŝanĝaj prezoj inter industriaj kaj agrikulturaj produktaĵoj. En la pasintaj ok jaroj la ŝtato altigis la aĉetprezojn de agrikulturaj produktaĵoj je 77%, kaj samtempe la prezoj de industriaj varoj venditaj al la kamparo estis altigitaj nur je 14%. Pro la malgrandiĝo de prezo-diferenco inter industriaj kaj agrikulturaj produktaĵoj, nun kontraŭ sama kvanto da agrikulturaj produktaĵoj oni povas interŝanĝi industriajn varojn je 54% pli multe ol antaŭ ok jaroj. Tio multe altigis la aktivecon de la kamparanoj en produktado.

La reguligo de la interrilatoj de prezoj inter agrikulturaj produktaĵoj akcelis tiun de la produkta strukturo de la kamparo. En la pasintaj ok jaroj estis la plej granda la altigo de la prezoj de akvoproduktaĵoj el la diversspecaj agrikulturaj produktaĵoj aĉetitaj de la ŝtato, tiu por greno okupis la duan lokon kaj pli poste tiu por sekaj kaj freŝaj fruktoj, viando, ovoj kaj legomoj. La prezo-altigo stimulis produktadon kaj prosperigis diversajn okupojn en la kamparo. Multe kreskis la kvanto de akvoproduktaĵoj. En 1986 leviĝis je 51% la proporcio de arbarkulturo, brutobredo, krom-okupo kaj fiŝado en la totala produktovaloru de agrikulturo en Ĉinio. 70 milionoj da kamparanoj

ekokupiĝis pri industrio, konstruado, transportado, komercado kaj aliaj servoj. La antaŭa aŭtarcia kampara ekonomio cedis lokon al varo-ekonomio. En 1986 atingis 63.9% la varo-proporcio de agrikulturaj produktaĵoj en Ĉinio.

La prezo-reguligo de diversaj industriaj produktaĵoj ŝanĝis la longtempan neracian prezo-sistemon interne de industriaj produktaĵoj. Malgrandiĝis la diferenco de la meznombra profito inter malsamaj industriaj branĉoj kaj rapidiĝis la disvolviĝo de la fundamenta industrio.

La prezo-reformo akcelis raciigon de la prezo-strukturo de Ĉinio, disvolvis produktadon kaj prosperigis la merkaton. En la pasintaj ok jaroj la socia totala produktovaloru de la tuta lando pliiĝis meznombro je 10.1% ĉiujare, la nacia enspezo pliiĝis meznombro je 8.7% ĉiujare. La biletoj por ĉiutagaj konsumajoj, krom tiuj de greno kaj oleo por urbaj loĝantoj, estis nuligitaj. La urba kaj kampara merkatoj estis ĉiam prosperaj, la totala sumo de la podetala vendo de varoj pliiĝis meznombro je 15.5% ĉiujare kaj la kreska proporcio superis pli-ol-duoble tiun de la pasintaj 28 jaroj.

Kvankam la prezo-reformo akiris kompare grandan sukceson, tamen ekzistas ankoraŭ multaj mankoj. Nun la interrilatoj de prezoj por parto da varoj ankoraŭ estas neraciaj, prezoj de iuj gravaj produktaĵoj estas kompare malaltaj, la prezo-diferenco de kvalito kaj tiu de sezono por nemalmultaj varoj estas kompare malgrandaj, la planizita prezo de produktaj rimedoj por multaj pez-industriaj departementoj estas kompare malalta kaj la neplanizita prezo kompare alta. Krome, rezulte de la neperfekta prezo-administrado ekzistas en la socio kontraŭleĝaj fenomenoj laŭplaĉe postuli pagon, laŭplaĉe altigi prezon, vendi subnormajn varojn kiel normajn. Tiuj problemoj estos solvitaj en la estonta reformo. ■

Parado de la ĉinaj artoj

— Pri la Unua Arta Festivalo de Ĉinio

Per subita animskua ektondro de tamburoj kaj tamtamoj kaj tuj poste unisono de ĉiuj muzikiloj komenciĝis la popola klasika melodio “La Generalo”, kiun ludis mil nacimuzikilaj ludistoj. La unisono de dekoj da malsamaj ĉinaciaj muzikiloj grandioze imponis kvazaŭ sturmus sennombraj nerezisteblaj falangoj. Jen la preludo en vespero de la 5-a de septembro, 1987, oficiale inaŭgurigo de la Unua Arta Festivalo de Ĉinio en la Ĉefurba Sporthalo kun 18 000 sidlokoj.

La Unua Arta Festivalo de Ĉinio estis senprecedenca en la historio de la ĉinaj artistaj rondoj. Ne nur en Pekino la festivalo havis siajn scenejojn ankaŭ en Ŝanhajo,

Uhan, Langouŭ, Ĉengdu, Urumĉi, Daljan kaj Tjanĝin. De la 25-a de aŭgusto ĝis la 10-a de oktobro prezentiĝis sume 130 repertuaroj.

La ĉefa scenejo en Pekino havis 44 programerojn, kiaj naciaj muzikoj, operoj, dancodramoj, dancoj, teatraĵoj, modernaj dramoj, ĉjuĵi, akrobataĵoj, ombroteatraĵoj kaj pupteatraĵoj, inter kiuj estis du programeroj de Sovetunio kaj FR Germanio. Samtempe, okazis belartaj ekspozicioj, popolamasaj literaturaj kaj artaj aktivadoj kaj folkloraj aktivadoj.

La festivalo koncentre manifestis la novajn atingojn en heredo kaj disvolvo de la propraj artaj

tradicioj kaj tiujn en lernado de alilandaj artoj.

PROSPERA NACIA MUZIKO

La prezentado de la nacia muziko estis ĉefa enhavo de la festivalo. El la 44 programeroj sur pekinaj scenejoj estis 37 programeroj de la nacia muziko, kiuj konsistigis 70 procentojn de la totala muzika programo. Multaj profesiaj kaj amatoraj ludistoj sin montris en Pekino. La granda-skala inaŭguro gravure impresis la spektantojn.

La festivalo donis ŝancon al la orkestroj por ilia konkursado. La Centra Naci-muzika Orkestro estas la plej eminenta inter ĉiuj naci-muzikaj rondoj. Post sia sukcesa provo en sistemigo de ŝeng (ĉina blovmuzikilo) ĝi kuraĝe iniciatis uzi reformitajn *banhu* (speco de ĉina arĉa instrumento kun ligna sontabulo), kio faris la tembron de la kordaj instrumentoj pli penetriva, de tio aperis tute nova tono. Ĉ. cent ludantoj prezentis grandan naci-muzikan verkon, koncerton de *erhu* (speco de ĉina dukorda arĉa instrumento) “Kapriĉo pri la Granda Muro”, kio evidente montris la evoluan tendencon de la naci-instrumenta orkestro, de simpla al pli kompleksa grupigo.

En la lastaj jaroj diplomitoj de fakaj artaj institutoj, kiuj estas alte klerigitaj kaj havas kompare altan lud-arton, aliĝis al orkestroj, kio multe altigis la nivelon de ilia

Ludo de ĉinaj muzikiloj





Kun flugantaj rubandoj




Pekin-opero prezentata țe la inaũguro de la festivalo



La popola danco "Portado de Palankeno"



Altira forto de la festivalo





La danco "Ora Danco Argente Ornamenta"




Drako dancanta inter la rigardantoj





La akrobataĵo "Leona Danco"

Ekspozicio de popola arto de Junnan




prezentado. Peng Šiūūen, estro de la Centra Naci-muzika Orkestro, kiu laboris tie jam 30 jarojn, diris: "Pekino havas tiel multajn talentulojn en la kampo de la nacia muziko, kaj krome ili estas profesiaj, tial oni ne devas esti pesimismaj al la perspektivo de la nacia muziko." Liaj vortoj reprezentas la komunan senton de tiuj, kiuj estis maltrankvilaj pri la estonteco de la nacia muziko.

VIGLAJ OPEROJ KAJ DANCDRAMOJ

Iuj opinias, ke la kvar operoj kaj dancdramoj prezentitaj en la festivalo estas nova startpunkto en kreado de ĉinaj operoj kaj dancdramoj kaj estas revigligo de ĉinaj operoj kaj dancdramoj post la longa silento en la 70-aj jaroj. Tio ja estas vero.

La opero "Kampo", prezentita de la Ĉina Opera kaj Dancdrama Domo, rakontas la venĝan historion en kamparo de Nord-oriento en la dudekaj jaroj. La opero rompis la monotonan formon de la kutimaj ĉinaj operoj, kiuj konsistas el dramoj kaj kanto, kaj aplikas la formon laŭ ĝia originala senco, traigas la tutan operon per muziko. Kaj oni kompare sukcese provis la skribmanieron per recitativo kaj ario, esprimante la psikajn statojn de pluraj roloj per kunkanto, kaj ankaŭ plene prezentis la esprimovon de orkestro. La intrigoj de la opero reliefiĝas pere de integra efekto de harmonio de la orkestro anstataŭ dialogoj de aktoroj, tiele la opero estis aplaŭdita de fakuloj kaj estis honorita kiel "la vojo de la ĉina novtipa opero".

"Ĉarmaj dancoj kaj buntaj vestoj", prezentita de la Ŝanhaja Danc-drama Domo, estas nek danc-dramo, nek danco, nek kostumprezentado. Ĝi estas ĉeranda arto. Ĝi prezentis al la spektantoj la evoluon de la ĉinaj



Sceno el la dramo "Caŭ Ĝi"

kostumoj kaj disvolviĝon de la dancaj stiloj de la dinastioj Tang (618-907), Song (960-1279), Ming (1368-1644) kaj Ĉing (1644-1911), ĝenrojn, morojn kaj spiritojn de ĉinoj en tiuj periodoj. Ĝi estas unu el la programeroj plej ŝatataj de la spektantoj dum la festivalo. La danc-dramo estis prezentita kvarfoje, kaj ĉiufoje la teatro estis plenplena. Ĝi brile sukcesis. Evidente sukcesis la provo de la koregrafo kaj reĝisoro por kontaktigi la tradician kulturon kun la nunaj spektantoj.

BONAJ TEATRAĴOJ ŜATATAJ

En la festivalo la dramoj, teatraĵoj, ĉjuĵi kaj akrobataĵoj gajnis aplaŭdon de la spektantoj dank' al siaj riĉaj enhavoj kaj brilaj prezent-formoj.

Dramo "Caŭ Ĝi", prezentita de la Harbina Drama Teatro, priskribas la mortan batalon inter princoj reprezentataj de Caŭ Ĝi en unu flanko, kiuj proponas praktiki humanecan politikon kaj kontraŭstaras perverson, kaj la regantoj reprezentataj de Caŭ Pi, frato de Caŭ Ĝi, en la alia, kiuj klopodis por defendi sian regantecon kaj elimini siajn rivalojn. La dramo admirigis la spektantaron per siaj impona grandiozeco, realisma infektemo kaj profunda historia signifo.

La intrigoj de la dramo puŝiĝis al sia apogeo, post kiam Caŭ Pi surtroniĝis kaj ordonis al sia pli juna frato Caŭ Ĝi verki poemon en la tempo de sep paŝoj, alie la lasta devis trinki venenan vinon metitan sep paŝojn fore. La genia Caŭ Ĝi indignis kontraŭ la kruela persekutado. Kun fabotigo en la mano li improvizis:

*Fabo en pot' kuirata de la tigo,
Kontraŭ la tig' larmoplore*

plendante:

*"Saman radikon ni havis kune,
Kial damaĝas vi senkompatе?"*


Tio ja estas la landfama "Poemo en Sep Paŝoj". En la dramo Caŭ Ĝi forte piedofrapis finante sian improvizacion de tiu sanga kaj larma poemo. La trista lamentado skuis la palacon de Ŭej-regno kaj tordis la koron de la spektantoj.

En la lastaj jaroj la teatro kaj ĉjuĵi restis stagnaj. Tamen la ŝatateco de teatraĵoj kaj ĉjuĵi en la festivalo montras, ke bonaj teatraĵoj kaj eminentaj roluloj ĉiam estas bonvenaj.

La Siĉuan-opero "Blanka Serpento" estas unu el la programeroj ŝatataj de la spektantoj. La opero estas adaptita laŭ la legendo pri la amhistorio de Blanka Virino (blanka serpento) kaj Ŝju Ŝjan. Ŝju



Sceno el la farso "Post Kuliso"



Sceno el la opero "Kampo"

Ŝjan estis nesincera al sia edzino. Por reliefigi la indignon de Verda Knabino (verda serpento), servistino de Blanka Virino, kontraŭ Ŝju Ŝjan, la aktorino ruĝigis, nigrigis kaj originis sian vizaĝon sinsekve, kio ravis la spektantojn.

Leona Danco estas tradicia ĉina akrobataĵo ofte prezentata sur scenejo. Ĝi ja estas gajiga, tamen sen nova kreo en la prezentado. Ĉi-foje la spektantoj ĝuis ĝian tute novan prezentadon. En la inaŭguro de la festivalo la Leona Danco prezentita de la akrobatoj de Ŝenjang kaj Hebej-provinco enknedis teknikojn de gimnastiko, *uŝu*, danco, teatro kaj la tradicia akrobatiko, tiel oni donas al la danco tute novan formon, kun altaj kaj animskuaj teknikoj, kaj plenan de vigla etoso.

MINIATURO DE LA POPOLA KULTURO

En la Ĉina Belarta Domo staris emblemo de la Unua Arta Festivalo de Ĉinio. Kvin eksponoj ĉi tie, kiel grava konsistiga parto de la festivalo, malfermiĝis en la 6-a de septembro. En la centra halo de la domo dudek skulptaĵoj de sveltaj belaj junulinoj, en naciaj kostumoj, staris ambaŭflanke por bonvenigi la vizitantojn, kvazaŭ mallaŭte rakontus pri la hieraŭa kaj hodiaŭa kulturoj de Hubej- kaj Junnan-provincoj.

Junnan situas en la sudo-okcidenta altebenaĵo de Ĉinio, kie loĝas 24 nacimalplimulto. Ili ĉiuj kreis siajn originalajn formojn de popola kulturo. La ekspono de la nacieca popola kulturo de

Junnan-provinco prezentis la neolitikajn surrokajn bildojn en Cangljang, bronzaĵojn de la antikva Djan-regno en la periodo de Militantaj Regnoj (403-221 a. K.), tipajn murtapiŝojn de la kvin tieaj naciecoj, milon da vestoj kaj ornamaĵoj de 24 naciecoj kaj diversajn popolajn artaĵojn. La ekspono estas enhavoriĉa.

La Ekspono de Popola Belarto de Hubej-provinco, devenanta de la Ĉu-kultura origino, prezentis artaĵojn kun desegnoj formitaj de kruciĝantaj kudreroj, brodaĵojn, ŝalojn kun nubformaj desegnoj, lakaĵojn, ŝtonajn kaj lignajn skulptaĵojn, sume pli ol du mil pecojn. Ĝi bone montris la originon de Ĉu-kulturo kaj la moron de Ĉu-regnantoj en la periodo de Militantaj Regnoj adori *feng* (birdo en ĉina legendo).

Samtempe en la domo okazis ankaŭ ekspono de la ĉinaj modernaj popolaj pentraĵoj kaj ekspono de parto de la pentraĵoj konservataj de la domo mem. Krome, oni okazigis eksponon de ĵi-naciecaj vestoj kaj ornamaĵoj en la Nacieca Kultura Palaco en Pekino, kiu servis al la spektantoj kiel estetika ĝuo. En la ekspono vidiĝis 3 900 pecoj da vestoj kaj ornamaĵoj, per kiuj oni faris kompletan montron al la spektantoj pri vestoj kaj ornamaĵoj de ĵi-nacieco. La ekspono sin karakterizas per la moroj adori tigron, respekti fajron, alte taksu forton, de kio la spektantoj povis koni la belecon de ĵi-naciecaj artoj kaj ankaŭ ĝian longan kulturen tradicion.

Falis la kurteno de la Unua Arta Festivalo de Ĉinio en la Ĉefurba Fera-ŝtala Kompanio, kie la amasa kultura aktivado estas tre vigla. Trarigardante ĉiujn programerojn, oni povas konstati, ke ili certagrade spegulis la nivelojn de kreado kaj prezentado en la kultura kaj arta kampo de Ĉinio en la lastaj jaroj. La festivalo certe profunde influos la ĉinan kulturon kaj arton. ■

Post arbara incendio

La 6-an de majo en la lasta jaro, kiam la plej granda incendio en la lastaj 40 jaroj okazis en la Granda Ŝing'an-montaro de la nord-orienta limregiono de Ĉinio, mi estis en ĵurnalista vizito en la urbo Harbin de nordorienta Ĉinio. Informiĝinte pri la montara brulego, mi ne tre miris, ĉar ĉiujare okazas brulo en la arbara regiono kun areo de 21.38 milionoj da hektaroj, kaj nur en la periodo post 1966 brulis 700-800-foje.


Estis neatendite, ke la incendio estis tiel furioza, ke la urbo Ĉjiĉjihar proksima al la Granda Ŝing'an-montaro baldaŭ ricevis informon sin prepari por akcepti vunditojn kaj transveturigi plagi-tojn. "Ho, serioziĝas la brulo!" Surprizite de la informo, mi veturis per helikoptero por urĝa helpo al la gubernia urbo Tahe minacata de la incendio. La loko distancas de la plej proksima flamo nur 30 km. kaj tie troviĝis la

Fajroestinga Ĉefkomandejo.

Kiam la helikoptero atingis la Grandan Ŝing'an-montaron, mi malsupren rigardis tra la luko kaj vidis, ke densa fumo ruliĝas, ĉie fajras, brulantaj arboj similas al kandeloj. La arbaroj ruinigitaj fariĝis karbaj deklivoj, antaŭe dikaj arbotrunkoj fariĝis nigraj kolonoj kaj iuj ankoraŭ fumas.

La piloto Kong Ŝjangju diris al mi: "Printempe en la arbara regiono aperis maloftaj alta

Novaj domoj en la plagita regiono





Ligno transportata aliloken

temperaturo kaj sekeco. La 6-an de majo, samtempe aperis kvin fajropunktoj, du el ili kaŭziĝis de arbaristoj, kiam ili ekfunkciigis segmaŝinon, de kiu eligita fajrero bruligis la superfluitan benzinon pro neatenta dono de benzino al la maŝino kaj arbojn. Aliaj du el ili kaŭziĝis de fumado de cigaredo kaj la kaŭzo de la kvina estis ne konita. Post okazaĵo de la incendio Kong Ŝjangju la unua surterigis sian helikopteron riske en fumo kun tre malalta videbleco kaj transportis al loĝantoj de Tahe la unuan kvanton da materialoj. Kiam la plagitoj en malfacila tempo vidis la helikopteron, nemalmultaj el ili larmis de emocio.

Nia helikoptero surterigis sur la Tahe-a Flughaveno. Tahe estas grava urbo norde de la Granda Ŝing'an-montaro. En tiu regiono kreskas ĉielskrapantaj arboj kaj prosperas herboj. Eĉ nur unu fajrero povas estigi incendion kaj ruinigi la urbon kun centmil loĝantoj. Enirinte la Fajroestingan Ĉefkomandemon, mi vidis ĉiujn en streĉa laboro.

Mi alvenis iom malfrue. Ĵus forveturis Li Peng, vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, inspektinte la plagitan regionon kaj

konsolinte la plagitojn. Ĉi tie la Ŝtata Konsilantaro ĵus finis la ĉelokan incendio-estingan kunvenon. La kunveno decidis venigi trupojn de la Liberiga Armeo, arbarajn policistojn, arbaristojn, sume 42 000 personojn por fari batalon kontraŭ la fajrego. Apenaŭ tri horojn post la kunveno jam alveturis pli ol 30 vagonoj plenaj de armeanoj de la nordorientaj provincoj. Baldaŭ en la orienta kaj okcidenta incendioj norde de la Granda Ŝing'an-montaro, ĉie vidiĝis armeanoj, kiuj manĝis kaj dormis sub la ĉielo kaj brave batalis kontraŭ la fajrego. Por gardi Tahe ili batalis en la incendioj sep diurnojn. Tian emocian scenon mi vidis propraokule. Tie troviĝis densaj arboj kaj altaj herboj, mankis vojo, la komandantoj kaj soldatoj piediris por observi fajrostaton. Ili kvietigis sian soifon per montakvo, glacio kaj eĉ betula suko. Militista surtuto estis por ili kaj vesto kaj litkovrilo.

La 19-an de majo, la orienta fajrego estis bridita. Kune kun la armeanoj por fortigi la okcidentan forton mi venis al la gubernia urbeto Mohe.

La 24-an de majo, decida batalo por estingi la okcidentan fajregon

okazis en la primitiva arbaro de Lauĝingou. Helpate de aerarmea aviadilo kaj artilerio, kiu pafis milojn da pluvigaj obusoj, la metea departemento faris artan pluvadon. Pluis sinsekve du tagojn. La armeanoj kaj popolanoj en pluvo kune estingis la flaman fajregon.

Forlasinte la plagitan regionon, mi vidis survoje, ke trajnoj kaj aviadiloj ankoraŭ transportas materialojn al la plagita regiono, fajroestingantoj ordigas incendiojn, estingas restan fajron. Ili fosis fajro-izolajn zonojn de 891 kilometroj. Arbaristoj komencis denovan forstumadon kaj reordigis nebruligitan lignon por trajne transporti la lignon al aliaj lokoj.

Kiam mi preterpasis la serioze plagitan urbeton Ŝilingĝi, oni diris al mi, ke en la urbeto troviĝas 22 000 plagitoj, ĉ. 10 000 virinoj, infanoj kaj maljunuloj fuĝis aliloken. La plagitoj posedis nenion krom la portataj vestoj. Ĉio uzata de ili estis sendita el diversaj lokoj. La plagitoj ĉiutage povas ricevi pokape 0.5 kg. da rizo, 1/4 kg. da biskvito, panon, kolbason kaj iam eĉ bieron. La loka registaro faris por la plagitoj zorgeman aranĝon kaj provizis ilin per ofidomoj kiel provizoraj loĝejoj. Ankaŭ la Ĝenerala Postfronta Servo-departemento de la Liberiga Armeo transportis al ili pli ol 4 000 tendojn kaj nombron da vestoj por garantii ilian vivon. Krome, la armeanoj ankaŭ helpis ilin en rekonstruado de la hejmloko. La plagitoj fuĝintaj al aliaj lokoj pere de la atesto donita de la registaro povas senpage ricevi vestaĵon, manĝaĵon, loĝi kaj veturi.

La plagitoj de la urbeto Ŝilingĝi jam vekiĝis el la timo estigita de la incendio kaj komencis konstrui domojn sur la ruinoj. Knabinoj en helkoloraj vestoj biciklis sur stratoj.

En la magazeno de la gubernio Mohe mi vidis, ke mezaĝulo aĉetas

elektran marmiton. Li diris, ke tia kuirilo estas pli sekura. Ankaŭ la vendisto diris, ke elektra marmito havas grandan debiton pro tio, ke pli kaj pli multaj familioj rekomencis normalan vivon.


En la 25 incendioj tagoj la flamo trapasis arbarareon de la Granda Ŝing'an-montaro de 1.01 milionoj da hektaroj kaj suferigis pli ol 50 000 loĝantojn, el kiuj mortis 193 kaj vundiĝis 226.

La incendio tuŝis la koron de milionoj da ĉinoj kaj ankaŭ vekis zorgon de multaj landoj en la mondo. Etendis helpan manon diversaj lokoj de la tuta lando. Laboristoj, kamparanoj, instruistoj, kadroj, eĉ lernantoj kaj infanoj donacis al la plagitoj diversajn materialojn. Ankaŭ iuj landoj, regionoj kaj internaciaj organizoj provizis ilin per materialoj.

Poste mi venis al la Forsta Ministerio en Pekino. Forstaj sciencistoj analizis: Se efikos la aplikotaj rimedoj, ankoraŭ estos utiligebla parto de la arbaro de la Granda Ŝing'an-montaro trapasita de la flamo. La incendio reduktis la lignan produkton je nur 2% de la totala ligna produktokvanto de Ĉinio, tial la incendio ne faros seriozan influon al la lignomerkato.

Iu respondeculo de la Forsta Ministerio diris al mi, ke la arbara incendio, kiu kaŭzis gravan damaĝon, estis rezultigita de ĥaosa administrado, malrigora disciplino kaj kontraŭregulara manipulado, sed la radika kaŭzo estis serioza burokratismo de la gvidantoj.

Antaŭ la arbara incendio, la ĉina fama botanikisto prof. Hoŭ Ŝjueju, post esploro en la Granda Ŝing'an-montaro, avertis la registaron de la provinco Hejlongĝjang en kunveno de Harbin kun mil partoprenantoj: "En la forsta regiono la kontraŭfajraj instalaĵoj estas tro malbonaj, mankas observaj turoj, aŭtoj, motor-



Banko refunkcias post la plago.

bicikloj, radiostacioj, kontraŭfajraj ŝoseoj, ne sufiĉas precipe observaj turoj kaj radiostacioj. Iam oni eĉ erare raportis fajroalarmon, por ne paroli pri fajroestingo per aviadilo." Duonjaron antaŭ la incendio iu gvidanto venis al Mohe. Li vidis ĉie domojn kun muroj el dutavolaj plektitaj lignaj splitoj ene kun argilo, barilojn el tabuloj, hejt-lignon amasigitan en kaj ekster korto, kaj atentigis koncernajn departementojn, se okazos brulo en Mohe, ĉu ĝi ne forbruligos la tutan urbon! Antaŭ kelkaj tagoj de la incendio, la meteostacio jam avertis, ke en la Granda Ŝing'an-montaro ventegos ofte kaj longtempe sub la influo de la aerofluo de Bajkalo. Tamen tiuj avertoj ne vekis altan atenton de la koncernaj departementoj. Nun, la forstaj departementoj faras kontrolon pri la incendio, ĉerpas lecionon, plifortigas forstan administradon kaj plibonigas fajro-preventajn kaj -estingajn rimedojn kaj ekipaĵojn. La ministro Jang Ĝong kaj vicministro Dong Ĝijong de la Forsta Ministerio kulpis je serioza burokratismo kaj estis eksigitaj. Estis punitaj ankaŭ la lokaj ĉefaj gvidantoj responsaj pri la incendio.

Nun la plagita regiono de la Granda Ŝing'an-montaro restarigis produktadon kaj komencis reconstruadon. Ĝis la mezo de la lasta septembro, sur la ruino oni konstruis diversaspecajn domojn de 370 000 kvadrataj metroj, inkluzive de loĝdomoj de 330 000 kvadrataj metroj. Pli ol 50 000 plagitoj transloĝiĝis en novajn domojn. Refunkciis ankaŭ lernejoj, vendejoj, bankoj kaj poŝtoŝtancoj, restarigis la ŝoseoj, pontoj kaj kulvertoj, telekomunikaj kaj elektraj lineoj kaj estas en riparado ankaŭ la produktaj ekipaĵoj de 5 lindejoj kaj arbaraj fervojoj difektitaj de la fajrego. Iuj forstaj fakuloj avertis, ke la nordorienta arbaro delonge frontas al ekologia kaj riĉfonta krizo, kiujn sendube pliigis la incendio. Ili taksis, ke la venontaj pli ol dek jaroj ĝis la fino de la kuranta jc. estos la plej malfacila periodo de la ĉina forsta industrio. Se oni ne aplikos rezolutajn rimedojn por protekti la arbarojn kaj rimedon anstataŭigi lignon per karbo en la forstaj regionoj, pliserioziĝos la ekologia ekvilibro en la arbaraj regionoj. Ili alvokas, ke oni donu al la nordorienta forsto 20 jarojn por fari reordigon kaj protekti la verdan trezorejon. ■

Esperanto — scienco — biblioteko

Scienco kaj tekniko kiel komuna riĉaĵo de la homaro ne konas landlimon kaj alportas feliĉon al la tuta homaro. La flugrapida antaŭensalto kaj tago-post-taga ŝanĝiĝo de la modernaj scienco kaj tekniko prezentis senprecedencajn postulojn al la mondsfera komunikado kaj interŝanĝo de scienco kaj tekniko en vasteco, profundeco kaj rapideco. Kiel produktaĵo de la homa civilizacio, la bibliotekoj, trezorejoj famaj pro kolektado, ordigado, konservado kaj komunikado de historiaj dokumentoj kaj materialoj, havas ĉiam pli grandan

rolon en komunikado de scienc-teknikaj informoj kaj ekspluatado de intelektaj riĉfontoj en la nuna epoko de informoj.

Por akcepti la defion de la industria revolucio kaŭzita de la disvolviĝo de la modernaj scienco kaj tekniko, oni bezonas rapide akiri la plej novajn internaciajn informojn pri scienco kaj tekniko kaj legi grandan nombron da sciencaj kaj teknikaj dokumentoj. Por akceli rapidan disvolviĝon de la nacia ekonomio, la evoluantaj landoj des pli bezonas akiri novajn sciencajn kaj teknikajn informojn kaj lerni avangardajn spertojn de

la industrie evoluintaj landoj.

Sed en la mondsfera reciproka lernado kaj interŝanĝo de scienc-teknikaj informoj oni renkontas antaŭ ĉio la lingvan baron. Tiu baro pli kaj pli evidentiĝos kun la plurfaka interpenetriĝo en la disvolviĝo de la modernaj scienco kaj tekniko. Ofte okazas, ke scioj de iu fako estas prezentitaj en dekelkaj kaj eĉ pli ol cent libroj kaj gazetoj de malsamaj kategorioj kaj en malsamaj lingvoj. Laŭ takso, pli ol 6 000 disertaĵoj en diversaj lingvoj estas publikigitaj ĉiujare kaj unu nova libro eldonita ĉiuminute en la mondo. Kontraŭ la drasta kresko de la nombro de dokumentoj en diversaj lingvoj la homoj ĉagrenitaj de malfacila lingvolernado vespiras, ke la homa vivo ne estas longa, sed scioj multaj.

Granda nombro da lingvoj kaŭzas komplikajon al la bibliotekoj en ilia kolektado, ordigado, komunikado kaj uzado de libroj, gazetoj kaj historiaj dokumentoj. Ekz., "Resumoj de Kemiistoj" de Usono servas kiel serĉilo de kemiaj dokumentoj por havigi al la legantoj serĉajn metodojn kaj liveras 11 400 000 artikolojn ĉiujare. Ĝi kolektas 1 044 gazetojn de 136 landoj en 56 lingvoj kaj patentajn dokumentojn de 26 landoj. Ĝi estas eldonata en la angla lingvo, tial oni devas traduki tiujn lingvojn unue en la anglan. Se oni serĉas en ĝi per la ĉefa

Scienc-teknikaj eldonaĵoj en Esperanto





Prof. Io Chou (dekstre)

metodo, ĝi do estas limigita por la landoj ne uzantaj la anglan lingvon. Tia ripetita laboro estas vere grandega malŝparo de tempo kaj energio de homoj.

Nun la bibliotekoj devas mem aranĝi dokument-serĉilojn aŭ uzi la pretajn por liveri al sciencistoj kaj teknikistoj aŭ koncernaj fakoj bezonatajn informojn. Oni faras aranĝon aŭ serĉon laŭ fakaj enhavoj ĉefe per klasifiko kaj temo kaj ankaŭ per titolo de libro aŭ indekso de aŭtoroj. Ne nur la klasifika metodo, kiu jam enkodigis fakajn temojn uzatajn de la bibliotekoj en la mondo, havas iom da lingvobaroj, sed ankaŭ serĉado laŭ temoj, titoloj de libroj aŭ indeksoj de aŭtoroj havas lingvobaron.

Lingvobaro ekzistas ne nur en la biblioteka komunikado, sed ankaŭ en la komunikado de amaso da informoj en radio kaj televido, kaj serioziĝas tagon post tago.

Tial multaj prudentuloj antaŭlonge trovis urĝa kaj necesa krei internacian komunan lingvon parolatan de la tuta homaro. En tiu senco, Esperanto jam ne estas fantazia idealo, sed komuna deziro de la tuta homaro kaj nepra

sekvo de la disvolviĝo de la epoko.

En la pasinta jarcento estis ĉ. 300 projektoj de internaciaj lingvoj. Sed ĝis nun nur Esperanto kreita de Zamenhof en 1887 eltenis la elprovon de tempo. Ĝi estas logika kaj facile lernebla kaj jam fariĝis unu el la plej normaj lingvoj por komputilo.

Kial Esperanto ankoraŭ renkontas diversajn malhelpojn dum sia disvastiĝo? Laŭ mia opinio, la ĉefa kaŭzo kuŝas en tio, ke ĝi ankoraŭ ne okupis gravan lokon en la scienc-teknika kampo. Ekz., en nia urbo Suĝoŭ estas homoj, kiuj opinias Esperanton senutila kaj ĉesis ĝin lerni. Fakte nun oni ankoraŭ ne rekte profitas el tio, kaj Esperanto ankoraŭ ne montris sian gravan signifon en la ĉiutaga vivo, scienco kaj produktado. Eĉ en filatelo kaj turismo ĝia rolo estas malgranda. Pro tio estas malfacile forigi la antaŭjuĝon de homoj.

Ĉu Esperanto vere estas senutila? Kompreneble ne. Esperanto ne estas senutila. Oni ankoraŭ ne konas ĝian praktikan valoron, kio estas la ŝlosila problemo. Se la sciencistoj penas apliki Esperanton en la scienc-teknika kampo, por ke oni povu rekte profiti el Esperanto por akcelo de inform-komunikado kaj antaŭenigo de scienco kaj tekniko, do oni certe traktos Esperanton kun nova respekto. Ni jam vidis, ke Esperanto ludis gravan rolon en komunikado de pensoj kaj akcelo de paco en la pasintaj militaj jaroj kaj kontribuis al la naciliberiga batalo de iuj landoj. Hodiaŭ, en la nova epoko, Esperanto povas ekzisti, nur se ĝi adaptiĝas al la nova situacio de scienco kaj tekniko, kaj ĝi povas disvolviĝi, nur se ĝi havas lokon en la scienc-teknika kampo kaj estas vaste uzata en ĝi. Ni prenu bibliotekon kiel ekzemplon. Por serĉi koncernan scienc-teknikan dokumenton en granda kvanto da materialoj, esploranto devas uzi 1/3 aŭ 1/2 de la tuta tempo por

esplorado. Tio signifas, ke pli ol 300 000 el miliono da sciencist-teknikistoj devas longtempe sin okupi pri serĉado. Se oni reduktas tiun tempan malŝparon je 20%, tio signifas, ke la nombro de sciencist-teknikistoj pliiĝos je 200 000. Se oni reduktas tiun ripetitan laboron ĝis minimuma grado, tio signifas, ke oni multe pliiĝos riĉaĵon por la socio. Ĝuste Esperanto povas ludi sian rolon en kolektado, ordigado kaj prilaborado de diversaj dokumentoj kaj materialoj de homoj kaj en ilia inform-komunikado. Ĝi helpas ĉiujn membrojn de la socio, kiuj deziras akiri informojn pri kulturo, scienco kaj tekniko kaj liberigi sin el la tempo, energio kaj financo dediĉitaj al serĉado kaj tradukado.

La loĝantoj de Ĉinio konsistigas kvinonon de tiuj de la mondo. Se Esperanto estos disvastigata kaj aplikata en Ĉinio, tio signifas, ke kvinono de la monda loĝantaro jam aplikos Esperanton, kio havos netakseblan influon. En tiu senco, ne estas senbaze, ke iuj el la internaciaj Esperantaj organizoj metas esperon disvastigi kaj apliki Esperanton sur Ĉinion. Ni ne devas vanigi ilian esperon. En tiu flanko fama ĉina entomologo prof. Io Chou donis brilan ekzemplon. Li publikigas siajn scienc-esplorajn artikolojn en Esperanto kaj faras resumon en Esperanto en la de li redaktata periodaĵo. Nun iuj mezaĝaj kaj junaj sciencistoj pri aliaj fakoj verkas disertaĵojn en Esperanto kaj kompilas Esperantajn fakajn vortarojn. Se pli da tiaj fervoraj sciencistoj kaj fakuloj senlace laboros por apliki Esperanton en la scienc-teknika kampo, do Esperanto certe estos esperoplena. Pro tio ni alvokas: Ĉiuj esperantistoj de la internaciaj Esperantaj scienc-teknikaj rondoj unuanime laboru kaj alte tenu Esperantan standardon en sia kampo! ■

*La aŭtoro estas juna esperantistino en la urbo Suĝoŭ.





RUDOLF BURMEISTER
(GDR):

La faka asocio ELF/AREK



Esperantaj stampoj

Unu el la diversaj fakaj asocioj, kiuj kunlaboras kun UEA, estas la "Esperanto-Ligo Filatelista/Amika Rondo de Esperantaj-kolektantoj" (ELF/AREK). Ĝi kunigas filatelistojn, kiuj kolektas la temon Esperanto, kaj kolektantojn de glumarkoj kaj insignoj. La prezidanto de tiu klubo fondita en 1968 kun cent tridek membroj en 35 landoj estas Ivar Paulsson en Svedujo.

La ilustrita kluba informilo "La Verda Lupeo/Fenikso" informas pri novaj kaj malnovaj Esperanto-filatelajoj. En decembro 1987 aperis la 73a numero. Ĝia redaktoro estas Rudolf Burmeister en Germana Demokratia Respubliko.

La Esperanto-filatelio estas tre larĝa temo kaj por regi ĝin necesas profunde studi la historion. Sperta Esperanto-filatelisto kolektas ne nur la Esperanto-poŝtmarkojn, sed ankaŭ aliajn poŝtmarkojn iel ligitajn al tiu temo, poŝtajn stampojn kaj poŝtajn tutajojn. Tiel ni kolektas poŝtmarkojn pri Galenus, Hildegardis, Nostradamus, Cartesius, Comenius, Leibniz k.a., kies nomoj estas ligitaj kun klopodoj pri universala lingvo. Tre longa estas la vico de poŝtmarkoj pri famaj Esperantistoj (ekz. Janos, Tito, Ciolkovski, Ostwald, Barton) kaj famaj amikoj de Esperanto (ekz. Lusin, Einstein, Gorki, R. Rolland, L.

Tolstoj kaj Tagore).

Speciale interesa estas la vasta kampo de la poŝtaj Esperantostampoj. Dank' al la internacia kunlaboro de Esperanto-filatelistoj eblis krei katalogon pri tiuj stampoj, kiu notas datojn pri 676 stampoj. Pri la 1983-eldonita "Katalogo de Poŝtaj Esperantostampoj" aperis recenzoj en pluraj filatelaj gazetoj. D-ro Giso Brosche skribis pri ĝi i.a. en "der esperantist" numero 125: "...tiu ĉi katalogo, kiu eltenas komparon kun la plej bonaj temaj katalogoj ne nur estas valora helpilo por kolektantoj, sed eĉ kondiĉo por serioza filatela agado sur tiu ĉi speciala kampo..." La stampoj informas pri naciaj kaj internaciaj kongresoj kaj pri multaj jubileoj de Esperanto aŭ pri la agado de UEA, SAT, IFEF, IKUE k.a.

Tre grava parto de la Esperanto-filatelio estas la multaj poŝtaj tutajoj. Tio estas poŝtaj kartoj kaj kovertoj kun surprisaj poŝtmarkoj, kiuj posedas surprisajn tekstojn en aŭ pri Esperanto. Inter ili ni trovas bildpoŝtkartojn el Hungario kaj Brazilo, la Esperanto-poŝtkartojn de Pollando kaj Dancigo kaj poŝtkartojn el Sovetunio kun la teksto "Poŝta karto kun afrankita respondo". La de Vladimir Vana kompilita katalogo de tutajoj notas 690 poziciojn. Ankaŭ tiu ĉi katalogo estas rezulto de multjara esplorado kaj serĉado de la

Esperanto-filatelistoj de multaj landoj.

Momente ni kompilas suplementon por la tutajkatalogo de Vana, en kiu trovas lokon pri tiel nomataj "duonoficialaj tutajoj". Tio estas poŝtaj kartoj kun esperantorilataj tekstoj, kiujn surprisis propagandcele organizoj. En GDR ekz. aperis dum la lastaj jaroj pli ol 40 de tiuj. Ili rakontas pri konferencoj, famaj esperantistoj, pri la "Tago de Esperantolibro", pri la agado de la Esperanto-medicinistoj kaj multaj aliaj aferoj.

En Esperanto-Ligo Filatelista membras vico da filatelistoj, kiuj kapablas komponi el la supre cititaj filatelaj materialoj unikajn filatelajn ekspozaĵojn pri Esperanto. Ili daŭre trovas lokon en naciaj, internaciaj kaj eĉ en la plej altrangaj tutmondaj filatelaj ekspozicioj. Al tiuj sukcesaj ekspozantoj apartenas Song Shengtan en Ĉinio, Dolfa Bartošik en Ĉeĥoslovakio, Stefan Bialek en Pollando kaj d-ro Koether en GDR.

En mia filatela Esperanto-ekspozajo, kiu pro la filatelaj reguloj ampleksas 70 paĝojn, trovis lokon sur pluraj paĝoj ankaŭ la agado de la ĉinaj esperantistoj. Por tio mi uzis la poŝtkartojn pri Lusin kaj pri la Maŭ-eldiro en Jan'an en 1939. Sed ankaŭ kovertojn de ĈEL, de Radio Pekino kaj de Guoji Shudian. Ankaŭ eblis loki Esperanto-korespondaĵojn de la nun en Berlino loĝanta Karl kaj Hedel Maier, kiuj dum jardekoj vivis kaj laboris en Ĉinio. Interesa filatelaĵo en ĝi estas simpla gazeta koverto de la gazeto "La Verda Lumo", sendita de Pandišo en 1922 aŭ 1923 al esperantisto en Leipzig.

Tiel do ni Esperanto-filatelistoj de ELF/AREK laboras, kaj ni klopodas agadi ĉefe en la filatelista mondo, kie ni povas atingi vastan publikon por popularigi la centjaran Esperanton. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Wu Shihong (22-j.) komencanto, fraŭlo, fotisto dez. kor. kun geesperantistoj de la mondo pri ĉiuj temoj en Esperanto. Adr: Anhui Sheng, Shi Tai Xian, Peng Lai Xian Dong Guanlichu.

* 25-j. kursano de la Ĉina Koresponda Esperanto-Instituto deziras korespondi kun geesperantistoj pri geografio, historio, kulturo, moderna vivo de junularo ktp. kaj kolektas bildkartojn kaj librojn. Adr: Wang Yunjie, Fenshui Liang Guan-suo, Tonglu, Hangzhou, Zhejiang, Ĉinio.

* Qiu Jinping 28-j. dez. kor. kun geamikoj el ĉiuj landoj kaj kolektas p.m., p.k., glumarkojn kaj novjaran koverton pri Esperanto, Kristnasko, mond fama pentraĵo, pejzaĝo k.a. Adr.: Jiancaichang, Jianzhu Gongcheng Gongsi, Gezhouba Gongcheng Ju, Yichang Shi, Hubei, Ĉinio.

* S-ro Feng Daqing (35-j.) dez. kor. tm. Esperante, angle kaj ĉine pri ĉ.t., kaj interŝanĝi pm. pk. bk. kalendarbildojn ktp. Adr.: Huangshan Linxiao, Tunxi, Anhui, Ĉinio.

* Hannes Lampvecht deziras korespondi pri ĉ.t. kaj el ĉ.l. Dstv. 79, GDR-2131 Dedelow.

* 23-jara studento dez. kor. tutmonde ĉefe en Azio kaj Sudameriko pri ĉiuj temoj. Ravary François, 25 rue des Tulipes, Trelissac, 24750 Périgueux, France.

* Sinkrone kun Centjara Jubileo de Esperanto viaj S-anoj el Irano organizis serioze kursojn por la ĝenerala lernado de Esperanto en Maŝhado. Ili bezonas diversajn lernolibrojn. Bv. sendi vian baldaŭan helpon al Djavad Kamali, Saadabad Szuare, AEM, Pars Pharm-91846, MASHHAD, Irano.

* IRANAJ BILDKARTOJ 10 koloraj bildkartoj pri diversaj vidaĵoj de Irano, estas aĉeteblaj (kvar IRK por unu serio) ĉe Manoochehr Zeynali, Dox 5715, 11365 Tehran, Irano.

* Por filatelistoj neuzitaj poŝtmarkoj kontraŭ IRK (1 IRK-45 Rialoj) estas vendataj ĉe M. Tashakori, Box 11365-5715, Tehran, Irano.

* S-ro Wieslaw BEYROWSKI, 49-j., p.ĉ.t., kolektas E-librojn, insignojn, KARATE-librojn, revuojn, muzik-kasedojn k. diskojn, b.k., p.m., monerojn. Resp. ĉiam certa. Adr.: Poŝtkesto 37, PL-84-300 LEBORK, Pollando.

* Esperanto-kursanoj el Brazilo deziras korespondi kun geesperantistoj de la mondo. Kontakto kun ili pere de la instruisto Macário da Silveira, AOS 01-Bloco F-apt 111, Área Octogonal Sul, 70.650-Brasilia, DF, Brazilo.

* Peter Bielack (31-j.) komencanto, kuiristo deziras korespondi kun geesperantistoj. E.-Thälmann-Str. 49, Graal-Müritz, 2553, GDR.

* S-ro Jerzy Skórzewski (35-j.), juristo, ul. Koninska 10, PL-62-560 Skulsk, Pollando, dez. kor. tm. pri diversaj temoj kaj interŝanĝi p.m. kaj b.k.

* 33-jara inĝeniero dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. S-ino Monika Jöstel, Block 412/3, Halle-Neustadt, 4090-GDR.

* Emerita inĝeniero deziras korespondi kun gesamideanoj tutmonde kaj interesiĝas pri alternativaj energiaj fontoj, bicikla turismo, naturo. Don Dickinson, Ivy House, Ousby, Penrith, Cumbria CA10 1QA, Britio.

* Mi deziras korespondi tm. pri ĉiuj temoj Angle, Esperante kaj Perse, kaj interŝanĝas ne stampitajn poŝtmarkojn (speciale usona, germana, hungara, angla, japana kaj franca). Reza Tashakori, Box 11365-5715, Tehran, Irano.

* Anoj de Alagoana Asocio de Esperanto dez. kor. tm. pri ĉ. t., kaj interŝanĝi pk kaj pm. Av. Fernandes Lima, S/nº-CEAGB-Farol-57.055-Maceió-AL-Brazilo.

* Du studentoj dez. kor. Jozef Zinkler kaj M. Mehri, P.O.B 455, Zanjan, Iran.

EKFUNKCIIS LA 7-A E-KURSO POR INSTRUISTOJ

En septembro 1987 ekfunkciis la 7-a E-kurso por instruistoj el altlernejoj organizita de la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto komisiita de la Eduka Komisiono de Ĉinio kaj la Ĉina Esperanto-Ligo. Ĝiaj lernantoj venis el altlernejoj de diversaj provincoj kaj urboj kaj iuj el ili estis rekomenditaj de lokaj E-organizoj.

ALTGRADA E-KURSO EN PEKINO

La altgrada E-kurso estis starigita de la Sciencista-Teknikista E-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj iu profesia universitato sub la sankcio de la instanco de la pekina porplenaĝula eduko. Ĝi akceptis 28 abiturientojn kaj ekfunkciis en la 20-a de septembro 1987.

"LA ESPERO" ELSENDITA DE LOKAJ RADIOJ

La unua ĉina surbenda Esperanta kanto "La Espero" estis elsendita de iuj provincaj kaj urbaj radioj. Antaŭ la elsendo oni prezentis tiun kanton.

LA UĜOŬ-A E-ASOCIO FONDITA

La Uĝoŭ-a E-Asocio de la

Guangŝi-a Ĝuang-naieca Aŭtonoma Regiono fondiĝis en Aŭgusto 1987. Ĝiaj membroj dissemiĝas en la Urbo Uĝoŭ kaj ties 8 gubernioj. La 16-an de aŭgusto 1987 okazis ĝia fondkunveno, kiu aprobis ĝian statuton kaj elektis 17 personojn kiel ĝiajn konsilantojn kaj konstantajn komitatanojn.

IRANA TRADUK-CENTRO FONDITA

Okaze de la centjara jubileo de Esperanto fondiĝis en Irano la Irana Traduk-Centro (ITC), kiun kreis kaj prizorgas gesinjoroj Ŝirin Ahmad-Nia kaj Ahmad R. Mamduhi (Ŝanarm). ITC eklaboris en aŭgusto 1987 kun 25 kunlaborantoj, inter kiuj troviĝas profesoroj, inĝenieroj, licenciuloj, studentoj kaj aktivuloj en diversaj branĉoj.

ITC bonvenigas Esperantajn referaĵojn, bultenojn, librojn kaj gazetojn sciencajn kaj beletrajn el la tuta mondo por eventuale prezenti, traduki kaj aperigi en Irano laŭ la interkonsento. ITC bonvenigas ankaŭ la komentojn, proponojn, kunlabormesaĝojn, helpojn kaj korespondaĵojn

de la Esperanto-organizoj, eldonejoj, fakuloj kaj aliaj. Skribu al: Irana Traduk-Centro, Kh. Zafar, Kh. Khojand, K. Dolatshad, K. Iraj 33, Tehran 19-166, Irano.

KONTAKTSERVO POR DIABETULOJ


En la industriaj landoj ĉ. 3% de la loĝantaro jam suferas de diabeto. Pro tio ni volas krei forumon por esperantistoj, kiuj suferas de tiu malsano. En kunlaboro kun la Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj ni peras kontaktojn inter diabetuloj tutmonde por interŝanĝi spertojn tiurilatajn. Interesatoj bonvolu turni sin al: Andreas Iämmel, J.R.-Becher-Str. 11, Leipzig, 7030, DDR.

E-EKSPOZICIOJ EN RUEIL-MALMAISON

Gesinjoroj Ludoviko kaj Zorka ENIZAN ĉiujare ekde 1972 eksponas Esp-materialojn okaze de la kulturaj manifestacioj, ekz. "Forumo de la Asocioj", "Sporta Festo", "Festo por Infanoj" k.a. en Rueil-Malmaison, Francio. Esperanto-ekspozicion aran-

Filatelaj tutajoj omaĝe al la centjarigo de Esperanto. La supra estas emisiita de Sovetunio, la meza de Pollando kaj la malsupra de Malto.

La aktivado "Esperanta Angulo" organizita de la altgrada E-kurso de Pekino



ĝas ankaŭ la Esperanto-grupo en la Instituto Franca de Petrolo en la sama urbo. Adr.: 44, strato Dr Guionis, 925000 RUEIL-MALMAISON, Francio.

VEGETERANA RENKONTIĜO

Ĉiujare, dum 30.8-5.9, en Dudince, Ĉeĥoslovakio okazas renkontiĝo de tutmondaj gevegetaranoj kaj naturamikoj. Oni povas resti libervole longe post tiu dato. Informpeton skribu al s-ano Ernesto Vana, CS-962 71, Dudince, Ĉeĥoslovakio.

POŝTMARKOJ EN LA JUBILEA JARO

Okaze de la centjariĝo de Esperanto poŝtmarkoj pri Esperanto estis emisiitaj ankaŭ en Malto, Sovetunio kaj Pollando. Ĉi-foje ni prezentas la filatelan tutajon emisiitan la 27-an de januaro 1987 en Sovetunio.

NEKROLOGO


Fame konata sovetia veterana esperantisto Sergej Nikolajevič Bojev forpasis en la 12-a de junio 1987 en Alma-Ata.

Al la familio de s-ano Bojev la redakcio de El Popola Ĉinio sendas koran kondolencon.



Ĉinaj esperantaĵoj sur la stando "Esperanto" dum la "Forumo de la Asocioj"

S-ro Menuet (meze sidanta), vicurbestro de Rueil-Malmaison, vizitas la standon "Esperanto" dum la "Forumo de la Asocioj" okazigita la 4-an de aprilo 1987 en la urbo. Dekstre sidas s-ino Zorka Enizan kaj maldekstre staras s-ro Ludoviko Enizan.



Bonaj gejunuloj

La rakonto cirkulis en la urbeto Singlong de norda Ĉinio.

En la urbeto troviĝas magazeno, en kiu laboras bela knabino Cujljan. Ŝi estas 26-jara. Ŝin tre amas la gepatroj. La amato de Cujljan decidis viziti ŝian familion en dimanĉo, tial ŝiaj gepatroj faris streĉan preparon por bone regali la gaston.

Matene de la tago Cujljan ellitiĝis tre frue kaj biciklis al bazaro kun legomlisto skribita de ŝia patro. Kiam ŝi atingis voj-kurbigon, ŝi trovis pakajeton sur la tero. Ŝi prenis ĝin kaj vidis en ĝi

monbileton en valoro de 50 jŭanoj, ĉirkaŭvolvitan per monhempa atestilo. La atestilo montris, ke la perdinto estas Sun Fu, laboristo de maŝina fabriko. Li longe suferas de malsano kaj havas multe da ŝuldo. Cujljan pensis en si: La malsanulo certe bezonas urĝan helpon kaj brule maltrankviliĝas pro la perdo. Ŝi tre simpatiis kun Sun Fu, tamen ŝi ekhezitis inter du solvoj: Ŝi timas, ke, se ŝi unue donos la monon al la perdinto, ŝi perdos tempon aĉeti legomojn; kaj ke, se ŝi unue faros aĉetadon, la perdinto maltrankviliĝos. Post pensado ŝi decidis unue doni la monon al la perdinto.



Ŝi biciklis rekte al loĝejo de laboristoj de la maŝina fabriko kaj trovis la domon de Sun Fu. Ŝi frapis je la pordo, kaj eliris el la ĉambro pli-ol-50-jara virino. La virino, rigardinte la junulinon de la kapo ĝis la piedoj, afable demandis: "Kiun vi volas, knabino?" Cujljan respondis: "Ĉu ĉi tie loĝas Sun Fu, onjo?" La lasta diris: "Jes. Bonvolu eniri!" Enpaŝinte la ĉambron, ŝi vidis, ke en la lito kuŝas malsanulo. Kredeble li estas Sun Fu. Ŝi rakontis al li la aferon. Poste ŝi elpoŝigis la monon kaj donis ĝin al li. Sed Sun Fu ne komprenis tion kaj demandis: "Ĉu vi ne eraras, knabino? Hieraŭ vespere Ŝjaŭgaŭ de la sindikato de la fabriko jam donis al mi la helpmonon." Cujljan diris: "Jen, via monhempa atestilo!" Post momenta pensado Sun Fu diris al sia edzino: "Venigu Ŝjaŭgaŭ kaj demandu, kio okazis." Post nelonge Ŝjaŭgaŭ venis. Montrante la monon kaj la knabinon, Sun Fu demandis: "Kio okazis, Ŝjaŭgaŭ?" Vidinte tion, Ŝjaŭgaŭ diris honteme: "Multan dankon, Cujljan!"

Ŝjaŭgaŭ diris, ke posttagmeze de sabato, Ŝjaŭgaŭ prenis la helpmonon de la sindikato kaj hasteme biciklis al la hejmo de Sun Fu post la laboro. Atinginte la domon de Sun Fu, li trovis, ke la mono perdiĝis. Tiam jam mallumiĝis. Li serĉis kaj serĉadis, sed ne trovis la monon, li ŝvitis de maltrankvilo. Li pensis en si: Se mi dirus la veron al majstro Sun, lia malsano certe graviĝus; mi ne kunportas tiom da mono. Kion mi faru, se mi ne dirus la veron? Fine li prunteprenis 50 jŭanojn de sia onklino kaj ĝin donis al majstro Sun.

La faro de la gejunuloj profunde kortuŝis la geedzojn Sun Fu. Sun Fu iom sin levis kaj forte manpremis kun ili dirante: "Bonaj gejunuloj, bonaj gejunuloj!"

Ŝjaŭgaŭ estis neniu alia ol la amato de Cujljan. Ili ambaŭ forlasis la domon de Sun Fu kaj biciklis al la bazaro. ■

“Dankon al vi, frateto!”

Iun matenon, kiam pliaĝa fratino de Ŝjaŭĉjang estis manĝanta, li subite enpaŝis la ĉambron.

“Franjo, franjo, kie estas mia kateto Hŭahŭa?” Demandante Ŝjaŭĉjang serĉis la kateton en la ĉambro.

“Mi ne vidis!” respondis la fratino.

“Ho ve! Mia Hŭahŭa perdiĝis!” Lia vizaĝo ruĝiĝis de maltrankvilo kaj la okuloj estis plenaj de larmoj.

“Pro kio vi serĉas la kateton?” demandis la fratino. “Mi kaptis aron da hirundidoj ĉe onklino por la kateto.” Ŝjaŭĉjang elpoŝigis kaj montris ilin al la fratino.

“Kvivit! Kvivit! Kvivit!” pepis la hirundidoj kaj larĝe malfermis la bekojn.

“Kion ili diras, franjo?” demandis Ŝjaŭĉjang.

“Ili vokas: ‘Panjo! Panjo! Mi bezonas vin!’ Vi ploris pro perdo de la kato, pensu, kiel malĝojaj estas la hirundidoj, kiam ili ne trovis sian panjon! Ĉu vi scias, ke la hirundo estas utila birdo, kiu manĝas fiinsektojn kaj protektas plantojn?”

Gapante momenton, Ŝjaŭĉjang diris: “Mi remetiu ilin en la neston.”

“Bone, mi serĉu la kateton por vi, sed ni nutros ĝin per fiŝeto, ĉu bone?”

Aŭdinte tion, Ŝjaŭĉjang tuj reportis la hirundidojn al ilia nesto.

Enirinte la kuirejon, li vidis, ke Hŭahŭa manĝas fiŝeton. Kun

larĝe malfermitaj okuloj, li ridis: “Kie vi kaŝis vin, petolulo?”

Tiam aŭdiĝis pepado de hirundidoj. Ŝjaŭĉjang refoje demandis al

la fratino: “Kion diras la hirundidoj?” La fratino respondis: “La patrino de la hirundidoj revenis kaj diris: ‘Dankon al vi, frateto!’”



Ŝirkalendaro 1988

Eldonita far la

Nederlanda
Esperanta
Junularo

kaj tio
kostas nur:

F 7,50

gafrankej

Ankaŭ eblas aĉeti malmultekoste
dum kongresoj (jkb,uk,io)

Multaj junaj esperantistoj el la tuta lando
kune verkis Unikan Ŝirkalendaron!
Ĝi estas plenplena de:

- *historioj
- *enigmoj
- *afarismoj
- *bildrakontoj
- *receptoj
- *desegnoj

MIENIDILLO

kvanto: _____
nomo: _____
adreso: _____
postkodo: _____
leĥo: _____
lando: _____
subskribo: _____

sendu al: N.E.J.
de la strato 17
6526 km Nymegen
Nederlando

La Pekina Biblioteko marŝanta al moderneco



La nova Pekina Biblioteko

Norde de la pitoreska parko Ĝardeno de Purpura Bambuaro en la okcidenta antaŭurbo de Pekino aperis granda dom-grupo okupanta 7.42 hektarojn kaj plankareon de 140 000 kvadrataj metroj. Ĝi estas la nova sidejo de la Pekina Biblioteko, malpli granda ol la Biblioteko de Usona Parlamento, kaj la dua granda en la mondo.

LA NOVA KAJ MALNOVA SIDEJOJ DE LA BIBLIOTEKO

La Pekina Biblioteko estas ŝtata

biblioteko, kaj ĝia malnova sidejo situas okcidente de la parko Bejhaj en la urbocentro. Ĝia konstruado komenciĝis en 1909 kaj malfermiĝis al la publiko en 1912 nur per cent mil libroj. Post malrapida disvolviĝo dum dekoj da jaroj, la libraro kreskis ĝis 1.4 milionoj en la jaro 1949. De tiam rapide grandiĝis la libraro kun jara meznombra kresko de 300 mil libroj kaj gazetoj. En 1973 la libraro nombris pli ol 9 milionojn da ekzempleroj, kaj de tiam la biblioteko ne povis akcepti plu

novajn librojn pro manko de tenejoj. Ankaŭ la legoĉambroj ne povis akcepti pli kaj pli kreskantan legantaron. Tio instigis konstrui novan bibliotekon.

Por konstrui la novan bibliotekon, oni faris komparon inter multaj projektoj pri la situo, skalo kaj diversaj konkretaj konstruoj. La nova sidejo estis fundamentita en 1983, finkonstruita en la 1-a de julio 1987 kaj malfermita en la 6-a de oktobro samjare.

La totala areo de la nova kaj

malnova sidejoj de la Pekina Biblioteko superis 170 mil kvadratajn metrojn kaj povas enteni 20 milionojn da libroj. En la nova sidejo servas 36 legoĉambroj kun pli ol 3 000 sidlokoj, kiuj ĉiutage povas akcepti 7-8 mil legantojn.

KONSTRUAĴARO KUN NACIA STILO

La nova sidejo de la Pekina Biblioteko estas grupo da konstruaĵoj karakterizitaj per stilo de la ĉina nacio. Ĝi konsistas el 13 konstruaĵoj. La centro estas la ĉefa librotenejo en H-formo. La 61-metra domego kun 22 etaĝoj (19 etaĝoj surtere kaj 3 subtere) havas totalan plankareon de pli ol 50 mil kvadrataj metroj. Sude kaj norde de la ĉefa librotenejo staras po unu 27-metre alta domo interligata kun la ĉefa domo. La suda domo konsistas el ĉambro kun ĉinaj eldonaĵoj, kataloga ĉambro k.a. La norda domo konsistas el ĵurnala tenejo, vid-aŭd-materiala ĉambro kaj ĉambro kun libroj en la japana lingvo. La fronta orienta domo kun kvin etaĝoj estas alta je 26.9 metroj kaj en ĝi teniĝas vortaroj, klasikaj libroj, sciencaj dokumentoj kaj bibliografiaj materialoj. Kaj en la okcidenta domo estas gazetoj en la ĉina kaj aliaj lingvoj kaj eldonaĵoj de diversaj landoj.

La strukturo de la konstruaĵaro rigore observas la principon de simetrio de la ĉina tradicia arkitekturo. La ĉinstilaj tegmentoj, la eksteraj muroj de helkoloraj kaheloj, laktokoloraj kaj grajnecaj marmoroj kaj la peronoj el granito impresas per moderneco kaj ankaŭ eleganteco de la tradicio.

La projektintoj klopodis por asimili la arkitekturon de ĉina ĝardeno. La biblioteko havas en kaj ekster si kelkajn parcelojn por verdaĵoj, iuj haloj estas dekoritaj per mozaikaj freskoj el kaheloj.

MODERNAJ EKIPAĴOJ

La Pekina Biblioteko estas mo-

derne ekipita per avangardaj aparatoj.

La ĉefaj lokoj de la biblioteko estas ekipitaj per svisaj kontraŭfajraj instalaĵoj, kiuj povas rimarkigi pri malforta fajro. Se okazos brulego, la instalaĵo alarmos, la aŭtomata fajroestinga sistemo ekfunkcios, kaj la urĝa porevakua lumiga sistemo montros vojon al la legantoj.

La biblioteko posedas grandan komputilon. Ĝi havas mirindan kapablon trakti grandnombrajn datumojn, programigi la katalogojn por la tuta libraro de la lando, kio faros la bibliotekon vera centro de la tutlandaj katalogoj de libroj. Krome, ĝi kunligiĝos kun ĉefaj en- kaj eksterlandaj bibliotekoj. Estante oni povos trovi bezonatan materialon indeksan

En legoĉambro



Administrado plenumata per komputiloj



por en- kaj eksterlandaj bibliotekoj.

Por bone konservi valorajn librojn kaj pligrandigi adekvate la librotenejojn, la biblioteko aplikis ekipaĵojn de triobliga mikrofota kaj kserografia kopiado surbaze de la ekzistantaj ekipaĵoj. Krome, la maŝine transsenda ekipaĵo por libroj kaj gazetoj kaj la libropruntedonaj ekipaĵoj funkciigataj de komputilo, servantaj rekte al la legantaro, havas kompare altan modernigan nivelon.

La biblioteko estas ekipita ankaŭ per moderna klimatiza sistemo. Ĝiaj klimatizitaj tenejoj por libroj de unika ekzemplero kaj filmoj kaj la ĉambroj de komputiloj kun areo de 80 kvadrataj metroj konservas konstantan temperaturon kaj humidecon.

“LIBROTENEJA DOMO” APERTA AL LA PUBLIKO

Kompare kun modernaj ekipaĵoj, la klereco de ĝia personaro, la homa koncepto, administra sistemo kaj servomaniero povas efike atesti la modernan nivelon de la biblioteko.

En la pasintaj jaroj la Pekina Biblioteko faris nemalmultajn provojn en ŝanĝo de la malnovaj koncepto kaj labormanieroj. La unua paŝo estis serio da reformoj, kiu iom post iom ŝanĝis la fermitan sistemon de la biblioteko pli akcentantan konservon ol utiligon en malfermitan sistemon, kiu prezentas al la socio sciencajn informojn, ĝeneraligas edukadon, ekspluatas inteligentecon kaj estigas plivalorigan efikon de scioinformoj en cirkulado. Oni konis, ke en la malnova Ĉinio la kortegaj bibliotekoj kaj bibliofiloj akcentis konservon de libroj. Ĝuste pro tia konservemo la Pekina Biblioteko sukcesis kolekti pli ol du milionoj da ekzempleroj de valoraj klasikaj libroj fadenbinditaj laŭ tradicia maniero. Sed nun estas erao de informoj, la biblioteko servas ne plu sole por konservi librojn, sed devas liveri informojn, kaj la libraro jam signifas ne nur “kulturan heredaĵon”, sed ankaŭ fonton de inteligento por disvolvi realajn produktajn fortojn.

Estante plejparto de la librobretaroj de la Pekina Biblioteko estos aperta kaj la legantoj povos laŭbezone elekti la deziratajn librojn el miliono da libroj. Kaj la

biblioteko transiros de la simpla informotranssendo “pruntepreno-redono” al pli altagrada servomodelo de referenco kaj konsulto.

Kiel ŝtata biblioteko, la nova Pekina Biblioteko prenos sur sin jenajn laborojn: akcepti, kolekti, klasifiki kaj konservi en- kaj eksterlandajn librojn, gazetojn, materialojn kaj historiajn dokumentojn; redakti kaj eldoni diversajn katalogojn de libroj; liveri dokumentan esploradon pri temo asignita de la ŝtata gvidorgano kaj fakan konsultan servon al legantoj pere de la librokolekto kaj informoj pri diversaj dokumentoj; disvolvi esploradon pri bibliografio kaj tekniko; kaj aranĝi por eldonado de bibliografiaj informoj.

En la nuna tempo, kompare kun la bibliotekoj de la evoluintaj landoj, la nova Pekina Biblioteko multe distancas de ili en aŭtomateco, klereco de la personaro kaj servonivelo. Ĝuste pro tio la tuta personaro de la biblioteko diligente lernas kaj laboras laŭ rigora normo, por ke en la fino de la kuranta jarcento la Pekina Biblioteko povu amplekse servi kiel ŝtata biblioteko. ■

KORESPONDI DEZIRAS

* Marek Baczkowski 35-j. dez. kor. tm. kaj ŝatas fotadon kaj vojaĝojn. Rynek Nowego Miasta 25 m 4, PL-00-229 Warszawa, Pollando.

* La klubo “Verda Ŝtono” aranĝas internacian ekspozicion de infanaj bildoj por subteni kaj fortikigi E-movadon en nia regiono. Rekompece ĉiu povas ricevi bildojn de niaj infanoj aŭ ion alian laŭ interkonsento. Adr.: Esperanto-Klub, P.j. 110, Kamenets-Podolskij, SU-281900.

* JAROSLAV MATVIJŜIN (46-j.) P.K. 157, Gavpoŝtamt, KIEV-1, USSR 252001 dez. kor. pri literaturo, historio de sciencoj, interŝanĝi bk. k

pm. (neuzitajn laŭ temoj).

* Diversaĝaj esperantistoj el la plej nord-orienta regiono en USSR tre volonte korespondi kun esperantistaro tutmonde pri multaj temoj en diversaj lingvo-noveloj. Adr.: Ĉukotka Esperantista Ligo Magadan provinco, EGVEKINOT a/k 22, USSR-686810.

* Novaj ĉefaj geesperantistoj, kiuj komencis lerni la lingvon antaŭ kelkaj monatoj kaj volas korespondi kun diverslandanoj por praktika lingvouzo. 38-jara s-ro Jan Libra, Dobrovského 1, 678 01 Blansko, Ĉeĥoslovakio; 16-jara studentino Eva Hlavackova, Ovocna 6, 621 00 Brno, Ĉeĥoslovakio; 25-jara s-ro Jaroslav Holub, 9.kvetna 819, 664 53 Ujezd u Brna, Ĉeĥoslovakio.

*Kelkaj samideanoj de Esperanto-klubo “Rado” dez. kor. kun esperantistoj tutmonde pri komputilaj lingvoj, programado, E-instruado, vivo, sporto, arkitekturo, arto, evoluo de ĉina ekonomiko, stato de la ĉina kaj japana E-movadoj kaj aliaj temoj. Adr.: USSR Volgograd 400 115 ul. Ĉujkova, 65 ZKS Esperanto-klubo “Rado”.

*Se vi deklaras vin preta inici 22 jaraĝan okcidentanon en la sekretajn de la ĉina ŝako, aŭ se vi ŝatas letere ludi la eŭropan ŝakon, aŭ se vi estas sufiĉe senantaŭjuĝema interŝanĝi ideojn pri Esperanto, lingvo(j), literaturo, muziko aŭ eble tute aliaj temoj, tiam rotaciigu vian plumon kaj skribu al Andreas Klein, Riesentrapp 6-8, 3320 Salzgitter 1, FR Germanio.

Pri fundamenta teorio de la tradicia ĉina medicino

de ĜANG ĜAŬJUN*

La tradicia ĉina medicino estas medicina scienco formita en la batalo de la ĉina nacio kontraŭ malsanoj dum miloj da jaroj. Ĝia fundamenta teorio estas sistemo de scienca teorio, formita en senĉesa resumo de ĉinmedicinaj kuracaj spertoj, surbaze de la tradicia kulturo de Ĉinio. La sistemo konsistas ĉefe el la doktrinoj pri *jin* kaj *jang* (du kontraŭaj flankoj en la naturo), la kvin elementoj, viscera stato kaj *ĝinglŭo-o* (ĉefaj kaj akcesoraj vojoj, tra kiuj cirkulas la vitala energio kaj lokiĝas la akupunkturaj punktoj). Ne tute sama al la moderna medicino, ĝi tamen ne estas mistera. Por faciligi la komprenon, mi eksplikas la teorion per konkretaj ekzemploj.

Estis iu knabino, kiu svenis pli ol unu horon en ĉiu tagmezo kaj noktomezo. Post kiam ŝi vekigis, ŝi sentis sin normala. Oni faris al ŝi diversan ekzamenon, sed ne sukcesis fari ĝustan diagnozon. Fine kuracisto de ĉina medicino diagnozis, ke ŝi suferas malakordiĝon de *jin* kaj *jang*. La suferantino tute resaniĝis, preninte du dozojn da dekoktaĵo kun bupleŭro kiel la ĉefa drogo por reguligi *jin* kaj *jang*.


La ĉina medicino rigardas ĉion en la universo kiel unuecan enton de la du kontraŭoj *jin* kaj *jang*. Ekz., la virinoj estas *jin* kaj la viroj *jang*; la tero estas *jin* kaj la ĉielo *jang*; la sango apartenas al *jin* kaj la vitala energio al *jang*; la koro,

hepato, lieno, pulmo kaj reno apartenas al *jin* kaj la intesto, stomako, kolecisto, urinveziko al *jang*. Ĉiu homa interna organo havas siajn proprajn *jin* kaj *jang*. La ĉina medicino komparas *jin* kaj *jang* de la homa korpo kun tiuj de la naturo kaj rigardas la fiziologian aktivadon de la homa korpo kiel movadon de "malgranda universo". *Jang*-energio plej viglas de la 11-a ĝis la 13-a tagmeze, kiam *jin*-energio naskiĝas; de la 23-a ĝis la 1-a noktomeze plej viglas *jin*-energio, kiam *jang*-energio naskiĝas. Se oni malsaniĝas en tiuj horoj, ili do


suferas malakordiĝon de *jin* kaj *jang*.

La ĉina medicino opinias, ke la sano baziĝas sur la akordiĝo de *jin* kaj *jang*, kaj la malakordiĝo, troa vigliĝo aŭ troa malfortiĝo de *jin* kaj *jang* estigas diversajn malsanojn. La kaŭzo de malsano kaj la de ĝi estigita patologia rezulto nomiĝas pasiva faktoro, dum la stabila povo en la korpo, kiu rezistas kontraŭ la influoj, nomiĝas aktiva faktoro. La vigliĝo de pasiva faktoro de *jin* kondukas al malvarmiĝo kaj la vigliĝo de pasiva faktoro de *jang* kondukas al varmiĝo aŭ febro; la

Ĉin-medicinaj esplorantoj studas la fundamentan teorion de la ĉina medicino.



*La aŭtoro estas esploranto de la Instituto de Libroj kaj Informoj sub la Pekina Akademio de Tradicia Ĉina Medicino.



Ĉin-medicinaj esplorantoj studas klasikajn ĉin-medicinajn verkojn.

malfortiĝo de *jang*-energio kaŭzas internan malvarmiĝon kaj la malfortiĝo de *jin*-energio al interna varmiĝo. Kontraŭ febra malsano kuracistoj de ĉina medicino preskribas ne sendistinge al la paciento senfebrigan medikamenton. Ili unue distingas la simptomojn de *jin* kaj *jang*. Se la paciento febras de posttagmeze ĝis nokte kaj montras simpton de malforta *jin*-energio, oni aplikas preskribon vigligi *jin*-energien. Se paciento febras tage kaj montras simpton de malforta *jang*-energio, oni aplikas preskribon milde varmigi *jang*-energien kaj akceli la vitalan energien. Ĉi tiuj

estas metodoj reguligi *jin* kaj *jang*, per kiuj oni povas kuraci diversajn febrajn malsanojn.

Kompare kun la formoj kaj karakteroj de la kvin ĉefaj materioj en la naturo, ĉina medicino klasifikas ĉion laŭ la kvin elementoj—oro, akvo, ligno, fajro kaj tero. Ekz., la pulmo apartenas al oro, la reno al akvo, la hepato al ligno, la koro al fajro kaj la lieno al tero. El la sezonoj aŭtuno apartenas al oro, vintro al akvo, printempo al ligno, somero al fajro kaj la sezono inter somero kaj aŭtuno (alinome “longa somero”) al tero. La teorio sekvata de la kuracistoj de ĉina

medicino por ekspliki la rilatojn inter objektoj estas: El oro originas akvo, el akvo ligno, el ligno fajro, el fajro tero kaj el tero oro; oro regas lignon, ligno teron, tero akvon, akvo fajron kaj fajron oron. La kuracistoj de ĉina medicino opinias ankaŭ, ke ĉiu ajn objekto akcelas kaj regas iun alian, kaj samtempe ĝi estas regata kaj akcelata de alia objekto, kaj tiel tenas sian ekvilibron en movado. Se la ekvilibro inter la internaj organoj estas perturbita de pasivaj faktoroj aŭ malforta vitala energio, tiam okazas malsano. La kuracistoj de ĉina medicino devas trovi la kaŭzon de la perturbiĝo de la ekvilibro, ĉiamaniere deteni la fortan energien kaj vigligi la malfortan por restarigi la ekvilibron.

Paciento de hepato ofte suferas de malbona apetito, ventroŝveliĝo, kapturiniĝo, membro-malforteco kaj doloro en la korpoparto inter la akselo kaj talio. Laŭ la doktrino, ke la lieno apartenas al tero kaj havas funkcion de digesto kaj asimilo, kuracistoj de ĉina medicino diagnozas: La paciento havas malfortan lienon. La simptomoj de membro-malforteco, kapturiniĝo kaj doloro en la korpoparto inter la akselo kaj talio montras, ke lia hepata funkcio estas tro forta. Tial kuracisto de ĉina medicino preskribas al li recepton por toniki la lienon kaj normaligi la funkcion de la hepato. Ĝi povas


TABELO DE EKSTERAĴOJ RILATAJ AL LA KVIN VISCERAJ ORGANOJ

Kvin visceraj organoj	korpo	kvin sensorganoj	sentoj	kvin sonoj	kvin tonoj	movo	kvin odoroj	kvin gustoj
pulmo	haŭto k haro	nazo	malĝojo	ploro	mi	tuso	fiŝodoro	pika
reno	osto	orelo	teruro	ĝemo	sol	tremo	fetoro	sala
hepato	tendeno	okulo	kolero	voko	do	premo	urinaodoro	acida
koro	pulso	lango	ĝojo	rido	re	melankolio	karbiĝaodoro	amara
lieno	karno	buŝo	zorgo	kantado	la	vomo	bonodoro	dolĉa

forigi plejparton de la simptomoj de hepato. Ftizuloj plejparte estas malgrasaj, tusadas kaj suferas malfortan febron. Kuracistoj de ĉina medicino opinias, ke la renoj de ftizulo ne povas regi la pulmo-febron kaj la lieno ne povas helpi la pulmon. Por kuraci la malsanon, oni preskribas recepton kun reno-tonika rehmanio (*Rehmannia glutinosa*), dangŝen-o kaj ignamo (*Codonopsis pilosula*) kaj pulmo-tonikaj lilio kaj mielo. Tiu dekoktaĵo havas kompare bonan kuracefikon al ftizulo. Tio vidigas, ke la doktrinoj pri *jin* kaj *jang* kaj la kvin elementoj estas fundamenta teorio de la ĉina medicino por direkti kuracan praktikon.

Aparte menciindas, ke la ĉina medicino klasifikas ankaŭ homajn sentojn laŭ la leĝo de la kvin elementoj kaj kuracas per ilia interrogo. La pulmo rilatas al malĝojo kaj melankolio, la reno al teruro, la hepato al kolero, la koro al ĝojo kaj la lieno al zorgado. La normalaj sentoj estas necesaj por homo, troigo de sentoj difektas la sanon: Troa malĝojo malutilas al la pulmo, troa teruro al la reno, troa kolero al la hepato, troa ĝojo al la koro kaj troa zorgo al la lieno. Reguligi la senton kaj eviti malutilon estas rimedo aplikata de la kuracisto de ĉina medicino.

La doktrino pri la viscera stato esploras, pere de observo de eksteraj fenomenoj de la homa



Bildo de ĝinglŭo-oj

- | | |
|-------------------------|--------------------------|
| 1. jenmaj | 8. jangmingĝing de piedo |
| 2. tajjinging de mano | 9. dumaj |
| 3. ĝjuejinging de mano | 10. tajjangging de piedo |
| 4. ŝaŭjinging de mano | 11. tajjangging de mano |
| 5. ĝjuejinging de piedo | 12. ŝaŭjangging de mano |
| 6. tajjinging de piedo | 13. jangmingĝing de mano |
| 7. ŝaŭjinging de piedo | 14. ŝaŭjangging de piedo |

kvin grenoj	koloro	klimato	sezono	direkto	cifero	internaj organoj	kvin elementoj
rizo	blanko	sekeco	aŭtuno	okcidento	naŭ	dika intesto	oro
sojfabo	nigro	malvarmo	vintro	nordo	ses	urinveziko	akvo
tritiko	bluo	vento	printempo	oriento	ok	kolecisto	ligno
glueca milio	ruĝo	varmo	somero	sudo	sep	maldika intesto	fajro
milio	flavo	varmeto	longa somero	mezo	kvin	stomako	tero

korpo, la funkcia leĝon kaj interrilaton de la internaj organoj. Ĝi estas kerno de la fundamenta teorio de la ĉina medicino. Laŭ la doktrino la homa korpo estas organisma tuto kun la kvin visceraj organoj kiel la centro kaj havas striktan unuecon kun la ekstera medio. Ĝi ĉefe traktas ne anatomiajn situojn de la internaj organoj, sed konadon pri la fiziologia funkcio, patologiaj ŝanĝigoj, interrilatoj kaj interreĝoj de la internaj organoj. Tio estas la evidenta karakterizaĵo de la tradicia ĉina medicino diferenca de la moderna medicino.

Ĉi tie la t.n. kvin visceraj organoj estas pulmo, reno, hepato, koro kaj lieno. La ses internaj organoj estas kolecisto, stomako, dika intesto, maldika intesto, *sanĝjaŭ* kaj urinveziko. Sed ili ne estas nocioj pri la moderna anatomio. Ekz., laŭ la ĉina medicino, la lieno havas funkcion de nutraĵa digesto kaj asimilo kaj likvo-cirkuligo. La doktrino pri la viscera stato faras abstraktan komparon inter la homa korpo kaj eksteraj objektoj kaj havas adekvate apartajn rilatojn kun la visceraj organoj. Vidu la tabelon.

El la tabelo videblas, ke, pere de observo de la simptomoj de la koncernaj objektoj, oni povas koni la ŝanĝigon de la kvin visceraj organoj. Ekz., osto, orelo, teruro, sala gusto, fetoro, vintra malvarmo kaj ŝato havas ĉiu apartan rilaton kun la reno. Tial orela zumado, surdeco, periodenta malsano kaj osta malsano kaŭziĝas de la rena perturbo. Por elimini ilin necesas kuraci renon. La fama medikamento "*Ĝinkuj-ŝenĉjŭan*" (pilolo el ok drogoj), "*Hŭangĝingĝjan*" kaj aliaj preparitaj laŭ la doktrino pri la viscera stato estas ofte uzataj de maljunuloj por toniki la vitalan energion, la renojn, solidigi la dentojn kaj akriĝi la orelojn. Multaj receptoj por reguligi la hepatan funkcion kaj toniki la

renon povas kuraci perturbiĝon de la seksa funkcio de viro kaj sterilecon de virino, kiujn ne povas kuraci la okcidenta medicino. Por sendormuloj nekuraĉeblaj per dormigilo, laŭ iliaj simptomoj de langoruĝo, soifo kaj maltrankvilo, kuracistoj de ĉina medicino diagnozas, ke ili havas fortan fajron en la koro (Ĉi tie la "fajro" ne estas fizika-kemia fenomeno, sed interna varmo de la internaj organoj de la homoj. Ĉi-sube la vorto "fajro" aludas la samon. — La Trad.) kaj malfortan renon, kaj preskribas al ili recepton kun koptiso kaj skutelario por mildigi la koran fajron, kaj azenofela gelateno, radiko de peonio (*Paeonia lactiflora*) kaj ovoflavo por toniki la renojn. Ili bone efikas sen malutilo. Iu paciento alterne suferis dormemon kaj sendormecon. Li dormis dum pli ol unu monato, post vekigo ne dormis dum unu aŭ du semajnoj kaj estis tre maltrankvila. Popolaj receptoj estis senefikaj por kuraci lian malsanon. Tamen oni resanigis lin per la recepto milde vigligi *jang*-energion de la renoj kaj lieno kaj forigi la mukajon.


La doktrino pri *ĝinglŭo*-o estas nedisigebla de tiu pri la viscera stato. Laŭ la ĉina medicino *ĝinglŭo*-oj estas vojoj, tra kiuj cirkulas la vitala energio en la homa korpo kaj kiuj interligas internajn organojn, membrojn kaj la kvin sensorojn. Estas du specoj de *ĝinglŭo*-oj: ĉefaj vojoj kaj branĉoj. La *ĝing*-vojoj inkluzivas 12 ĉefajn vojojn kaj 8 ekstrajn vojojn; la *lŭo*-vojoj kiel reto dislokiĝas tutkorpe, el kiuj la gravaj nombroj 15. Ili estas branĉoj de *ĝinglŭo*-sistemo. Se oni komparas la internajn organojn kun fervojaj centroj, do la *ĝing*-vojoj estas ĉefaj linioj, la *lŭo*-vojoj estas branĉoj kaj la akupunkturaj punktoj estas la stacioj.

La 12 ĉefaj *ĝing*-vojoj estas tiuj rekte interligantaj la homkorpan surfacon kaj la internajn organojn. Ili ricevis sian nomon de la

ĉefaj korp partoĵ trapasitaj de la ĉefaj *ĝing*-vojoj surbaze de la doktrino pri *jin* kaj *jang*. La ses *ĝing*-vojoj en la manoj nomiĝas manaj *sanjang* (tri *jang*-oj) kaj *sanjin* (tri *jin*-oj) kaj la ses *ĝing*-vojoj en la piedoj nomiĝas piedaj *sanjang* kaj *sanjin*. Ĉiu *ĝinglŭo*-o trapasas difinitan parton de difinita interna organo kaj difinitan parton de la homkorpa surfaco. Ĝenerale, la manaj *sanjang* komenciĝas de la manoj kaj finiĝas ĉe la kapo; la manaj *sanjin* komenciĝas de la brusto kaj finiĝas ĉe la manoj; la piedaj *sanjang* komenciĝas de la kapo kaj finiĝas ĉe la piedoj kaj la piedaj *sanjin* komenciĝas de la piedoj kaj finiĝas ĉe la abdomeno. La diagnozo de la ĉina medicino al la simptomoj kaj reakcio de la korpo-partoĵ trapasitaj de *ĝinglŭo*-o estas originala. En kuracado oni pliatentas *ĝinglŭo*-on. Estas malpermesite apliki sendolorigilon sendistinge al paciento de kapdoloro, sed necesas ekzameni liajn *ĝinglŭo*-ojn por trovi la kaŭzon de la malsano. Laŭ la doktrino pri *ĝinglŭo*-oj, la frunto ligiĝas kun stomakaj *ĝing*-vojoj; la tempioj ligiĝas kun kolecistaj *ĝing*-vojoj kaj la verto ligiĝas kun hepataj *ĝing*-vojoj. Iu suferanto de frunta doloro prenis sendolorigilon dum unu semajno, sed la malsano pligraviĝis. Laŭ la fetora furzo de la paciento, kuracisto de ĉina medicinisto diagnozis, ke lia malsano estas kaŭzita de stomakaj *ĝing*-vojoj, kaj preskribis al li recepton por elimini la stomakan fajron kaj faciligi fekadon, post preno de la dekoktaĵo la paciento rapide resaniĝis.


La supre dirita teorio estas nemankigebla por direkti la kuracistojn de ĉina medicino en ilia kuracado. Oni ĝeneraligas ĝian gravecon jene: La kuracistoj de ĉina medicino certe faras eraron en sia kuracado, se ili ne konas la doktrinojn pri *jin* kaj *jang*, la kvin elementoj, viscera stato kaj *ĝinglŭo*-o. ■

Modernaj ĉinaj freskoj




Printempo de scienco (parto)

Poloo en Tang-dinastio (murtapiŝo)








Neğa kirlas maron.



Sur la Silka Vojo (parto)




Sur la Silka Vojo (parto)



5 000 jaroj (parto)

ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO:



ALBUMO PRI ĈINIO

Kompil. la redakcio de "ĈINIO". 96p. 25cm. 85-Es-175P
Prezo: £1,90 US\$3,90

Kun pli ol cent koloraj bildoj konigantaj Ĉinion pri ĝiaj geografio, historio, popolo kaj registaro, ekonomio, literaturo kaj arto, sciencoj, edukado, higieno kaj sporto, vidindaj lokoj kaj socia vivo.

VOJAĜO TRA ĈINIO

Kompil. la redakcio de EPĈ. 136p. 26cm. 85-Es-284P
Prezo: £8,80 US\$12,50

La albumo konigas 23 turismajn urbojn de Ĉinio kaj la Tri Gorĝojn de Jangzi-rivero. Ĝi helpas vin koni ĝenrojn, pladojn kun loka gusto, modernajn hotelojn kaj ĉefajn vidindajn lokojn. Kun 166 koloraj bildoj kaj 25 klaraj turismaj mapoj.

40 VIDINDAJ LOKOJ EN ĈINIO

Trad. Censinio. 252p. 18.5cm. 12-Es-1825P
Prezo: £1,90 US\$3,90

Gvidlibro pri 40 plej famaj pitoreskejoj en Ĉinio. Krom la priskriboj pri la pejzaĝoj vi legos en ĝi ankaŭ interesajn legendojn kaj popolarakontojn pri tiuj lokoj. Kun koloraj bildoj kaj ilustraĵoj.

PITORESKA PEKINO

Trad. Zoŭ Guohiang k.a. 74p. 18.5cm. 17-Es-1827P
Prezo: £0.95 US\$2,00

La libreto kun mapo, pentraĵo kaj koloraj bildoj, konigas 19 vidindejojn en Pekino. En la enkonduka artikolo "Pekino hieraŭ kaj hodiaŭ" oni skizas la historion kaj evoluon de la urbo.

DEK SES URBOJ DE ĈINIO

176p. 18.5cm. 17-Es-1885P. Prezo: £1,90 US\$3,90

La ĝenerala skizo pri la historio, ekonomia konstruado, kulturo kaj eduko k.a. de 16 ĉinaj grandaj urboj. Kun koloraj kaj nigrablankaj bildoj.

GVIDLIBRO PRI PEKINO

Kompil. Laj Hajlong. 150p. 18.5cm. 12-Es-2067P.
Prezo: £1,55 US\$2,85

Ĝi servas kiel helpanto al vizitantoj al Pekino, konigante vidindajn lokojn, hotelojn, restoraciojn, trafikajn liniojn, gravajn telefonnumerojn ktp. Kun mapo kaj koloraj bildoj.

Mendu ĉe: **Libroservo de UEA**

Peranto de EPĈ

aŭ **Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio, Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio**



La ĉina sportistino Ŭang Ŝiŭli gajnis la oran medalon en la konkurso de la virina 1 000-metra sketkuro en la Unua Azia Vintra Sportkunveno. Jen ŝi estas en la konkurso.



La ĉina sportistino Ĝin Ŝjuefej gajnis la kupran medalon en la konkurso de la altmonta malgranda slalomo en la Unua Azia Vintra Sportkunveno. Jen ŝi estas en la konkurso.

ĈEN BAŬHE:

Espero de la glacia kaj neĝa sportoj

La ĉina glacia kaj neĝa sportoj akiras okulfrapajn sukcesojn post longa silento.

Marte de 1986 la 17-jara sketistino Li Ĝinjan superis per 5'30''58 la mondan rekordon de la enĉambra 3 000-metra kuro kreitan de kanada sketistino samjare per 5'32''31.

En tiu konkurso de 27 sket-cirkloj kun partopreno de 8 sketistinoj sin montris elstara tiu kampara junulino de nordorienta Ĉinio. Ĉe la komenco ŝi estis postĝinta, tamen en la 11-a cirklo ŝi skete kuris plej antaŭe. Post la 20-a cirklo ŝi montris sin tre laca kaj malrapidiĝis. Sed en la lastaj du cirkloj ŝi strebis antaŭen plenforte. Kiam tiu sportistino kun forta volo malfacile tenis la ekvilibron pro troa laciĝo en distanco je du metroj for de la fino. Ŝi tuŝis la glacian surfacon per la vizaĝo, trapasante la finon. Ŝi fariĝis la unua sketistino de Ĉinio, kiu superis la mondan rekordon de sketkurado.

La ĉina glacia kaj neĝa sportoj jam havas historion de 34 jaroj. Ĝi komenciĝis de la Unua Tutlanda Glacia Sportkunveno okazinta en 1955. En la 60-aj jaroj tiu sporto en Ĉinio havis tempon mallongan sed plenan de espero. En 1963 la ĉina sketisto Ljao Ĝihuan gajnis la oran medalon de la 1 500-metra kuro en la monda sketkura ĉampioneca konkurso kaj fariĝis

la unua monda ĉampiono de Ĉinio en sketkuro. En 1966 la ĉina glaci-hokea teamo akiris sukceson per venko en kvin matĉoj kaj per egala rezulto en unu matĉo en la konkurso kun la vizitanta polanda teamo de la monda B-grupo. Krome, iuj el la ĉinaj glaciaj sportistoj siatempe atingis la nivelon saman kiel tiu de Ljao Ĝihuan.

En la jaroj post 1966 la ĉina glacia kaj neĝa sportoj disvolviĝis malrapide, kaj preskaŭ ĉesis regulaj trejnado kaj konkurso. Tiu stato daŭris ĝis 1970.

En 1972 la ĉina glaci-hokea teamo, kiu rekomencis sian regulan trejnadon, akceptis novajn membrojn. Ĝi fariĝis forta teamo en Azio kaj gajnis la trian lokon de C-grupo en la monda glaci-hokea ĉampioneca konkurso okazinta en la sama jaro.

En 1974 sketisto Ĝaŭ Ŭejĉang gajnis la subĉampionecon de la 500-metra kuro en la monda sketkura ĉampioneca konkurso, kio montris, ke ĉinaj sketkuristoj levis sian nivelon.

En la 80-aj jaroj la ĉina glacia kaj neĝa sportoj progresis direktate de la ĝenerala reforma orientilo de Ĉinio. Ili alprenis novajn metodojn en trejnado, konkurso, interŝanĝo de artoj kun aliaj landoj kaj ricevis bonan efikon.

En 1980 la ĉina teamo gajnis la subĉampionecon de C-grupo en la monda glaciĥokea ĉampionea konkurso okazigita en Pekino.

En 1985 la ĉina sportisto Ĝang Ŝubin gajnis la ĉampionecon de la unuopa arto-sketado en la 12-a Monda Studenta Vintra Sportkunveno, kio finis la historion de la monda arto-sketa konkurso, en kies unuaj lokoj mankis nomoj de ĉinaj sportistoj.

La grandioza Unua Azia Vintra Sportkunveno en 1986 montris kolektivian strebadon de aziaj landoj por atingi la nivelon de eŭropaj kaj amerikaj landoj en la glacia kaj neĝa sportoj. Aziaj landoj sendis al ĝi siajn plej eminentajn sportistojn. Ankaŭ Ĉinio sendis siajn eminentajn sportistojn nove bakitajn en la lastaj jaroj.

En la glaciĥokea konkurso la ĉina teamo venkis la fortan japanan teamon kaj fariĝis la ĉampiono de Azio, kaj sekve enviciĝis inter la membroj de B-grupo.

En tiu ĉi sportkunveno paro da ĉinaj arto-sketistoj profunde impresis la rigardantojn. Ili estis la 21-jara sketisto Liŭ Lujang kaj lia 20-jara partnerino Ĝaŭ Ŝjaŭlej. Ili naskiĝis en la provinco Hejlongĝiang de nordorienta Ĉinio kaj sketis jam de la infanaĝo. Antaŭ tri jaroj ili komencis kunlabori sub direktado de trejnisto. Ĉar ili ambaŭ posedis bonan arton kaj estis lertaj prezenti sin en muzikaĵo kun fortaj ritmoj kaj serena melodio, ili kunlaboris harmonie kaj progresis rapide. En tiu konkurso ili gajnis la ĉampionecon kaj enviciĝis inter la gajnintoj de la unuaj dek lokoj en la 13-a Monda Studenta Vintra Sportkunveno.

La neĝa sporto aperis plej malfrue en Ĉinio. Kvankam skiado havas longan historion en nordorienta Ĉinio, tamen ĝi estas nur vintra trafika rimedo por montvilaĝanoj. Ĝi kiel sporto

aperis nur en la lastaj jaroj. Nun la neĝa sporto de Ĉinio inkluzivas trakampan skiadon, suraltmontajn grandan slalomon kaj malgrandan slalomon. En la Unua Azia Vintra Sportkunveno la 25-jara Sportistino Tang Juĉin gajnis la trian lokon de la virina 5-kilometra trakampa skiado. La 23-jara Ĝin Ŝjuefej gajnis la trian lokon de la suraltmonta granda slalomo. Tang Juĉin kaj aliaj tri ĉinaj skiistinoj gajnis la ĉampionecon de 4×5-kilometra trakampa skiado.

La supre menciitaj atingoj plifortigis memfidon de la ĉinaj sketistoj kaj skiistoj. Post la monda rekordo de la enĉambra 3 000-metra sketkuro, Li Ĝinjan denove superis la mondan rekordon de la 1 500-metra sketkuro en la monda enĉambra sketa ĉampionea konkurso de mallongaj distancoj, kio refoje montris la latentan povon de la ĉinaj sportistoj en sketado kaj skiado.

Dank'al la progreso de la ĉinaj sketistoj kaj skiistoj kaj vizitoj de famaj glaciaj majstroj-dancistoj al Ĉinio, ne nur nordaj, sed ankaŭ

sudaj ĉinoj interesiĝas pri sketado kaj skiado. En la lasta jaro en la gubernio Ĝongŝan de Ĝuangdong-provinco en suda Ĉinio, sen glacio kaj neĝo tutjare, oni komencis konstrui arte fridigan sket-domon. Antaŭ ne-longe fervoraj personoj de tiu sporto prezentis jenan sloganon: "Norda glacio moviĝu suden". Ĝi signifas, ke tiu sporto tradicie disvolviĝanta nur en la nordo estos disvastigata en la sudo. Tio spegulas, ke la sporto ricevas pli grandan atenton en la socio.

Kompreneble, la ĉina glacia kaj neĝa sportoj ankoraŭ troviĝas sur kompare malalta nivelo, juĝate laŭ la internacie avangarda nivelo. Ĝi ankoraŭ ne estas populara inter la amasoj. Ĝiaj trejnaj metodoj kaj rimedoj ne estas sufiĉe perfektaj kaj modernaj. La konstruado de koncernaj kampoj kaj domoj ne povas kompari sin kun tiu de la evoluintaj landoj. Tial, ne estas reala la espero, ke la ĉina glacia kaj neĝa sportoj atingos la nivelon de eŭropaj kaj amerikaj landoj en mallonga tempo. Sed la diro, ke jam leviĝas la stelo de espero, ne estas troiga.

La plej bonaj sportistoj de la Unua Tutlanda Glacia kaj Neĝa Sportkunveno de Ĉinio (de maldekstre): Li Ĝinjan, Ŭang Ŝiŭli, Ĝang Ĉing, Ĝaŭ Ŝjaŭlej, Liŭ Lujang, Tang Juĉin, Ĝang Ŝubin, Ŭang Jongĝjun, Tjan Juĝje kaj Ĝin Ŝjuefej



Pejzaĝaj idiliaj poetoj de la prospera Tang-dinastio kaj iliaj verkoj

de MEJ ĜI

En la eraoj Kajjūan kaj Tjanbaŭ (713-756) de Tang-dinastio estis prospera la ĉina klasika poezio. Tiam aperis mondfamaj grandaj poetoj Li Baj kaj Du Fu, kaj krome ankaŭ multaj aliaj eminentaj poetoj kun originala stilo en arto, kiaj Meng Haŭjan, Ŭang Ŭej, Gaŭ Ŝi kaj Cen Ŝen. Ili markis la oran epokon de poezio en la prospera Tang-dinastio.

La tiamaj ĉefaj poetoj povas esti dividitaj en du skolojn: la unua reprezentata de Gaŭ Ŝi kaj Cen Ŝen, prenis la vivon de militistoj garnizonantaj ĉe la landlimoj kiel sian temon, kaj la alia kun Meng Haŭjan kaj Ŭang Ŭej kiel siaj reprezentantoj famis pro siaj pejzaĝaj kaj idiliaj poemoj.

Meng Haŭjan (689-740) estis la unua poeto de Tang-dinastio, kiu multe verkis pejzaĝajn poemojn. Li estis unu el kelke da poetoj de Tang-dinastio, kiuj neniam oficistiĝis. Li vivis kviete dum la tuta vivo. En la aĝo de pli ol 40 jaroj li iris al la ĉefurbo Ĉang'an por oficistiĝi, poste faris mallongan viziton al iuj lokoj. Li pasigis sian plejparton de la vivo en la hejmloko Lumen (en la nuna Ŝjangjang-regiono de Hubej-provinco).

Nun ekzistas pli ol 260 poemoj de Meng Haŭjan, el kiuj la plej elstaraj estas tiuj pri ermita vivo for de la homa socio. Tion ekzemplis lia poemo "Somera Sapiro al Ŝin Da", ĝi legiĝas jene:

*Subite l' sun, subiris okcidente,
Lunbildon lag' spegulis oriente.
Kuŝante lozharare ĉe l' fenestro,
Mi ĝuis vesperfriskon tre kontente.
Aromon lotusfloroj sendas vente,
Gutintas de bambuoj ros' arĝente.
Sepkordon volis preni mi por ludo,
Sed mankis aprecanto nun-momente.
Sopiris tiel mi la koramikon,
Ke noktomeze sonĝis mi silente.*

La poemo vivece priskribas la intereson de la poeto en ermita vivo kaj ankaŭ montras lian solecon.

Liaj poemoj plejparte priskribas la pejzaĝojn de lia hejmloko. En la poemo "Aŭtuna Ascendo al Lanŝan-monto (Al Ĝang U)" troviĝas jenaj versoj:

*Revenas vilaĝanoj. Ripozante
Sur sablo ĉe pramej' babilas.
Fora arbar' similas al kapseloj,*

Bat' ĉe l' bordo al lunark' similas.

Ili priskribas la pejzaĝon de lia hejmloko: vespere revenantajn vilaĝanojn ĉe pramejo kaj foran boaton en rivero similan al arka luno. La versoj pri tiu pejzaĝo nature fluis el la plumo de la poeto kaj prezentas al ni pitoreskan bildon kiu forte nin impresas.

El la verkoj de Meng Haŭjan ne estas multaj idilioj, kiuj estas saturitaj de vivspiro. Eble li ne faris fiziklaboron kaj tiurilate lia priskribo estas ne tute vera. Sed li ermite pasigis la duonon de sia vivo en kamparo, tial liaj poemoj estas naturaj kaj senafektaj. Ekz., lia poemo "Gastado ĉe Amiko" en tiu ĉi numero priskribas la kamparanan vivon simpla kaj aminda, la amikecon sincera kaj profunda. Ĝi milde babilas pri ĉiutaga vivo.

Ankaŭ liaj malgrandaj poemoj estas freŝaj, kiuj vaste cirkulas eĉ nun. Unu el ili estas "Printempa Mateno":

*Dormanton eksurprizas matenhelo
Birdkantoj ĉie eĥas ĉe l' orelo.
Sed dum la noktaj vent' kaj pluvo,
Kiom da floroj ja ekkuŝis sur la tero?*

El la pejzaĝaj kaj idiliaj poetoj de tiu periodo Ŭang Ŭej estis la plej eminenta. Ŭang Ŭej (701-761) estis erudiciulo, talentulo. Li estis poeto kaj ankaŭ majstro en kaligrafio, pentrarto kaj muziko. Lia vivo povas esti dividita en du etapojn, antaŭ kaj post la aĝo de ĉ. 40 jaroj. En la aĝo de pli ol 20 jaroj li komencis oficistiĝi en la kortego, li estis kompare progresema, kaj certagrade esprimis sian malkontenton al sociaj maljustaĵoj. Post la aĝo de 40 jaroj li daŭre funkciis kiel ŝtata oficisto en la kortego kaj iom promociiĝis. Li vivis kaj mandarene kaj ermite, ludis sep-kordon kaj verkis poemojn en sia vilao kun bela pejzaĝo. En siaj lastaj jaroj li komplete fariĝis budhano okupiĝanta pri recitado de sutroj.

Nun konserviĝas pli ol 400 el liaj poemoj. En sia juna aĝo li verkis iujn satirajn poemojn kontraŭ aroganta kaj arbitra ago de privilegiaj fortoj, kiuj estas plej riĉaj de socia signifo. Krome, li verkis ankaŭ poemojn pri la vivo de militistoj garnizonantaj landlimojn, kuraĝaj junuloj, bravaj generaloj, malfacila vivo ĉe landlima garnizono aŭ triumfa ĝojo. Ili prezentas grandan heroan spiriton

kaj patriotisman entuziasmon. La poemo “Junuloj”

*Per vino multekosta, nome la Ŝinfeng-nektaro,
En alta domo varme tostas nova amikaro —
Ŝjanjang-aj kavaliroj ja plejparte estas knaboj.
Ligiĝis sur apuda plorsaliko la ĉevaloj.*

saturiĝas de vigla entuziasmo de junaj kavaliroj kaj riĉas je romantika etoso. “Sendito al Landlimo” estas poemo priskribanta landliman pejzaĝon, ĝiaj du versoj

*Dezerte rektas supren-sora fumo,
Rivere rondas la subira suno.*

grandioze priskribas la vastan dezerton ekster la Granda Muro.

En liaj postaj poemoj li priskribis ĉefe sian senzorgan, ermitan vivon. Liaj idilioj klare kaj hele bildigas kamparajn pejzaĝojn, kvietan kaj trankvilan idilian vivon. En tiaj poemoj senzorgaj kamparaj maljunuloj, kaj paŝtaj knaboj estas harmonie enkneditaj en la kvietajn pitoreskajn pejzaĝojn. Tion ekzemplis la poemo “Kamparo ĉe Ŭej-rivero” en tiu ĉi numero. Ĝi bildigas kamparan pejzaĝon en vesperkrepusko kaj montras lian senzorgan humoron fore de la reala vivo.

Liaj poemoj priskribas per malsamaj stiloj diversajn pejzaĝojn, kiaj alta monto, vasta rivero, torento, delikataj birdo kaj insekto. Tion ekzemplis la poemo “Luĝaj” (loka nomo). La poeto bildigas por ni montan pejzaĝon per delikataj priskriboj:

*Hom' nevideblas en kvieta monto,
Nur homaj voĉoj eĥas en krepusko.
La sunrebril' penetras la densejon
Kaj kuŝas sur la velurverda musko.*

Ankaŭ “Birdkanta Valo”

*Defalas osmantfloroj — hom' sen faro.
Printempa nokt'. Kvietas la montaro.
Ekmiras birdoj je leviĝ' de l' luno
Kaj pepas brue en profunda valo.*

estas poemo pri monta pejzaĝo.

La poemoj de Ŭang Ŭej sin karakterizas per “bildo en poemo”. Multaj el liaj poemoj estas majstre faritaj en bilda aranĝo kaj kolorigo. La plej fama poemo el ili “Aŭtuno ĉe Montvilao” prezentas pinojn prilumatajn de la hela luno, fontakvon fluantan sur ŝtonoj, verdajn montojn post pluvo, ridojn de knabinoj en bambuaro revenantaj de vestlavado, fiŝboaton lante traيرانtan lotusan lageton, kiuj kune formas belan harmonian bildon de aŭtuna monto. Krome, ankaŭ ĉarmas la versoj:

*Pramejon prilumas la suno subira,
Vilaĝe leviĝas fumstrio kuira.*

kaj ankaŭ:

Ardeoj flugas super akvokampa senlimaĵo

Kaj orioloj kantas ombre de somer-arbaro.

Ŭang Ŭej verkis ankaŭ iujn poemetojn tre belajn. La adiaŭa poemo “Ŭejĉeng” estas bona ekzemplo:

*Post maten-pluv' al Ŭejĉeng — senpolvigo —
Freŝverdas ĉe l' gastejo la salikoj.
Bonvolu trinki pli da vin' el glaso,
Ueste de Janggŭan 'stas ne amikoj.*

Ĝi estis adaptita al adiaŭa muzikaĵo kaj cirkulas ĝis nun. Ankaŭ la poemoj “Sopiro” pri amo, “Rememoro pri Ŝandong-aj Fratoj la 9-an de la 9-a monato” pri sopiro al la hejmloko estas multe ŝatataj.

Ĉu Gŭangŝji (707-760?), Ĉang Ĝjan (708-765?), Zu Jong k.a. estis aliaj pejzaĝaj kaj idiliaj poetoj en tiu periodo. Ĉu Gŭangŝji postlasis pli ol 200 poemojn, inter kiuj troviĝas poemaro pri kamparanoj, kaj tiuj temantaj pri fiŝistoj, hakistoj de brulligno, knabaj paŝtistoj, kolektistinoj de trapoj kaj lotus-semoj. Evidente lin forte interesis la kampara vivo. Liaj poemoj ĝenerale estas senafektaj, precipe tiuj pri esprimo de liaj korinklinokaj sentimento estas tre naturaj. Tion ekzemplas la poemo “Fiŝhoka Riverkurbiĝo”:

*Junul' fiŝhokas ĉe kurbo de rivero.
Abrikotflorojn disŝutas primavero.
La klara lago aspektas malprofunda.
Lotusoj tremas jen pro fiŝar-apero.
Liginte li la boaton al saliko,
Atendas la amatinon en vespero.*

La pejzaĝaj poemoj de Ĉang Ĝjan estas kompare perfektaj en arto, sed la enhavo estas tre malsocietema. Lia fama poemo estas “Posta Korto de Poŝan-templo”:

*Antikvan templon frue mi eniras,
Matena suno super l' arboj brilas.
Tra bambuar' kondukas pad' kvieta,
En floraj plantoj bonzloĝej' trankvilas.
La montpejzaĝ' gajigas birdhumoron,
Lag-spegulbild' pacigas homan koron,
Mi aŭdas en la ĉirkaŭaj' silenta
Nur preĝojn kaj kvietan tintsonoron.*

El la poemoj de Zu Jong, vaste cirkulanta estas “Neĝa Gongnan-monto”:

*Dekliv' sunbrila de Gongnan tre belas.
Neĝpinto ĝia super nuboj velas.
Iluminiĝas suproj de l' arbaroj.
En nia urbo frosto sin akcelas.*


Ĝi havas nur kvar versojn. La poemo estis verkita dum imperiestra ekzameno. Laŭdire la ekzamenanto-oficisto demandis kial li ne finverkis ĝin (laŭpostule ĝi devis konsisti el 12 versoj), li respondis: “La penso estis jam plene esprimita.” Vere, la mallonga poemo estas remaĉinda. ■

Idilioj de Tang-dinastio en prospero

MENG HAŬJAN:

Gastado ĉe amiko

*Amiko min invitis al kokaja
Festeno dome en kamparpejzaĝo.
La verdaj arboj densas en ĉirkaŭo,
Oblikvis montoj ekster la vilaĝo.
Vidante tra l' fenestro bedoskemojn,
Drinkante ni parolis kultiv-temojn.
Kiam alvenos la Duobla Naŭa,
Revenos mi apreci krizantemojn.*



ŬANG ŬEJ:

Kamparo ĉe Ŭej-rivero

*Vilaĝo en oblikva lumo-ordo,
Strateto eĥas je bov-ŝafa hordo.
Paŝtknabon maljunulo atendadas,
Starante kun bastono ĉe l' kradpordo.
Tritiko floras, klaras fazankrioj,*

*Silkraŭpoj dormas sur morusfolioj.
Kampuloj kun sarkiloj jen revenas,
Abundas vortoj pri vivhistorioj.
Pri tia viv' senzorga mi envias,
Pri emerita vivo mi arias.*

ŬANG ŬEJ:

Aŭtuno ĉe montvilao

*En la montar' kvieta senhombria,
Post pluvo de aŭtuno jam malfrua,
La hela luno brilas inter pinoj,
Sur ŝtonoj klaras fonta akvo flua.
Bambuoj bruas — lavistinoj venas;
Pro fiŝboatoj lotusfloroj tremas.
Kvankam arom' printempa ne plu estas
Ĉi tie resti ni sinjoroj emas.*



Trad. LAŬLUM

+ La Duobla Naŭa — ĉina tradicia festo okazanta je la naŭa de la naŭa monato laŭ la ĉina luna kalendaro.

Ĉi-vespere li ne havas partneron en bala

(Novelo)

La orkestro estis ludanta la blusan melodion "Kvieta Lago", sed lia koro agitiĝas. Sidante sur seĝo proksime de la enirejo de la balejo, li senmove fiksas sian rigardon atendente ŝian aperon.

Li sciis nur ŝian familian nomon Dong. Kiu ŝi estas? Kie ŝi laboras? Neniom li informiĝis. Tamen tio estis nenio miriga.

"Dancu, ne plu atendu... Tuttaga laciga laboro, malvastega loĝejo... Ho, sufiĉe! Apudmetu la afliktaĵon kaj iru danci! Dancu, dancu ĝissate, ju pli lace, des pli plezure!" Ŝajnis al li, ke la bela melodio estis verkita speciale por li. De mateno ĝis vespero li plenigadis deponatestojn kaj nombradis monon ne havante eĉ tempon por disetendi la membrojn kaj oscedi. Hejme li havas sufiĉan tempon, sed la malvasta loĝejo povas enteni nur dutavolan liton — lia frato dormas malsupre, kaj li supre.

Antaŭe li ofte drinkis en drinkejo. Post kiam aperis komercaj balejoj, li ĉesis drinki. Danco estis pli interesa ol stumblado post ebriiĝo.

Ĉe la unuaj fojoj li dancis stulte. Iun tagon li informiĝis de "Vespera Ĵurnalo de Pekino" pri trejna kurso por bala danco, kaj iris sin anonci. La pago ne estis alta, nur dek ĵuan-oj. Post lernado de dek vesperoj li jam povis danci fokstroton, bluson, tangon k.a. Tango havas klaran kaj saltan ritmon, graciajn movojn. La ĉarmaj pozoj de tango kaj lia bela staturo faris lin "princo de tango" en la kurso. Ĉe la finiĝo de la kurso instruanto el danca ensemblo kuraĝigis lin: "Knabego, bone

ekzercu vin. Espereble vi gajnos poste konkurson de bala danco."

Kuraĝigo de la instruanto duobligis lian intereson por danco. Li preferis preni tiun balejon kiel sian "praktikan bazlokcon", kiu, bone dekorite, tamen pagigas ne multe kaj distancas ne malproksime de lia hejmo.

Hieraŭ nokte li renkontis ŝin. Antaŭe li neniam vidis ŝin, sed ŝajnis al li, ke antaŭ longe li devus konatiĝi kun ŝi. Kiam li petis ŝin danci, ŝi konsentis sen ajna ĝeniĝo. Ŝi dancis facile, gracie, la ĉarmaj okuloj similis al steloj kaj pleniĝis de freŝa profunda signifo. Dum dancado, nature leviĝis en lia koro plezuro enmiksita de ebrieco. Li pensis, ke ŝi estis lia plej taŭga



partnero.

“Ĉu mi povus peti vian nomon?”

“Dong,” simple ŝi respondis ridetante.

Li atendis ŝian saman demandon, sed ŝi silentis. Do li devis sin prezenti: “Mia familia nomo estas Feng.” La fraŭlino balancis la kapon kun rideto kaj daŭre dancis absorbite.

Li tre volis demandi, kie ŝi laboras, sed tion li ne faris. Li skrupulis, ke tro prompta demando fortimigos ŝin, kio perdigos al li la partneron.

Post la balo ŝi diris adiaŭon kaj forbiciklis.

Ankaŭ li ekbiciklis. Li devis sin direkti orienten, sed li pretervole sekvis ŝin en distanco de dekelkaj metroj. Li zorgis por ŝia sekureco kaj sin pretigis por defendi ŝin kontraŭ eventuala atenco de kanajlo. Sed nenio okazis. Li vidis, ke ŝi turnis sin en mallarĝan strateton ĉe alta soforo kaj malaperis en nokta vualo.

Li ne petis ŝin veni al la balo la sekvantan vesperon, sed li kredis, ke ŝi venos, ĉar li pensis, ke ŝi estas frekventanto de la balejo, ĉar ŝi dancis tiel gracie, tiel lerte.

Sed fakte ŝi ne venis.

Daŭris la muziko, li dancis unufoje, perdis la intereson kaj sidiĝis apude. Li fiksas la rigardon al la enirejo de la balsalono, esperante la aperon de la alta svelta figuro.

“Majstro, kial vi ne dancas?” alparolis knabino en tipa dialekto de Anhuj-provinco. Ŝia alparolo evidente sugestis, ke ŝi deziris, ke li invitos ŝin al danco.

“Mi ne volas danci,” li fordankis la afablecon de la knabino. Li pensis, ke plue modiĝis la knabinoj el Anhuj, kiuj laboras tage kiel servistinoj kaj lernis danci nokte.

“Do por kio vi venas?” miris la

Anhuj-a knabino.

“Por nenio,” li respondis senzorge.

“Ho, kiel domaĝe pagi la tri ĵuan-ojn por nenio!” miregis la knabino kun larĝe malfermitaj okuloj.

Ankaŭ li mem sentis sin iom stranga. “Kial nepre atendi ŝin? Ĉu mi certas, ke ŝi ne havas amaton, aŭ ŝi konsentos refoje danci kun mi?” li pensis.

Tamen li baldaŭ venis al konvinkiĝo: “Ŝi certe ne havas amaton, alie ŝi ne venis sola al balo; ŝi certe volonte dancos kun mi, ĉar hieraŭ nokte la kundanco estis tre harmonia, eleganta, kiel kune trejnite.” Li eĉ ekhavis novan ideon: Paro povanta danci harmonie, certe povos kunvivi harmonie... Li komencis bedaŭri la malkuraĝon hieraŭ montritan: Kial li ne kuraĝe invitis ŝin al refoja kundanco? Li ekmemoris la rememoraĵon de iu fama generalo publikigitan sur ĵurnalo antaŭ kelkaj tagoj: Foje la generalo renkontis knabinon kaj tuj enamiĝis al ŝi. Li kategorie donis al ŝi paperslipon, sur kiu li skribis: “Mi amas vin.” Li fine gajnis ŝian amon. Li sentis, ke mankis al li ĝuste tia kuraĝo, kiun montris la generalo.

Li stariĝis kaj decidis iri serĉi ŝin. Li imagis, ke ŝi malsaniĝis, kaj li devas iri konsoli ŝin; li supozis, ke ŝi estas solinfano, kaj ŝi devas prizorgi siajn maljunajn gepatrojn, kaj li devas iri helpi ŝin.

Li zumadis biciklante: “Mi serĉas la vojon trarompante la nebulon, viajn piedsignojn esperante trovi. Mi volas revidi vin, por verŝi al vi la koron: ‘Mi amas’...”

Laŭ memoro li trovis la soforon kaj sin turnis en la mallarĝan strateton. Li iris tien kaj reen en la strateto trifoje kaj neniel povis trovi ŝin. Ĉiuj pordoj estis fermitaj.

Sur la larĝa strato oblikve transe de la strateto estis

malgranda drinkejo privata. Magnetofono sur la vendotablo dissendis allogajn popularajn kantojn. Li tre volentis eniri por drinki, sed li skrupulis, ke ŝi abomenas la odoron de drinkinto.

Do li dancis valson sub la soforo, laŭ la melodio de la magnetofono.

Preterpasantoj mire rigardis lin, malrapidigante siajn paŝojn.

Li ridetis al ili sed ne ĉesis.

Sonis bicikla sonorilo malproksime. Ekbrilis liaj okuloj kaj li pretervole kriis: “Dong!”

“Kiu vokas?” la knabino haste haltis sub la soforo. Kiam ŝi rekonis lin, ŝi diris: “Ho, estas vi — por kio vi venis ĉi tien?”

“Hodiaŭ vi ne iris al la balo, kaj mi timis, ke vi malsaniĝis, kaj venis por vidi vin.”

“Dankon,” la knabino estis kortuŝita, “mi revenas de la lecionoj en postlabora universitato.”

“Postlabora universitato?” li murmure ripetis la vorton.

“Jes.”


Eble la longa atendo helpis al li akumuli sufiĉan kuraĝon, aŭ li ekmemoris la kuraĝon de la generalo, li do demandis, sin kuraĝigante: “Ĉu mi povus fari al vi kelkajn demandojn?”

“Pri kio vi volas?” Ŝi ridetis indifere, montrante nek rifuzon, nek konsenton. Ŝi devis konfesi, ke li bone impresis ŝin hieraŭ nokte. Rimarkinte ŝian rideton, li demandis: “Kie vi laboras?”

“Kie vi?” anstataŭ respondi ŝi demandis.

“Mi estas kontisto de plasejo, 24-jara, diplomito de supera mezlernejo, mi laboras jam tri jarojn kaj restas fraŭlo...” senkaŭze li elpoŝigis sian oficistan karton kaj prezentis al ŝi.

La knabino ekridis. Ŝi transpre-



nis la karton kaj atente pririgardis la reliefan stampon, ŝtele komparis lin kun la foto sur la karto, redonis ĝin al li kaj diris al li la nomon kaj la profesion de tajpistino.

Kuraĝigate de ŝia respondo, li faris duan demandon: “Ĉu vi havas amaton?”

“Ne.”

“Do certe altaj estas viaj kriterioj. Kiajn kondiĉojn vi postulas?”

“Unue bona virto, due pli forta ol mi.”

La respondo ĝojigis lin. Li pensis, ke knabino, kiu deziras havi amaton pli talentan ol ŝi, estas senescepte milda; vivi kun tia knabino sendube estas feliĉe. Sed kiam la penso turniĝis aliflanken, li ion bedaŭris opiniante, ke li ne estas pli talenta ol ŝi. Kvankam li dancis elegante, sed por aliaj aferoj, li havas nenion fierindan. Li do demandis ŝin kun maltrank-

vilo: “En kiu flanko pli forta?”

“Ekzemple en kleriteco. Se ne pli, almenaŭ samnivele...”

Ŝia klarigo kvazaŭ frapis sur lian koron: “Ho ve, ŝi lernas en postlabora universitato, sed mi estas nur diplomito de supera mezlernejo. Tamen mi neniel retiriĝos kaj ĉiamaniere klopodos.”

“Ĉu estas facile eniri en postlaboran universitaton?”

“Ekzameno necesas,” ŝi respondis.

Kia ĝenaĵo! Ekzameniĝi estas multe pli malfacile ol lerni en la kurso de bala danco.

“Preparu vin. Vi turnu vin al iu por peti helpon” ŝi entuziasme instigis lin.

Li komprenis, ke ŝi zorgis lin. Sed kiu taŭgos por la helpo? Subite li elbuŝigis: “Ĉu vi helpu min?”

“Mi?” la knabino sentis fortan

korbaton kaj forbiciklis en konsterniĝo. Sed, biciklinte dekelkajn metrojn ŝi returnis sin kaj respondis al li post sinreĝo: “Do konsentite. Mi provu. Tamen mia helpo premisas vian persiston en lernado.”

“Tion mi garantias,” li preskaŭ juris al ŝi.

“Bone. Vi do venu al mia hejmo vespere ĉiu-marde kaj ĵaŭde. Kaj mi devas atentigi vin, ke miaj gepatroj estas tre rigoraj inspektoroj. Vidu, jen mia hejmo,” montrante la profundaĵon de la strateto, ŝi aldonis: “N-ro 20, vi facile trovos ĝin.”

Li akompanis ŝin ĝis ŝia hejmo. En ekstazo li ekdancis valson ĉirkaŭ sia biciklo. Hodiaŭ vespere li ne havis partneron en la balo, sed li havos poste, certe. Li kredas, ke post diplomitiĝo el la postlabora universitato ili ambaŭ partoprenos kune en bala konkurso. ■

Esperantigis Ŭang Gencaj

Kiam ili bezonas helpon...

En la tuta distrikto Ŝjūan'u, urbo Pekino, estiĝis nova moro, moro helpi kaj prizorgi maljunulojn kaj kriplulojn.

Kiam ili bezonas helpon...

Junulo Ĝoŭ Ĝjizong estas katenita en lito pro paralizo dum dekelkaj jaroj. Lia patro mortis antaŭlonge. Lia patrino zorgis pri lia ĉiutaga vivo. Malfeliĉe, ankaŭ ŝi mortis de malsano. En la senlira situacio li preskaŭ perdis la kuraĝon vivi.

Ĝuste tiam gejunuloj el najbara restoracio alportis manĝaĵojn al lia lito. Ili promesis, ke de tiam ili zorgos pri lia vivo. Ekde tiu tago, ili akurate alportas al li manĝaĵojn. Iun tagon senĉese pluvegis. Ĝoŭ rigardis tra la fenestro kaj vidis nenium veni. Li maltrankviliĝis pri la tagmanĝo, kaj li jam estis preta elteni

malsaton. Sed apenaŭ batis la 12-a horo, Ĝang el la restoracio eniris la dometon de Ĝoŭ, kun manĝaĵo sub pluvmantelo. Poste Ĝoŭ konatiĝis kun multaj gejunuloj, kiuj ofte venis ripari por li magnetofonon, tondi al li harojn kaj babili kun li. Lia dometo estis ofte plena de gejunuloj, kies rido kaj parolo sentigis al li varmon en la koro. Li diris: "Mi estas en malfacilo, sed renkontis multajn bonajn kamaradojn. Mi ne sentas solecon."

Ĝoŭ Ĉangĝjun, 92-jara, vivas sola. Cirkulas la diro, ke aĝo tro matura ne estas plezura. Sed la profundaĝulo ja ĝuas la vivĝojn. De tempo al tempo gejunuloj alportas al li nutraĵojn, karbon kaj legomojn, kaj antaŭ festaj tagoj purigas por li domon kaj pendigas por li paperon kun versparoj. Geknaboj legas por li ĵurnalojn


kaj prezentas por li amuzajn programerojn; en printempo oni akompanas lin al parko; ĉe la alveno de vintro oni pretigas al li vatitajn vestojn kaj instalas por li fornon. La loĝantara komitato instalas por li televidilon. La najbaroj respektas kaj prizorgas lin. Kiu ajn preparas bongustaĵojn, donacas al li iom. Intervjuate de raportisto, la maljunulo diris kun larmoj en la okuloj: "Antaŭe mi multe suferis. Mia solfilino mortis. Mortis de malsano ankaŭ mia edzino antaŭ du jaroj. Mi fariĝis maljuna vidvo. Mi supozis, ke mi havos neelteneblajn tagojn. Sed ekster mia atendo mi nun vivas plezure!"

Ĉio ĉi tio okazis, post kiam membroj de la Junulara Ligo kaj la gejunuloj en la stratoj de la distrikto Ŝjūan'u ekpraktikis "laŭkontraktan prizorgon" al soluloj, maljunuloj, kripluloj kaj malsanuloj.

Kio estas "laŭkontrakta prizorgo"? Kiel ĝi estiĝis? Tion ni rakontu per solena subskriba ceremonio.

Iun frumatemon en februaro 1983, la 80-jara maljunulo Jang de Daŝila-strato bonhumore venis kun sia privata sigelilo al infanĝardeno, kiu servis kiel provizora kunvenejo. Tie liaj malnovaj amikoj jam atendis lin. Tiuj senhelpaj maljunuloj estis partoprenontaj en unika kontrakto-subskriba ceremonio.

Ĉe unu flanko de la kunvenejo sidis reprezentantoj de junaj laboristoj kaj oficistoj de dekelkaj fakoj komercaj kaj servaj de



Juna kuracistino ekzamenas maljunulinon.



Lernantinoj legas gazeton por maljunulo Ĝou Ĉangĝjun.



Membroj de laŭkontrakta servogrupo portas toŭfuojn al maljunulino Li.

la loĝkvartalo; ĉe la alia flanko, dekelkaj senhelpaj maljunuloj. Sur la tablo estis ruĝa kontraktoformuloj, sur kies ruĝa kovrilo estis oraj vortoj. La kontrakto legiĝas: la laŭkontrakta prizorga reto, formita de gejunuloj de la magazenoj, vendejoj de almanĝaĵoj, malsanulejoj kaj banejoj, praktikas prizorgon al 19 malsanaj kaj kriplaj maljunuloj de nia kvartalo; la taskoj de la reto ampleksas alporton de ĉiutagaj bezonaĵoj, almanĝaĵoj, legomoj, karbo kaj greno, riparon de loĝdomoj, hartondadon, akompanon al banejo, kuracadon kaj ĉiutagan flegadon. Post kiam la prezidanto de la ceremonio voĉlegis la kontrakton, la gejunuloj laŭvice subskribis la kontrakton kaj la maljunuloj stampis ĝin per sia privata sigelilo.

La laŭkontrakta prizorgo disvastiĝis iom post iom. Antaŭ 6 jaroj, vizitante emeritojn kaj riparante domojn por loĝantoj, junaj laborantoj de la loĝejoadministracio trovis, ke pluraj maljunuloj havas malfacilojn en la ĉiutaga vivo. Ili komencis helpi tiujn maljunajn solulojn aĉeti ĉiutagajn bezonaĵojn kaj donis al ili flegon. Tion ili silente faris dum du jaroj sen distrumpeti. Poste la Distrikta Komitato de la Junulara Ligo informiĝis pri tio kaj

plivastigis la servon. Ĝi organizis la gejunulojn el diversaj okupoj en servogrupojn, kiuj praktikas prizorgon al senhelpaj maljunuloj en tia maniero, ke ĉiu elektu celon el la plej proksima najbaro kaj regule vizitu la helpaton. Krom tio la kontrakto difinis ankaŭ la detalojn de la prizorgo. Tiamaniere la gejunuloj ligis malsamajn generaciojn el malsamaj familioj per amoplena flegado.

Ne ĉiuj maljunuloj kredis je la servo ĉe la komenco. Uang Mingljang ja estis unu el la dubintoj. Iun tagon kelkaj junuloj venis al li, sed ilin atendis nur la fermita pordo. Sur la fenestro pendis slipo kun vortoj: "Venu je 7:30 vespere, se necese." La malvarma akcepto ne deprimis la gejunulojn. Je 7:30 ili venis denove. La maljunulo tamen apatie diris: "Ne plu venu." Iu junulo klarigis: "Avo, ni ne intencas fari sensacion per formalajoj. Ni sincere volas helpi vin. Bonvolu diri al ni, kiajn malfacilojn vi havas." "Malfacilojn?" respondis la maljunulo. "malfacilojn ja multajn mi havas: la domo estas malpura; nenien mi povas meti la fornon en somero; mi ne havas forton lavi miajn malpurajn vestojn..." En la sekva tago la gejunuloj de la loĝejoadministracio venis kalki lian

domon. Ili faris pluvŝirmilon sub la tegmenta rando. Kaj gejunuloj de la strato purigis lian domon kaj lavis liajn litajojn kaj vestojn. Rigardante la purigitan domon kaj la gejunulojn kovritajn de polvo kaj ŝvito, la maljunulo povis diri nenion pro emocio. Li kaptis manon de iu junulo: "Antaŭe mi rigardis vian servon kiel afekton. Mi ne atendis, ke vi estas sinceraj. Nun mi estas konvinkita."

La laŭkontrakta prizorgo de la gejunuloj de Daŝila-strato trovis varman resonon ĉe la publiko kaj multajn imitantojn inter geknaboj. En la distrikto Ŝĵuan'u fondiĝis unu post alia 8 strataj laŭkontraktaj prizorgaj retoj. En la loĝkvartalo Ĉajŝikoŭ, gejunuloj de dekelkaj unuoj subskribis similan kontrakton kun blindula laborejo de iu fabriko. Pli ol 2 000 lernantoj de 45 lernejoj de la distrikto partoprenis en la agado. Nun entute pli ol 4 000 homoj partoprenas en la laŭkontrakta prizorgo; la nombro de prizorgatoj atingis 2 000.

Dum la pasintaj jaroj tiuj retoj persiste flegis maljunulojn kaj kriplulojn. Nun tia aktivado jam populariĝas en Pekino. Komence oni kontentigis nur la materian bezonon de la helpatoj kaj nun ankaŭ riĉigis ilian spiritan kaj

Laba-kaĉo

de ĈEN BAŬHE

En la plejparto de Ĉinio oni havas la moron festi la okan de la dekdua monato laŭ la luna kalendaro (en la ĉina lingvo "laba" signifas la okan de la dekdua monato laŭ la luna kalendaro).

Ĝia ĉefa enhavo estas manĝi Laba-kaĉon el glueca milio, rizo, glueca rizo, milio, trapa kerno, kaŝtano, ruĝa fabo, jujubo, amando, juglanda kerno, melon-sono, ternukso, pinsemo, rosino, sukero ktp. Ĝi estas nutrriĉa, bongusta kaj multkolora. En frosta vintro, manĝinte varman Laba-kaĉon, oni sentas varmon kaj plezuron.

Oni diras, ke la moro originis de budaismo. Inter la ĉinaj popolanoj cirkulas rakonto: Forlasinte sian hejmon, Ŝakjamunio, la kreinto de budaismo, vojaĝis en multaj famaj montoj kaj laŭ grandaj riveroj por serĉi la veron de la homaro. De la longdistanca irado li tre malfortiĝis kaj svenis iutage ĉe la bordo de Niljan-rivero. Tiam, iu bonkora ŝafistino preparis por li bovlon da bongusta kaĉo el rizo, faboj kaj sovaĝaj fruktoj. Manĝinte la kaĉon, baldaŭ resaniĝis Ŝakjamunio. Poste, ĉiujare en tiu tago oni

kuiris kaĉon por kulti budhojn kaj jaron post jaro daŭris la moro.

Legendo diras, ke por pekianoj havas longan historion la moro festi la okan de la dekdua monato laŭ la luna kalendaro. En Ming- kaj Ĉing-dinastioj (1368-1911 p.K.), en tiu tago la en- kaj eksterurbaj pekianoj preparis tian kaĉon por kulti budhojn. La templo Jonghegong, la plej granda budaisma templo en Pekino, ĉiujare prenis oferadon de Laba-kaĉo en la tago kiel solenan aferon. Antikva libro notas, ke la lamaoj en la templo Jonghegong ĉiujare en tiu tago kuiris tian

kaĉon en giganta kaldrono por kulti budhojn. La kortego de Ĉing-dinastio eĉ sendis korteganojn observi la aktivadon por montri la piecon. Tiutempe, krom kulti budhojn oni ankaŭ devis oferi la kaĉon al imperiestro kaj aliaj homoj en la Imperiestra Palaco. Tial ekstreme solena kaj spektakla estis tiu tago.

Nun pli riĉaj estas la kaĉmaterialoj por ĉinoj. Ekz., oni aldonas konfitaĵojn, lotussemojn, longanojn ktp. Tiutage multaj familioj eĉ eksplodigas krakfajraĵojn kaj ĉiuj familianoj drinkas ĉe tablo kun granda ĝojo. ■




kulturan vivon.

Ĝoŭ Ĝjzong, la junulo menciita ĉe la komenco de la artikolo, nun havas pli riĉan spiritan vivon, prizorgate en la ĉiutaga vivo. La prizorgantoj pruntedonis al li librojn. Ili kuraĝigas lin, ke li fariĝu fortulo en vivbatalo:

kriplulo povas havi fortan volon kaj havi belan kaj enhavoriĉan vivon, same kiel la sanaj junuloj. Helpate de la gejunuloj, Ĝoŭ ĉiutage persistas en lernado de la kursoj de televida universitato. Liaj tri olepentraĵoj estis montrataj en ekspozicio de la distrikto

kaj gajnis premion kaj honorateston. En letero al gazeto li skribis: "Mi esperas, ke mi povos venki malsanon kaj reveni al mia laborposteno kaj kontribui al nia lando. Tiam same kiel tiuj junuloj, kiuj prizorgas min, mi sentigos pli da varmo al aliaj." ■



Ĉe marbordo de Ŝingĉeng

ŜJU TJAN:

Ŝingĉeng — turisma pitoreskejo

La urbo Ŝingĉeng meze de la Okcidenta Koridoro en Ljaŭning-provinco, havas ĉarmajn pejzaĝojn, salubran klimaton kaj oportunan trafikon. Ĝi estas nove konstruita turisma pitoreskejo ĉe la marbordo de norda Ĉinio.

LA KVIN PEJZAĜOJ DE LA URBO

Oni diras, ke en Ŝingĉeng ekzistas " kvin valoraĵoj ": urbo,

varma fonto, monto, maro kaj insulo.

Rigardante malsupren de sur la grandiozaj Sonorila Turo kaj la Tambura Turo, oni povas vidi la belan panoramon de la urbo. La antikva urbo Ŝingĉeng estis kvadrata. Ĝiaj orienta, okcidenta, suda kaj norda pordegturoj majeste staras en la kvar flankoj. La alta urbomuro, temploj kaj

ŝtonaj arkaĵoj vidiĝas ĉirkaŭe de la urbo kaj interne de ĝi. Ĝi estas unu el la plej bone konservataj antikvaj urboj en Ĉinio. Oni konigis al mi, ke la antikva urbo Ŝingĉeng ekkonstruiĝis en 1428 kiel grava trairejo ekster Ŝanhajĝuan-pasejo de Ming-dinastio. Sur la suda strato de la antikva urbo oni konstruas pompajn konstruaĵojn, butikojn, drinkejojn ktp., en arkitektura stilo de Ming-dinas-



Ŝtona arkaĵo de Ming-dinastio en Ŝingĉeng

tio, kiuj plibeligos la urbon.

La varma fonto, 2.5 kilometrojn oriente de la antikva urbo Ŝingĉeng, estas senkolora, nemalbonodora kaj travidebla, kun temperaturo de 70 °C. Ĝi havas kompare altan kuracvaloron pro siaj dekelkaj mineralaj elementoj, kiaj kalio, natrio, kalcio, magnezio, amonio, radono ktp.

Ŝouŝan-monto en homkapa formo altas 329 metrojn super la marnivelo. Ĝia grandioza aspekto ĉe la maro kaj la urbo kaj la antikva signalalarma turo sur la ĉefa montpinto estas vere admirindaj. Aŭte veturante laŭ la spirala montvojo, oni de tempo al tempo renkontas danĝerojn. Ie malsupre sidas la antikva templo ŝirmita de arboj, zigzagas pado, kio impresas kiel surtera paradizo. Rigardante la antikvan urbon kaj la vastan maron de sur la monto, oni sentas grandan plezuron. Kiam la suno leviĝas, oni povas vidi, ke "verdas la sudoriento, dum disiĝas nuboj kaj nebuloj, ruĝiĝas la supro kaj malsupro, dum la suno lumigas la vastan maron".

Ĉe la marbordo estas trietaĝa arkaĵo kun kvar kolonoj, apud

kiuj sidas ok belaspektaj blankmarmoraj leonoj.

La marbordo de Ŝingĉeng longas je 120 kilometroj kaj ĉe ĝi kuŝas kvar golfoj kun totala longeco de 14 kilometroj, kiuj ĉiuj estas idealaj ĉemaraj naĝejoj. La strando estas delikata, mola kaj jade kristala. La travidebla marakvo kun modera profundeco estas taŭga por naĝado. Tie prosperas arboj, kaj aŭtune promeni ĉe la marbordo estas vere agrable. Kvankam ne estas prospera someruma sezono en iuj lokoj, tamen ne malmultiĝas turistoj. La turistoj ĉe la marbordo kaj sunombreloj formas multkoloran bildon. Oni naĝas en la maro kaj amuzas sin kontraŭ tajdoj sur la strando. Regas vigleco ĉie ĉe la golfoj.

De la marbordo oni povas vidi la sudan Krizanteman Insulon en la maro 9 kilometrojn fore, kiu havas areon de 13.2 kvadrataj kilometroj. Tie iam estis fama budhisma vidindejo en la dinastioj Ljaŭ kaj Ĝin (la 10-a — la 13-a jc.). Eĉ hodiaŭ vidiĝas tie la Templo de Granda Drako, Domo de Granda Kompato, Ok-angula Glazura Puto k.a.

LA REPROSPERO DE ŜINGĈENG

En 1984 Ŝingĉeng estis malfermita kiel turisma urbo. La urbo kulturis kaj engaĝis aron da turismaj fakuloj, kolektis konstruan fonduson, plifortigis kaj plibonigis fundamentajn instalaĵojn kaj entreprenis turisman aferon.

En la lastaj tri jaroj la nombro de en- kaj eksterlandaj turistoj venintaj al Ŝingĉeng kreskis de 30 000 kaj 100 000 homfojoj al 30 milionoj, kio portis prosperon al Ŝingĉeng. La disvolviĝo de turismo kaŭzis prosperon de industrio, agrikulturo kaj la terciara industrio. La totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo altiĝis de 167 milionoj da jŭanoj al 376.5 milionoj. Interalie, la industria produktovaloro kreskis de 63 milionoj da jŭanoj al 219 milionoj kaj la agrikultura produktovaloro de 103 milionoj da jŭanoj al 157 milionoj. La nombro de laborantoj de la terciara industrio kreskis de 16 000 al 37 000. La servado al la grandnombraj turistoj rimarkinde pliigis la enspezon de turisma afero. En 1986 la tieaj 20 turismaj servoj enspezis 37.37 milionojn da jŭanoj. Pro multiĝo de turistoj la koncernaj lokaj departementoj reguligis sian produktan strukturon, fondis du grandajn produktajn bazlokojn de akvoproduktaĵoj kaj fruktoj, kaj ellaboris kiel ĉefan punkton la planon pri disvolvo de brutobredado, paŝtado kaj legomokulturo. La multiĝo de legomoj, fruktoj kaj akvoproduktaĵoj kontentigis bezonon de la turistoj kaj profitigis la loĝantojn. En 1986 iliaj produktokvantoj ĉiuj kreis novan rekordon.

Nun, estas jam fundamente finkonstruitaj la publikaj instalaĵoj pri malpurakvo-drenado, akvoprovizado, trafiko ktp. Antaŭe en la urbo staris nur dekelkaj dukaj tri-etaĝaj domoj, sed nun, laŭ la ĝenerala urba projekto, en kelkaj distriktoj jam formiĝis turismaj vidindejoj. ■

Virinaj vestoj kaj galanterio en la historio de Ĉinio

Estas interese studi pri la evoluo de la virinaj vestoj kaj galanterio kaj pri la koncepto pri ili en la pasintaj jarmiloj de Ĉinio. La evoluo de la vestoj kaj galanterio spegulis la materian produktadon, ideologion kaj kulturon en la koncernata periodo. Ĉinio estas antikva, kultura kaj multnacia lando. Dum multaj jaroj la interŝanĝo kaj reciproka influo de diversaj nacioj kreis sennombrajn belajn vestojn kaj galanterion, el kiuj la virinaj estas tre variaj kaj


abundaj.

En la nuna jarcento oni elterigis en Ĉangŝa, Hunan-provinco, silkajn pentraĵojn kaj lignajn homfigurojn, kiuj montris la evoluon de la virinaj vestoj de jako kaj pantalono de la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.) al la virinaj roboj de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.k.-25 p.K.), kun basko, ortangula kolumo kaj vestrando oblikve volvita al la dorso tuj ĉe la dekstra aksele. De tio oni rajtas diri, ke la nunaj

modaj virinaj roboj originis de la periodo de Militantaj Regnoj, Ĉinio. Ili estis furoraj en la tiama ĉina socio.

De la 3-a ĝis la 5-a jc. aperis granda kunfandiĝo de la ĉinaj nacioj, kiuj influis unu alian, dume la vestoj kaj galanterio de la hanoj havis novan ŝanĝiĝon. Oni elterigis el tombo de la Norda Ĉji-regno (550-577 p.K.) en Tajjūan, Ŝanŝji-provinco, terakotajn homfigurojn, kiuj portis vestojn

Robo kun basko de la periodo de Militantaj Regnoj



Grandsinjorino en larĝmanika vesto kaj alta krono de Tang-dinastio





Virina vesto de la meza Tang-dinastio



Virinoj kaj infanoj en vesto kun desegnoj de Ĉing-dinastio

ĝisgenuajn kun larĝaj manikoj. V-forma kolumo kaj larĝajn pantalonojn por faciligi rajdadon. En la gubernio Dengŝjan, Henan-provinco, sur brikaj bildoj vidiĝas nobelinoj portantaj vestojn kun du larĝaj simetriaj strioj, kiuj estis tre modaj siatempe. La terakotaj virinoj elterigitaj en Nankino estis diferencaj de tiuj en la nordo. La antaŭaj portis jakon kaj jupon, kio estas karakterizaĵo de la vestoj de la sudaj virinoj de Ĉinio.

En la dinastioj Suj (581-618 p.K.) kaj Tang (618-907 p.K.) prosperis la ĉina kulturo. Tiam estis ofta la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj aliaj landoj. La vestoj de la hanaj virinoj asimilis la trajtojn de tiuj de Ŝinĝjang kaj la Okcidenta Azio. En la frua Tang-

dinastio furoris vestoj kun striktaj manikoj. La tiamaj virinaj vestoj konsistis ĉefe el jakoj, jupo kaj skarpo. La vestoj de plebaj virinoj havis striktajn manikojn kaj longan jupon el dukoloraj silkaĵoj kovrantan supre ĝis la manoj. La danc-kostumoj ĝenerale surhavis broditajn florojn kaj birdojn. En la frua Tang-dinastio la virinoj ŝatis altajn hartuberojn kun kombiletoj kelkaj, maksimume dekelkaj. Poste la metitaj kombiloj malmultiĝis, tamen grandiĝis. En Song-dinastio (960-1279 p.K.) la ornamaj kombiloj eĉ longis 40 cm. En Tang-dinastio nobelinoj ornamis sin ankaŭ per falsaj hartuberoj. Tiam la virinoj ŝatis pentri siajn brovojn en mallarĝajn longajn aŭ densajn larĝajn. Junaj virinoj ŝatis ŝirmi

sian frunton per silk-gazo, kio estis tre moda siatempe.

De post la meza Tang-dinastio multe ŝanĝiĝis la virinaj vestoj kaj ekfuroris vasta vesto kun larĝaj manikoj. En Tang-dinastio la virinoj ŝatis porti virajn vestojn, cilindran ĉapelon, robon kun ronda kolumo kaj duonmanikoj.

En la prospera periodo de Tang-dinastio oni opiniis, ke diketa virino estas bela, pro tio ankaŭ la vestoj kaj galanterio fariĝis pompaj. La tiamaj virinoj ŝatis pentri flavan punkton sur sia frunto, floron sur vizaĝo, lunarkon ĉe la vangorandoj aŭ ruĝigi sian vangkavetojn. La tiamaj virinoj ŝatis porti kronojn kun naturaj peonioj. Tia ornamo daŭris ĝis Song-dinastio.



En Song-dinastio la virinaj vestoj estis longaj kaj malvastaj supre kun jako mallarg-manika. Tiam ĉu riĉaj ĉu malriĉaj virinoj ĉiu ŝatis porti kombilon sur sia kapo. En la Norda Song-dinastio (960-1127 p.K.) la virinoj ŝatis grandan hartuberon kun granda kombilo kaj ankaŭ krono, influate de tiam ĝenerala florkultivado. En malsamaj sezonoj oni portis malsamajn freŝajn florojn kaj krome kronon el diverskoloraj silkajoj, tetrapano (*Tetrapanax payrifera*), oro, jado, keloni-ŝela ornamaĵo kaj perlo.


Ĉar la tiamaj virinoj ŝatis altan kaj grandan kronon, la kortego faris limigon pri la virinaj kronoj: “La virina krono ne devas superi 7 colojn (ĉ. 23 cm.) en la alteco, 1 futon (ĉ. 33 cm.) en la larĝeco kaj la kombilo ne superu 1 futon en longeco.”

En Jŭan-dinastio (1271-1368 p.K.) la virinaj vestoj karakteriziĝis per klaraj trajtoj de la mongolaj. Aristokratinoj portis

ĉapon pli ol 60 cm. altan, nome, Gugu-ĉapon kun fer-drata framo volvita per ruĝa kaj nigra sateno ornamita per oraj bidoj. Iuj aldonis belan fazanan plumon al Gugu-ĉapo.

En la dinastioj Ming (1368-1644) kaj Ĉing (1644-1911) furoris *bigja* (senmanika kaj senkoloma robo estis ofte portata en aŭtuno, vintro kaj eĉ somero) kaj *junĝjan* (skarpo). *Bigja* estis multkolora, harmonia kolore kun la vesto. La modiĝo de *bigja* atestis, ke la tiamaj virinoj alte taksis la vestokoloron. En la sudo la virinoj de la meza socitavolo ŝatis veston kun kolomo pli ol 4 cm. alta kun unu aŭ du butonoj el oro aŭ arĝento. La vesto ĝenerale estis ornamita per paro da papilioj broditaj. Tia desegno furoris unue inter la popolanoj kaj poste en la palaco. Iuj virinoj portis malgrandan *junĝjan* kun formo de salika folio malsupre de la kolomo de sia vesto. Furoris volutforma hartubero sur la verto en la provincoj Ĝjansu kaj Ĝeĝjang. ■

Grandsinjorinoj en mallonga jaketo kaj longa jupo kaj kun pinglo sur la kapo kaj servistino en robo de Song-dinastio



Riĉa suda Siĉŭan

Teksto de GE ŜI

Fotoj de HAJ FENG

Adiaŭinte la Gigantan Budhostatuon en Leŝan, ni ŝipveturis laŭ la fluo de Mingĵang-rivero al Jibin ĉe la kunfluejo de Mingĵang kaj Jangzi, al Luĝoŭ ĉe la kunfluejo de Tŭoĝjang kaj Jangzi kaj al la fama sala urbo Zigong.

Jangzi estas kutima nomo por ĝia malsupra parto ekde Jibin, kaj la 1 020-kilometra riverparto inter Jibin kaj Jiĉang de Hubej-provinco estas rigardata kiel la supra parto de Jangzi-rivero.

La loko situas ĉe la fundo de Siĉŭan-baseno. Jangzi-rivero, ĝin trapasanta, enprenante en sin akvon de multaj riveroj, torentas pro la vasta surfaco kaj tre oportunas al la akva trafiko. Malpezaj ŝipoj povas rekte atingi Ŝanhajon de Leŝan preter Jibin.

Tie sur la rivero navetas flosoj kaj ŝipoj pasaĝeraj, kargaj kaj lignaj. Evidente, Jangzi kun siaj branĉoj ludas gravan rolon por la tiea ekonomia disvolviĝo per sia potenca akvoforto.

NOVAJ INDUSTRIAJ URBOJ


Tie la naturaj kondiĉoj estas bonaj, klimato varmeta kaj malseka, prosperas la subtropikaj vegetaĵoj, ĉiam regas verdo kaj abundas minaĵoj, ĝuste pro kio la loko estas dense loĝata jam de antikve. Ĉar ĝi situas inter Ĉengdu, la provinca ĉefurbo, kaj Ĉongĉing, la plej granda urbo en la sudokcidenta parto de Ĉinio kaj en la limregiono de la provincoj Siĉŭan kaj Gujĝoŭ, en ĝi trairas la

fervojo de Ĉengdu al Ĉongĉing kaj tiu de Nejĝjang al Kunming kaj plie bone funkcias la akvovojo de Jangzi-rivero, tial rapide disvolviĝas ĝia ekonomio kaj ĝi estas unu el la gravaj industriaj kaj agrikulturaj bazoj de Siĉŭan-provinco.

Jibin, Zigong kaj Luĝoŭ estas novaj industriaj urboj. Dum nia intervjuado en la tri urboj ni trovis ilian komunan trajton, t.e. tre klara ŝanĝiĝo. En la malnovaj urboj la domoj kun trajtoj de antikvaj konstruaĵoj estas simplaj kaj la stratoj mallarĝaj, sed en la novaj kvartaloj arbore staras altaj domoj kaj sterniĝas larĝaj stratoj. Kia kontrasto! Ili reprezentas du malsamajn periodojn de la socio. En tiuj tri urboj ni vizitis iujn industriajn fabrikojn kaj agrikulturajn bazojn kun reprezentaj trajtoj.

La Jibin-a Paperfabriko estas unu el la ok grandaj paperfabrikoj de Ĉinio. La fabrikestro konigis al ni, ke la fabriko fondiĝis en 1944, kaj la unua peco de la porĵurnala papero de Ĉinio ja estis farita de ĝi. Nun ĝi povas produkti 50 mil tunojn da papero ĉiujare, el kiuj 80% estas por presi ĵurnalojn, dum malmulte da libropapero kaj veleno eksportiĝas al Hongkongo, Tajlando k.a. Antaŭ nelonge la ŝtato investis 100 milionojn da jŭanoj por reformi ĝiajn ekipaĵojn.

Zigong, sala urbo en sudokcidenta Ĉinio, ekproduktis salon





Jibin trafluata de Jangzi-rivero

jam antaŭ 2 000 jaroj. La putsalo de la loko konsistigas 40% de tiu de la lando. Tie troviĝas scienc-esplora kaj produkta bazo de putsalo, la plej granda en la lando. Tie la kemia industrio estas prospera. La produktokvanto de sodo kaj kaŭstika sodo kaj aliaj 30 specoj sin trovas inter la unuaj lokoj de la provinco kaj eĉ de la lando.

Luĝoŭ estas nova industria urbo de natura gaso kaj konstruaj maŝinoj. Ĉiujare ĝi produktas pli ol 1.5 miliardojn da kubmetroj da natura gaso. Nun en tiu urbo estas pli ol 60 kemiindustriaj entreprenoj, kiuj povas fabriki centojn da specoj de kemiindustriaj produktaĵoj. La Naturgasa Kemiindustria Fabriko de Luĝoŭ, starigita en la komenco de la 60-aj jaroj, ĉiujare produktas 400 mil tunojn da sinteza amoniako kaj 640 mil tunojn da ureo. Ĝi estas la plej granda urea fabriko de Ĉinio en la nuntempo.

Progresas ankaŭ la konstrum-aŝina industrio de Luĝoŭ. Nun tie funkcias 428 maŝinindustriaj entreprenoj, kiuj fabrikas ekipaĵojn por granda konstruado, ŝipfarado, agrikulturo kaj minejoj,

sume 15 kategorioj kun 2 000 specoj de maŝinoj. Iuj el ili vendiĝas en FR Germanio, Japanio kaj aliaj landoj. La Jangzi-a Levmaŝina Fabriko, kiun ni vizitis, estas grava entrepreno produktanta unike grandpovajn kaj mezgrandpovajn hidraŭlikajn aŭtajn levmaŝinojn. La de ĝi fabrikitaj 80-tunaj kaj 125-tunaj hidraŭlikaj aŭtaj levmaŝinoj estas la plej grandaj nun en Ĉinio. Hodiaŭ en la mondo nur 4 landoj povas produkti tiajn levmaŝinojn.


HEJMLOKO DE PENDANTAJ ĈERKOJ, SALPUTOJ KAJ DINOSAŬROJ

Pro sia groteska topografio kaj longa historio la loko havas multajn naturajn vidindejojn kaj historiajn restaĵojn, kiuj tre interesas turistojn.

Konservi kadavrojn en pendantaj ĉerkoj estas sepulta maniero de iu antikva nacimalplimulto de Ĉinio. Oni pendigis ĉerkojn kun kadavro sur krutaĵoj. La suda parto de Siĉŭan-provinco estis loko koncentre loĝata de antikvaj nacimalplimultoj. En la gubernio

Gongŝjan kaj Ŝingŭen de Jibin iam loĝis antikvaj bo-oj, pro kio tie troviĝas tre multaj pendantaj ĉerkoj. En Makŭangba de Gongŝjan-gubernio ni rigardis la pendantajn ĉerkojn: Sur altaj krutaĵoj vidiĝas multaj ĉerkoj, kiuj kuŝas aŭ sur lignaj palisoj sur apika krutaĵo aŭ en rokaj fendoj, 30-50 metrojn super la tero. Tie kaj ĉi tie vidiĝas surrokaj bildoj proksime al la pendantaj ĉerkoj. Sur la krutaĵo Laŭjingjan ĉerkoj pendas pli ol 100 metrojn super la tero. Estas neimageble, kiamaniere oni metis la ĉerkojn tien. La bo-oj jam pereis, kaj nur la pendantaj ĉerkoj restas nesolvebla enigmo.

La Ŝtona Arbaro kaj la Bambua Maro plene spegulas la mirindan forton de la naturo. La Ŝtona Arbaro en spaco de 15 km troviĝas 30 km sude de la gubernio Ŝingŭen. En la vasta Ŝtona Arbaro groteskaj rokegoj elstaras, belaj pejzaĝoj varias. Ĝi diferencas de la Ŝtona Arbaro proksime al la urbo Kunming de Junnan-provinco per tio, ke tie sub la tero faŭkas multaj diversformaj karstaj kavernoj kun mirindaj pejzaĝoj. La Bambua Maro pli ol 4 000 hektarojn



Ŝenhaj-puto

granda kuŝas sudokcidente de Ljantjan-monto inter la gubernioj Ĉangning kaj Ĝjang'an. Tie la bambuoj estas ĉiam verdaj, pejzaĝoj belaj, kaj troveblas temploj, kavernoj, kaskadoj kaj rojoj, pro kio la loko fariĝis ideala somerumejo.

En Zigong estas salputo pli ol mil metrojn profunda, unika en la mondo — Ŝenhaj-puto, fosita antaŭ pli ol 200 jaroj, kun skafaldo el gigantaj arbotrunkoj. Kun miro ni trovis, ke tiu malnova puto daŭre donas salon. Laboristoj preparas salon kaj salpetron per grandaj feraj potoj laŭ primitiva metodo.

En la urbocentro troviĝas la majesta kaj pompa Zigong-a Muzeo de Sal-produkta Historio. La konstruaĵo mem estas tre valora por rigardo. Ĝia direktoro diris al ni, ke la muzeo, konstruita en 1736, antaŭe estis domo por renkontiĝo de lokaj komercistoj. Pro sia originala arkitektura strukturo ĝi estas raraĵo de la antikvaj konstruaĵoj. En la muzeo konserviĝas grandnombraj his-

toriaj literaturoj pri la disvolviĝo de salproduktado, driloj antikvaj kaj modernaj kaj aliaj objektoj. En 1983 la Asocio de la Internaciaj Muzeoj envicigis ĝin en la sep ĉinajn muzeojn kun originalaj trajtoj.

Zigong estas rigardata ankaŭ kiel hejmloko de dinosaŭroj. Ĝis nun en tiu urbo oni trovis pli ol 50 fosilhavajn lokojn. En la 80-aj jaroj en Daŝanpu oni elterigis dinosaŭrajn fosiliojn kun pli ol cent pecoj de objektoj de la meza ĵuraso antaŭ 160 milionoj da jaroj. Tie la fosilioj estas abundaj, specoj multaj, kaj krome, bone konservitaj, kio estas unika en- kaj eksterlande. La en- kaj eksterlandaj fakuloj nomas la lokon "kavernaro de dinosaŭroj kaj miraklo de la mondo". En la muzeo de dinosaŭroj, la unua en Ĉinio, nove konstruita ĉe Daŝanpu, iom post iom konstruiĝos dinosaŭra parko, servanta al scienc-esplorado, scienca populargio, edukado kaj turismo.

Se vi vizitas la urbon en la Printempa Festo, vi povas ĝui la grandiozan dinosaŭr-lanternan spektaklon kaj koni la lokajn morojn.

ĈIE AROMAS VINO

Vino estas fama produktaĵo de la loko. Tie preskaŭ en ĉiu gubernio kaj ĉiu distrikto troviĝas vinfarejo kaj ĉie oni regalas gastojn per vino. Ni ne drinkas, sed dum la intervjuado ni devis ĉiutage iom trinki kaj dank' al tio akiris iom da scioj pri vinguŝtumado. Kompreneble el la sennombraj specoj de vino la plej fama estas Uljang-brando de Jibin, Ĉjuĝiŭ-brando de Malnova Kelo kaj Langĝiŭ-brando de Luĝoŭ.

Uljang-brando estas tre aroma, fermentinta kaj distilita el 5 specoj de grenoj miksitaj. Ĝi estas longe aroma kaj dolĉeta. Ĝi estas unu el la eminentaj tradiciaj

produktaĵoj de Ĉinio, kun historio de pli ol mil jaroj. Ekde la 60-aj jaroj ĝi plurfoje estis juĝita kiel landfama alkoholaĵo, multe plaĉa al klientoj, kaj havas grandan debiton. La Farejo de Uljang-brando de Jibin vastigis sian laborejon por levi la produktopovon, kaj krome, konforme al la ŝanĝiĝo de la kutimoj de en- kaj eksterlandaj klientoj, komencis produkti serion da brandoj kun kompare malmulte da alkoholo, kun marko "Uljang".

En Luĝoŭ, konata kiel urbo de vino, ĉie troviĝas drinkejoj, kio preskaŭ ebriigus la pasantojn nedrinkintajn. Vinfarejoj troviĝas ĉie en la urbo. Ĉiujare ili produktas pli ol 69 000 tunojn da brando, rumo, ratafio kaj aliaj. La vin-imposto konsistigas trionon de la totala imposta enspezo de la urbo.

Jam en 225 p.K. en Luĝoŭ estiĝis vin-distilado. Dank'al la senĉesa teknika progreso en la regperiodo de imperiestro Ĝu Jiĝjun (1573-1619 sur trono) de Ming-dinastio oni faris landfaman Daĉju-brandon. Nun la Farejo de Ĉjuĝiŭ-brando de Luĝoŭ ankoraŭ konservas pli-ol-400-jaran vin-kelon. Pro tio ĝia brando estas nomata Brando de Malnova Kelo.

Daĉju-brando de Malnova Kelo de Luĝoŭ estas tre aroma, bongusta, refreŝiga kaj vekanta agrablan postguston, pro kio ĝi estas honorita kiel "Giganto inter la Vinoj". En 1915 en la Universala Foiro de Panamo ĝi gajnis la oran premion. En la lastaj jaroj la vinfarejo, kombininte la tradician teknologion kaj modernajn sciencojn kaj teknikon, disvolvis la vinfaran teknologion kaj pluapasa levis la kvaliton de la vino. En la Dua Monda Ekspozicio de Trinkaĵoj kaj Maĝaĵoj okazinta septembre de 1987 en Bankoko Daĉju-brando de Malnova Kelo de Luĝoŭ refoje gajnis la unikan oran premion. ■




Sur strato de Zigong

En la Dinosauria Muzeo de Zigong






Luğoŭ ĉe Jangzi
rivero




En la Jibin-a Pa-
perfabriko



Delikataj metiar-
taĵoj el bambuo

Ĉerkoj pendantaj sur roko



Aŭtaj levmaŝinoj produktitaj de la Jangzi-a Levmaŝina Fabriko en Luĝou

Scienc-teknika kunlaboro en la tria mondo



La ĉina ĉefministro Ĝaŭ Zijang (dekstre) intervidiĝas kun prof. Abdus Salam, prezidanto de la Triamonda Akademio de Sciencoj.

Aŭtuno de 1987. La ora suno banis Pekinon. En Ŝjangŝan-hotelo en la sino de verda arbaro sciencistoj el pli ol 50 landoj kaj reprezentantoj de iliaj registaroj okazigis la duan konferencon de la Akademio de Sciencoj de la Tria Mondo kaj varme diskutis pri la scienca disvolviĝo kaj kunlaboro. La konferenco, unuafoje okazigita

en lando de la tria mondo, estis konferenco por plifortigi la sud-sudan scienca kunlaboron kaj akceli tiun nord-sudan.

Apenaŭ finiĝis la akcepto aranĝita de la ĉina organiza komitato, la estro de la Akademio de Sciencoj de la Tria Mondo okazigis gazetaran akcepton. Li diris al raportistoj, ke fondi la

akademion ja celas al plifortigo de la kunlaboro inter sciencistoj de la sud-sudaj landoj, helpo al kreado de necesaj laborkondiĉoj por eminentaj sciencistoj de la tria mondo, trejno de junaj sciencistoj por ĝi; akcelo de scio-interŝanĝo inter la landoj de la tria mondo kaj esploro de la alfrontaj gravaj problemoj.



La inaŭguro de la Dua Ĝenerala Konferenco de la Triamonda Akademio de Sciencoj

La Akademio de Sciencoj de la Tria Mondo, fondita en 1983, bone funkcias kiel ponto de scienca kunlaboro inter la disvolviĝantaj landoj. La akademio starigis jarpremiojn kaj aljuĝas ĝin al sciencistoj, kiuj faris elstaran kontribuon en la fundamentaj sciencaj kampoj de biologio, kemio, matematiko kaj fiziko. Ĝi fondis sciencajn fonduson de junuloj, difinis planon de 165 financantaj projektoj kaj per tio kontribuis al la disvolviĝo de scienca esplorado de la membrolandoj. El la 165 projektoj 35 estas proponitaj al Ĉinio. La akademio havas siajn laboratoriojn en Italio. El ĝiaj 35 eksperimentaj projektoj 5 estas komisiitaj al Ĉinio. Ili estas superkondukta materialo, akcelatoro, duonkonduktanto, lumradiado k.a. Kaj krome, en 1985 la Internacia Centro de Teoria Fiziko sub la akademio trejnis 100 junajn ĉinajn sciencistojn.

La Akademio de Sciencoj de la Tria Mondo kontribuis ankaŭ al plifortigo de la sud-suda scienca kunlaboro. Dank' al ĝia klopodado, Brazilo, Ĉinio, Ganao, Hindio kaj Kenjo kune aranĝis en 1987 reciprokan vizitadon kaj akademian interŝanĝon inter pli ol 200 sciencistoj. La partoprenantoj de la konferenco interesiĝis ne nur pri la ĉina satelito kaj aliaj altaj teknikoj, sed ankaŭ pri prevento de dezertigo kaj aliaj sciencaj

teknikoj. Antaŭ nelonge, la Ĉina Akademio de Sciencoj, la Ĉina Mediprotekta Buroo kaj la koncerna organizaĵo de UN subskribis interkonsenton kaj decidis starigi internacian esploran centron de prevento de dezertigo surbaze de la Langouŝa Pridezerta Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. La centro trejnus esplorantojn por la tria mondo kaj sendos specialistojn al Tanzanio, Malio kaj aliaj afrikaj landoj por helpi ilin elabori planon pri brido de dezertigo.

La akademio senĉese penas por akceli la nord-sudan scienca kunlaboron. Ĝis nun, nord-sudaj sciencistoj okazigis 8-foje konferencon kaj diskutis pri scienca kunlaboro longtempa kaj mallongtempa. Oni akiris pozitivan rezulton en esplorado pri trosekeco de Afriko, dezertigo kaj grenaj plantoj.

Plifortigi scienca kunlaboron kaj prosperigi la ekonomion de la tria mondo fariĝis forta deziro de la partoprenantoj. La prezidanto de la Ĉina Organiza Komitato de la konferenco Lu Ĝjaŝji diris: "La prospero de lando ne povas disiĝi de la scienca kaj teknika progreso. Laŭ mi, por prospertiĝo kaj potenciĝo, la tria mondo devas elabori konvenajn politikojn laŭ siaj konkretaj kondiĉoj, kaj cetere, estas nemankigeble por ili lerni kaj apliki avangardajn sciencojn kaj

teknikon kaj fari vastan internacian kunlaboron."

La alta takso de Ĉinio al sciencoj kaj tekniko profunde impresis ĉiujn ĉeestantojn de la konferenco. Iuj diris kun memfido, ke la historio de dekoj da jaroj montris, ke la sciencistoj de la tria mondo estas kompetentaj disvolvi sialandajn sciencojn kaj teknikon. La fakto pruvis, ke la azia verda revolucio antaŭ dekelkaj jaroj havigas al nemalmultaj aziaj landoj aŭtarcion en grenakonservado. Ankaŭ afrikaj landoj komencis verdan revolucion kaj akiris rimarkindajn sukcesojn en plibonigo de agrokulturaj plantoj, akvo- kaj grundokonservo. Bioingenerado kaj aliaj altteknikaj kampoj iom post iom fariĝis gravaj objektoj esplorataj de multaj landoj de la tria mondo. La loĝantaro de la tria mondo konsistigas pli ol 70% de tiu de la mondo. Tial la disvolviĝo de ĝiaj sciencoj kaj tekniko havas netakseblan influon sur la homaro.

La partoprenantoj donis grandan atenton al la scienca kaj teknika diferenco inter la nordo kaj sudo. Multaj diris, ke la diferenco ne nur ne malgrandiĝis, sed vidiĝas tendenco de ĝia pligrandiĝo. La donitaĵoj liveritaj de la konferenco indikis, ke la eduka asignaĵo de evoluantaj landoj konsistigas 5.2% de ilia totala naciekonomia produktova-

Bondeziro kaj espero

Ĉe la alveno de 1988 ni sendas sincerajn bondeziron kaj saluton al niaj karaj legantoj, perantoj kaj amikoj, kiuj zorgas pri nia gazeto.

Kiajn ŝanĝojn nia gazeto havos kaj kion ni faros en la nova jaro? Kiel kutime, ni faros ĉion eblan por plibonigi nian gazeton kaj pli kontentigi niajn legantojn. Pro tio ni pli profunde konigos la reformadon kaj pord-malferman politikon, kiujn nun praktikas Ĉinio kaj kiujn tre atentis niaj legantoj. Ni daŭrigos artikolo-seriojn kaj rubrikojn, kiaj "Vojaĝo laŭ Jangzi-rivero", "Ĉina Literaturo", "Enciklopedieto de Ĉinio", "Ĉinaj Artoj", "Ĉinaj Poŝtmarkoj" kaj "Por Via Sano". Laŭ propono kaj peto de multaj legantoj, ni funkciigos novajn rubrikojn, kiaj "Vivo de Ordinaraĵoj Ĉinoj", "Ĉina Medicino" kaj "Ĉinaj Moroj", kaj restarigos la rubrikon "Fotoj Faritaj de E-istoj". Kaj krome, ni daŭre plibonigos la paĝo-aranĝon, aspekton kaj preson de la gazeto.

Por disvastigi nian lingvon kaj por ke pli da alilandaj esperan-

tistoj konu Ĉinion, ni kaj la Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN) decidis pligrandigi la distribuadon de la gazeto en ĉiuj partoj de la mondo. Tiucele ni premios la legantojn kaj perantojn, kiuj bone helpas nin distribui la gazeton: (1) Ni donacos EPĈ de unu ĝis kvar jaroj al tiuj, kiuj abonigos en 1988 10—40 novajn legantojn kaj sendos la abonkotizon. (Rimarko: Tuj post la abonigo de 10 legantoj oni informu tion al la Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio, por ke ĝi povu fari aranĝon.) (2) Ni donacos EPĈ al tiuj, kiuj abonigos en unu jaro pli ol 50 novajn legantojn kaj sendos la abonkotizon, kaj ni aldonos ĉinajn Esperantajn librojn laŭ ilia kontribuo. Tiuj, kiuj abonigos en unu jaro pli ol 100 novajn legantojn kaj sendos la abonkotizon, ricevos, krom la supra favoro, ankaŭ belan metiartaĵon en ĉina stilo. Se perantoj same kontribuos, ni donacos al ili ĉinajn Esperantajn librojn kaj metiarta-

jojn. (3) Tiuj, kiuj abonigos en unu jaro pli ol 300 novajn legantojn (perantoj, kiuj abonigos kaj reabonigos tiom da legantoj) kaj sendos la abonkotizon, estos invititaj ekskursi en Ĉinio 7-14 tagojn. Ni kaj la libro-komerca kompanio pagos por iliaj manĝo, loĝo kaj veturo en Ĉinio (la invititoj mem respondecu pri pago por sia veturo ekster Ĉinio).

Por akceli la amikecon kaj interkompreniĝon inter diverslandaj esperantistoj kaj por ke ĉiuj zorgu pri la disvolviĝo de nia movado, ni decidis okazigi decembre de 1988 konkurson de EPĈ-amikoj. Tiuj, kiuj bone legos EPĈ de 1988, sukcesos en la konkurso. Ni aperigos la konkursojn temojn kaj regulojn en la lasta numero de EPĈ, 1988. Ni premios la unuajn kvar elstarajn per ĉinstila murtapiŝo, la duajn ok per ĉina silka brokato kaj la triajn 30 per Esperanta libro kaj donacos memorajojn al ĉiuj aliaj partoprenantoj. Ni invitas niajn legantojn al tiu konkurso.

La Red.

loro, dum tiu de disvolviĝantaj landoj nur 3.8%. Manko de sufiĉa mono malfortigis la aferon de disvolviĝantaj landoj en kulturado de sciencistoj kaj teknikistoj, kaj tiel influis la disvolviĝon de sciencoj kaj tekniko.


Ankaŭ tio, ke eminentaj sciencistoj kaj teknikistoj de tiuj landoj grandnombre fluas eksterlanden, estas unu el la gravaj

faktoroj, kiuj malhelpas la disvolviĝon de sciencoj kaj tekniko de la tria mondo. Reprezentanto el Latin-Ameriko diris, ke ĉiujare 8% de la diplomitoj de superaj politeknikaj lernejoj kaj 20% de tiuj de superaj soci-sciencaj lernejoj forlasis Latin-Amerikon. En la periodo de 1961 ĝis 1970 forlasis Latin-Amerikon 35 famaj matematikistoj, 132 fizikistoj kaj 769

biologoj kaj biokemiistoj. Ankaŭ tio okazas en aziaj kaj afrikaj landoj. Kaj cetere, manko de scienc-esplora asignaĵo limigas la sciencan disvolviĝon de la tria mondo. Tial la konferenco alvokis, ke la landoj de la tria mondo alprenu fortajn rimedojn kaj faru ĉion eblan por malgrandigi la diferencon de sciencoj kaj tekniko inter la nordaj kaj sudaj landoj. ■

Ĉina ŝako

de LAN SAN




Tabulo kun ŝakpecoj

La ĉina ŝako evoluis el la antikva *Boŝji* (ŝako ludata de du homoj ĉiu kun ses ŝakpecoj) de Ĉinio kaj havas historion de pli ol 1 000 jaroj. Dum la regado de la imperiestro Udi (561-578 p.K. sur la trono) de la Norda Ĝoŭ-dinastio aperis "Ŝaka Klasikaĵo" kaj ŝakludo furoris en la palaco kaj inter intelektuloj. En la erao Baŭjing (762-763 p.K.) de Tang-dinastio aperis Baŭjing-ŝako, kies strukturo tre similis al la nuna. En la Suda Song-dinastio (1127-1279 p.K.) la ĉina ŝako ekhavis unuecajn regularon kaj formon.

Ŝaktabulo de la ĉina ŝako estas oblonga aŭ kvadrata, sur ĝi kruciĝas 9 vertikalaj kaj 10 horizontalaj linioj, kiuj formas 90 krucaĵojn, sur kiuj moviĝas ĝiaj 32 ŝakpecoj. La spaco inter la kvina

kaj sesa horizontalaj linioj netrapasita de la vertikalaj linioj nomiĝas "limrivero", kiu dividas la tabulon en du egalajn partojn. Ĉiu parto havas po unu kvadraton kun du diagonaloj nomatan "palaco", en kiu moviĝas la generalo kaj eskortantoj.

En ŝakludo



Estas 32 ŝakpecoj dividitaj en du grupojn ruĝan kaj nigran, ĉiu kun 16 pecoj. Ĉiu grupo konsistas el unu generalo (帥), 2 eskortantoj (士), 2 elefantoj (象), 2 ĉevaloj (馬), 2 ĉaroj (車), 2 kanonoj (砲) kaj 5 peonoj (卒).

La ŝakpecoj en la antikveco plejparte estis faritaj el eburo. Estis valorega ĉina ŝako, kies ruĝaj pecoj estis el verda jado kun inkrustitaj ideogramoj el koralo kaj nigraj pecoj el blanka jado kun inkrustitaj ideogramoj el sukceso. La ordinara ŝakpecoj estis faritaj el ligno.

La ludo de ĉina ŝako estas intelekta, konkursa ludo kun difinitaj reguloj. Je la komenco de matĉo la 32 ŝakpecoj devas esti metitaj ĉiu en sia loko (vd. la bildon). Tiu, kiu uzas la ruĝajn pecojn, rajtas la unua fari ŝakmovon, poste la du ludantoj movas sian pecon alterne. La matĉo daŭras ĝis unu ludanto matigis la generalon de la rivalo aŭ unu ludanto anoncas sin venkita. Kiam la ludantoj ne povas matigi la generalon de la rivalo reciproke, aperas egaligo post propono de unu ludanto kaj alies konsento.

La ŝakpecoj estas movataj laŭ rigoraj reguloj. Generalo ĉiufoje povas iri nur unu paŝon, antaŭen, malantaŭen, dekstren aŭ maldekstren, sed al ĝi estas malpermesate eliri el la palaco. Al la du generaloj estas malpermesate fronti unu al la alia sur la sama linio, inter ili nepre devas esti alia peco. Alie, la ludanto, kiu estigas

la situacion, estas venkita laŭ la regulo. La eskortanto ĉiufoje povas antaŭeniri aŭ retroiri unu paŝon laŭ la diagonaloj en la palaco. La elefanto povas antaŭiri aŭ retroiri du paŝojn diagonale, ĝi ne povas iri trans la pecon meze de ĝia vojo kaj trans la limriveron. La ĉaro ĉiufoje povas iri vertikale aŭ horizontale, sen paŝo-limigo. La ĉevalo ĉiufoje povas iri unu paŝon rekte kaj unu oblikve; se estas alia peco survoje, la ĉevalo ne povas iri. La kanono moviĝas kiel la ĉaro, kiam ĝi ne atakas. La kanono povas fari atakon, nur kiam iu alia peco troviĝas sur ĝia vojo. La peono ĉiufoje povas iri nur unu paŝon antaŭen antaŭ transiro de la limrivero, post la transiro de la limrivero, ĝi ĉiufoje povas antaŭeniri aŭ horizontale iri unu paŝon, sed neniam malantaŭen.

Estas malpermesate movi ŝakpecon sur la lokon okupatan de


siaflanka peco. Se tie estas ŝakpeco de la rivalo, li povas ekstermi tiun per la sia kaj okupi la lokon. Escepte de generalo, ĉiu ajn peco povas esti ekstermita de la rivalo. Sed se la generalo de unu ludanto estas ekstermita de la rivalo, li estas venkita kaj perdas la matĉon.

En la historio de la ĉina ŝakludo aperis multaj famaj majstroj, ili faris profundan esploron pri la ŝakludo kaj kompilis multajn verkojn. La plej frua ŝakluda gvidlibro estas "Meng Ĵu Ŝen Ji" (Sekreto Trovita en Songo) de Ming-dinastio (1368-1644). La unua komplete konservata libro estas "Ŝanĝiĝema Ŝakludo" eldonita en 1522. Estas vaste konata la ŝakluda libro "Ĝju Ĝong Bi" eldonita en 1632, ĝi heredis kaj sintezis la atingojn de la ludarto pri la ĉina ŝako en la periodo de la 11-a jc. ĝis 17-a jc. Poste multaj ŝakmajstroj faris daŭran, profun-

dan esploron kaj evoluigis la ĉinan ŝakludon.

En 1956 Ĉinio ekprenis la ĉinan ŝakludon kiel oficialan sporto-branĉon, preskaŭ ĉiujare oni okazigas landskalan konkurson de la ĉina ŝako. Multaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj fondis sian ŝakludan asocion, iuj grandaj urboj funkciigas ŝakludajn klubon, societon aŭ domon kaj ŝakan lernejon. Havante ŝaktabulon kaj 32 ŝakpecojn, oni jam povas fari ludon. Ĝi entenas riĉan filozofion, povas ŝanĝiĝi senfine, klerigi homan penson kaj hardi homan psikon, tial ĝi estas multe ŝatata de la popolo. Ĉie en Ĉinio videblas ŝakludado kun multaj apudstarantaj rigardantoj. Ŝakistoj en ludo faris diversajn lertajn manovrojn admirindajn. Estas malfacile fariĝi ŝakmajstro. Iu antikva fama ŝakisto diris: "Eĉ per dumviva klopodo oni ne povas posedi ĝian tutan sekreton." ■

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Harbin 2. Mohe-gubernio 3. Ŝingĉeng 4. Jibin 5. Luĝou 6. Zigong

STABILE PROGRESAS LA ĈINA NACIA EKONOMIO

En la lastaj ok jaroj la ĉina ekonomio suriris la vojon de stabila kresko kaj ŝanĝis la situacion de subita progreso kaj subita depresio, kiu okazis plurfoje en la historio. Duobliĝis en 1986 la totala nacia produktovalor, la totala produktovalor de industrio kaj agrikulturo, la financa enspezo kaj la pokapa enspezo de la urbanoj kaj kamparanoj, kompare kun tiuj de 1978. Kaj ili daŭre kreskis en 1987.

Preskaŭ reguliĝis la ĉefaj proporciaj rilatoj de la nacia ekonomio. Fortiĝis la malfortaj agrikulturo kaj malpeza industrio. Samtempe kun la plibonigo de la popola vivo, oni tenis la akumulon stabila. Iom ŝanĝiĝis la postiĝinteco de la terciara industrio kaj plene disvolviĝis la multflanka entreprenado. Eduko, scienco kaj tekniko rapidiĝis siajn paŝojn en disvolviĝo kaj la elspezo por eduko konsistis jam 3.8% de la totala nacia produktovalor.

TIBETO ADIAŬAS MALRIĈECON KAJ POSTIĜINTECON

Post la Demokratia Reformo de Tibeto en 1959 okazis al tiu malriĉa loko senprecedenca ŝanĝiĝo ĉiuflanke, dank' al la senrezerva helpo de la ŝtato kaj la komuna klopodo de la lokaj diversnaciecaj popolanoj.

Kiel la ekonomia bazo, la agrikulturo de Tibeto estis ĉiam postrestanta en la pasinteco. En la 70-aj jaroj oni draŝis grenon per tretado de gruntbovoj. Sed poste, en 1985, la totala produktovalor de agrikulturo kaj brutobredado de Tibeto superis jam 900 milionojn da jŭanoj (ĉirkaŭ 3.72 jŭanoj egalas al unu usona dolaro), 3.73-oble pli multe ol en 1959. Tibeto havis pli ol 21 milionojn da brutoj en 1985, 1.3-oble pli multe ol en 1959.

Antaŭ la Demokratia Reformo en


Tibeto ne estis moderna industrio. Nun oni starigis tie pli ol 250 mez-kaj malgrandajn entreprenojn elektroenergiajn, karbajn, konstruajn, konstru-materialajn, malpez-industriajn, lan-teksajn, paperajn kaj manĝajajn. Oni rapide disvolvis ankaŭ la naciecan metiindustriion. Samtempe oni konstruis ŝoseojn kondukantajn al Tibeto respektive de Siĉŭan, Ĉinghaj, Ŝingjang kaj Gujĝoŭ, kun totala longeco de 21 600 kilometroj. Krome, oni malfermis aerliniojn de Lhasa respektive ĝis Pekino, Ŝanhajo, Ĉengdu, Ŝjian kaj Kantono.


Antaŭ la Demokratia Reformo en

Tibeto estis nur kelkaj tre malgrandaj privataj lernejoj, kaj analfabetoj superis 95% de la tibeta loĝantaro. Nun tie funkcias 6 altaj lernejoj, 14 mezgradaj kolegioj, 64 mezlernejoj kaj 2 388 elementaj lernejoj, kun 148 000 lernantoj. La ŝtato praktikas senpagan kuracadon al la tibeta popolo, kaj servas tie pli ol 900 hospitaloj kaj sanitaraj servoj, kun 4 980 malsanulaj litoj. Progresis ankaŭ scienco, tekniko, radioelsendo, televizio kaj sporto.

Krome, ankaŭ la vivnivelo de la tibeta popolo rimarkinde leviĝis. Laŭ statistiko ĝis majo de 1987 la totala monsumo en ŝparkaso en Tibeto kun

Lhasa, en kiu estas diversaj novaj konstruoj kun totala plank-areo 10-oble pli granda ol tiu de la malnovaj





La etilena entrepreno Jangzi

du milionoj da loĝantoj atingis 1.54 miliardojn da jŭanoj, t.e. 770 jŭanoj pokape.

DAŬRA KRESKO DE LA LOĜANTARO DE TIBETO

En la pasintaj pli ol 30 jaroj ĉiam kreskis la loĝantaro de la Tibeta Aŭtonoma Regiono. La totala nombro nun superis 2.02 milionojn, inter kiuj estas 1.93 milionoj da tibetnaciaoj kaj 73 000 hanoj.

En 1953 Tibeto havis 1.27 milionojn da loĝantoj. Nun la meza vivdaŭro de la tibetaj viroj estas 60 jaroj kaj tiu de la tibetaj virinoj — 65 jaroj. La ciferoj estas multe pli grandaj ol tiuj antaŭ 30 jaroj.

LA ĈINA JARA PRODUKTOKVANTO DE LOKOMOTIVOJ OKUPIS LA DUAN LOKON EN LA MONDO

En 1987 Ĉinio okupis la duan lokon en la jara produktado de lokomotivoj. Nun Ĉinio produktas meznombro unu dizelan lokomotivon en ĉiu 12-a horo kaj unu elektran lokomotivon en ĉiu 33-a horo.

GRANDA SALMINEJO TROVITA SUB ĜJANGHAN-EBENAJO

Post esplorado ĉinaj geologoj

konstatis, ke sub Ĝjanghan-ebenaĵo en Hubej-provinco troviĝas granda salminejo malofte en Ĉinio. En spaco de 1 600 kvadrataj kilometroj sub la ĉirkaŭaĵo de iu gubernio oni jam konis la rezervokvanton de 560-790 miliardoj da tunoj da roksalo, 20-30-oble pli multe ol en la fama ĉina sala urbo Zigong, Siĉŭan-provinco.

NOVA ETILENA ENTREPRENO INAŬGURITA EN NANKINO

Dum longa tempo la ĉina jara produktokvanto de etileno restis ĉirkaŭ 600 000 tunoj. En 1986 ekfunkciis la etilena entrepreno Daĉing, kun jara produktokvanto de 300 000 tunoj. Antaŭ nelonge oni inaŭguris la etilenan entreprenon Jangzi en Nankino, Ĝjangsu-provinco. Baldaŭ oni funkciigos la etilenan entreprenon Ĉjilu en Ŝandong-provinco. Tiel Ĉinio povos kreskigi sian jaran etilenan produktokvanton je 900 000 tunoj.

RIĈIĜAS LA DELTO DE JANGZI-RIVERO

Ĝis nun troviĝis 227 urbetoj en la delto de Jangzi-rivero, ĉiu kun totala jara industria kaj agrikultura produktov valoro de cent milionoj da jŭanoj. Ili situas ĉefe laŭlonge de la fervojo inter Ŝanhajo kaj Nankino kaj

tiu inter Ŝanhajo kaj Hangĝou. Ilia apero multe akcelis la lokan kampan ekonomion kaj riĉigis la vivon de kamparanoj. La delto de Jangzi-rivero fariĝas nun "ora" delto.

NATURA SUBTERA AKVOREZERVEJO TROVITA EN PEKINO

Lastatempe ĉinaj geologoj trovis naturan subteran akvorezervejon kun areo de 700 kvadrataj kilometroj en loko 40 kilometrojn nordoriente de la urba distrikto de Pekino. La akvorezervejo povos mildigi la streĉecon de akvo-provizo en la urbo.

TJAN'ANMEN-PORDEGO MALFERMIĜOS AL EKSTERLANDAJ TURISTOJ

Ĉi-jare okazos la aktivado por la Internacia Jaro de Turismo en Pekino. Post kelkmonata prepara laboro oni proponis iujn vidindejojn kun drako kiel temo. Oni malfermos la fame konatan Tjan'anmen-pordegon al eksterlandaj turistoj.

ĈINIO ENIRIS LA USONAN KAPITALAN MERKATON

La 6-an de oktobro 1987 la Ĉina Banko prunteprenis 200 milionojn da usonaj dolaroj en konsorciaj pruntoj en Novjorko. Jen Ĉinio unuafoje



Violonisto Lju Siĉing

eniris la usonan kapitalan merkaton. Antaŭ tio Ĉinio anoncis, ke ĝi emisios obligaciojn de 200 milionoj da usonaj dolaroj por eniri la londonan kapitalan merkaton. Ĉinio jam disdonis obligaciojn al Tokio, Singapuro kaj Frankfurto.

TELEFONIS FILM-AKTORINOJ AMBAŬFLANKE DE TAJ'ŬAN-MARKOLO

Pro konataj historiaj kaŭzoj la ĉinoj ambaŭflanke de Taj'ŭan-markolo ne povis interparoli dum longa tempo. La bedaŭrindaĵon oni metas nun en arkivon. Antaŭ nelonge Liŭ Ŝjaŭĉing, film-stelulino de la ĉina kontinento, kaj Lin Ĉingŝja, film-stelulino de Taj'ŭan, interparolis per longdistanca telefono. Lin diris al Liŭ, ke ŝi esperas filmudi kun Liŭ kaj viziti la kontinenton. Ankaŭ Liŭ esprimis, ke ŝi volas kunlabori kun Lin en filmulado kaj vojaĝi al Taj'ŭan.

MALGRANDA VIOLONISTO LJU SIĈING GAJNIS LA UNUAN LOKON POR PAGANINI-PREMIO

La 17-jara violonisto Lju Siĉing, lernanto de la sesa klaso de la Dependanta Mezlernejo de la Centra Konservatorio de Ĉinio, gajnis la unuan lokon en la 34-a Internacia Violonluda Konkurso por Paganini-premio en Italio, unu el la nuntempaj altnivelaj internaciaj konkursoj tiurilate.

BONAJ SUKCESOJ DE ĈINAJ SPORT- AKROBATOJ

Ĉinaj gegimnastoj gajnis ses orajn medalojn en la Sesa Mondpokala Sport-akrobata Turniro okazinta de la 8-a ĝis la 10-a de oktobro 1987 en Baton Rouge, Usono.

Ĉinaj sportistoj Ĉen Gang, Ĉen Ŝjaŭŭej, Ĝang Ŝihong kaj Ma Sŭofu gajnis du pliajn orajn medalojn en la unua kaj dua prezentadoj de kvar viraj konkursoj post sia venko en ĉiuronda konkurso. Ĉinaj gesportistoj Feng Taŭ kaj Hŭang Ĵujfen gajnis orajn medalojn respektive en vira kaj virina unuaj prezentadoj. Ĉinaj sportistinoj Ŭang Li kaj Ĝang Ŝiŭjong gajnis alian oran medalon kaj kupran medalon respektive en la unua kaj dua prezentadoj de la virinaj parkonkursoj finaloj. Bonajn sukcesojn akiris ankaŭ la aliaj ĉinaj gesportistoj. Ili ĉiuj gajnis medalojn.

"MALNOVA PUTO" PREMIITA EN LA INTERNACIA FILM-FESTIVALO

En la Dua Tokia Internacia Film-festivalo la ĉina filmo "Malnova Puto" gajnis "Grandan Premion" kaj "Premion de Tokia Prefekto". Ĝia ĉefrolulo Ĝang Jimoŭ gajnis la premion de la plej elstara aktoro.

Unu el la ĉefaj kaŭzoj de ĝia sukceso kuŝas en tio, ĝia reĝisoro U Tjanming diris, ke en Ĉinio aperis junaj reĝisoroj

talentaj kaj kuraĝaj en laboro kaj verkis influajn dramojn.

LA UNIKA "ĈIELA KAVO"

Oni trovis la "Ĉielan Kavon", novan naturan vidindejon en Ŝjaŭĝajvilaĝo, Ĝingĝu-subdistrikto, Fengĝjegubernio, Siĉŭan-provinco.

La mirindaĵo estas kaŭzita de funelforma faŭlto. La formo de ĝia roka rando similas al tiu de persiko. Ĝi havas diametron de 520 metroj kaj profundon de 662 metroj. Sur ĝia fundo fluas rivereto. Ĝi estas pli profunda kaj pli granda ol la "Granda Funelo" de Usono, konata kiel senegala en la mondo.

PEKINO EKSPOZICIIS VAROJN KUN FALSAJ FABRIKMARKOJ

En multaj lokoj de Ĉinio pli kaj pli furiozis produktado de varoj kun falsaj famaj fabrikmarkoj, kiel cigaredoj, vinoj, bicikloj, brakhorloĝoj, hejmaj elektraj objektoj, cemento, aluminiuj ingotoj, kemia sterko, insekticido kaj semo. Por batali kontraŭ tia kontraŭleĝa faro kaj levi la distingo-kapablon de klientoj, la ŝtata industria kaj komerca administracio de Ĉinio okazigis antaŭ nelonge en Pekino ekspozicion de pli ol 500 varoj kun falsaj fabrikmarkoj.

KARIKATURO





Sur Lugu-lago

Moso-oj apud Lugu-lago

Fotoj de CAJ HAJFENG

En norda Junnan-provinco, najbare al la provinco Siĉŭan, estas bela lago Lugu kaj ĉe la lago vivas la moso-oj, branĉo de naŝi-nacieco.

La moso-oj havas siajn antikvajn morojn. Antaŭ 30-40 jaroj ili ankoraŭ konservis kompare kompletajn matriarkajn familiojn, kiuj estas iom post iom anstataŭataj de monogamiaj familioj.

La moso-oj loĝas en domoj el arbotrunkoj. Meze en la domo estas fajrejo, ĉirkaŭ kiu la familio manĝas, trinkas, babilas, kultas kaj gastojn akceptas.

La moso-aj virinoj portas plisitan jupon kaj jaketon kun ora pasamento. La pli aĝaj portas nigrajn vestojn.

La moso-oj okupiĝas ne nur pri terkulturado, sed ankaŭ pri fiŝado en pirogo sur la lago. Ĉar la pirogo similas al trogo, ĝi estas nomata ankaŭ "trogopirogo".

Lugu-lago nutras ĉiujn moso-ajn generaciojn, kaj la moso-oj nomas ĝin "patrina lago".

ĈINAJ POŜTMARKOJ

Antikvaj ĉinaj mitoj

de ĈUN GENG



La antikva Ĉinio postlasis multajn kortuŝajn kaj romantikajn mitojn. La poŝtmarko-serio prezentas ses mitojn: Mondkreo de Paŝu (supre maldekstre), homkreo de Njuŭa (supre dekstre), paffaligo de naŭ sunoj fare de Hoŭ Ji (meze), flugo de Ĉang E al la luno (sube maldekstre), persekutado de Kŭafu al la suno (sube meze) kaj marplenigado de Ĝingŭej (sube dekstre). La mitoj montras la mondkreadon, feliĉigon al la popolo, savon de la popolo el danĝero, strebadon al lumo, persistemon kaj sinoferemon.

La 6-peca serio estis emisiita en la 25-a de septembro 1987.

